



ANALEKTOJ DE KONFUCEO

Elĉinigiŝ Wang Chongfang

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

e-Librigita de Elermo, aprilo 2006

ENHAVO

ANTAÛPAROLO

Ĉapitro I XUE ER

Ĉapitro II WEI ZHENG

Ĉapitro III BA YI

Ĉapitro IV LI REN

Ĉapitro V GONGYE CHANG

Ĉapitro VI YONG YE

Ĉapitro VII SHU ER

Ĉapitro VIII TAI BO

Ĉapitro IX ZI HAN

Ĉapitro X XIANG DANG

Ĉapitro XI XIAN JIN

Ĉapitro XII YAN YUAN

Ĉapitro XIII ZI LU

Ĉapitro XIV XIAN WEN

Ĉapitro XV WEI LING GONG

Ĉapitro XVI JI SHI

Ĉapitro XVII YANG HUO

Ĉapitro XVIII WEI ZI

Ĉapitro XIX ZI ZHANG

Ĉapitro XX YAO YUE

NOTOJ

ANTAŬPAROLO

«Analektoj de Konfuceo» , la konfuceana Biblio, estas kolekto de eldiroj kaj anekdotoj de Konfuceo kaj liaj disĉiploj. Ĝi estis kompilita de disĉiploj de Konfuceo kaj disĉiploj de liaj disĉiploj post lia morto. La libro konsistas el dudek ĉapitroj kaj ĉiu ĉapitro kun nombro da sekcioj, kaj ĉiu sekcio enhavas en si unu aŭ pli da pecoj de parolo aŭ anekdoton. La enhavo de tiu ĉi verko estas tre ampleksa. Ĝi inkluzivas vidpunktojn de Konfuceo pri politiko, filozofio, eduko, etiko, principoj de morala konduto, literaturo, artoj ktp.

Konfuceo (551- 479 a. K.) naskiĝis en la urbo Zou (la nuna Qufu, Shandong-provinco) de Lu-regno. Lia ĉina nomo estas Kong Qiu (Kong estas lia familia nomo kaj Qiu lia persona nomo) , lia adoltiĝa nomo estas Zhongni. La ĉinoj kutime respektas lin Kong Fuzi (Majstro Kong) , kiu estis latinigita kiel Confucius. La Esperanta nomo “Konfuceo” devenas de la latina formo. La prapatroj de Konfuceo estis nobeloj de Song-regno. Ĉar en tiu regno okazis interna milito, lia praaavo fuĝis en Lu-regnon kaj fiksloĝiĝis tie. La patro de Konfuceo, Kong He, estis nobelo de Lu-regno. Kiam Konfuceo estis en la aĝo de tri jaroj, mortis lia patro, kaj pro tio la orfo vivis mizeran vivon. Pri sia juneco Konfuceo diris “Kiam mi estis juna, mi estis malriĉa, kaj tial mi akiris al mi la kapablon fari multajn praktikajn aferojn.” Dum sia juneco li perlaboris siajn

vivrimedojn, sin okupante pri funebra muzikludado. Post la aĝo de dudek jaroj li laboris sinsekve kiel gardisto de grentenejo kaj malaltranga oficisto estranta la brutbredadon. Dume li dediĉis siajn liberajn horojn al lernado, kaj dank' al sia granda diligenteco li fariĝis homo erudicia. Kiam li estis en la aĝo de ĉirkaŭ tridek jaroj, li fondis privatan lernejon kaj vaste varbis disĉiplojn, por instrui siajn sciojn al homoj de diversaj tavoloj de la socio. La ĉefaj agadoj dum lia tuta vivo estis instruado kaj editorado de klasikaĵoj. En la aĝo de kvardek sep jaroj li fariĝis prefekto de la ĉefurbo de Lu-regno kaj, pli poste, ministro pri domkonstruado kaj kriminala ĉefĵugisto. En sia kvindek-kvara jaro li funkciis kiel provizora ĉefministro de Lu-regno dum tri monatoj. Ĉar la suvereno de Lu-regno ricevis de Qi-regno muzikistinojn kiel donacon, kiuj tiel ravis la suverenon, ke eĉ dum tri tagoj li okazigis nenan kortegan aŭdiencon, Konfuceo kun indigno forlasis Lu-regnon kaj, akompanate de siaj disĉiploj, komencis vojaĝadon kun la celo propagandi sian doktrinon. Lia vojaĝado daŭris dek kvar jarojn. Li alvenis al Wei-, Cao-, Song-, Zheng-, Chen-, Cai-, kaj Chu-regnoj, sed neniu regnestro volis akcepti lian doktrinon kaj komisii al li ian oficon. En sia sesdek-oka jaro li revenis en Lu-regnon, kaj de tiam li plene dediĉis sin al instruado, studado kaj editorado de klasikaĵoj. Li diligente laboris super «Libro de Poezio», «Libro de Historio», «Libro de Ŝanĝiĝoj» k.a. kaj donis al ili

definitivan libran formon. Li ankaŭ kompilis la kronikon «Printempo kaj Aŭtuno». Kiam li atingis la aĝon de sepdek du jaroj, li finis la kompiladon de la kroniko. Li mortis en la aĝo de 73 jaroj.

Konfuceo vivis en la lasta tempodaŭro de la Periodo Printempo kaj Aŭtuno (770 - 476 a.K.). Tiam la regado de Zhou-dinastio (ĉ. 1066-256 a. K.) disfalis, senĉesaj militoj okazis inter diversaj regnoj, kaj malordo regis ĉie en la lando. Konfuceo faris diversajn proponojn, por reformi la politikon. Politike li estis reformisto. La kerno de lia ideologio estis “perfecta virto”, kaj lia politika idealo estis efektiviĝi humanan regadon. Kiam lia disĉiplo Fan Chi demandis lin, kio estas la perfecta virto, li respondis: “Ĝi estas ami ĉiujn homojn.” Li tenis sin je la principoj: “Ne faru al aliaj tion, kion vi ne dezirus fari al vi mem” kaj “Vi mem deziras stari, tiam helpu aliajn stariĝi; vi mem deziras sukceson, tiam helpu aliajn atingi la samon.” Li ankaŭ insistis, ke la reganto “regu per la forto de sia virto” kaj “donu bonan ekzemplon por siaj subuloj, pardonu iliajn eraretojn kaj promociu homojn virtajn kaj talentajn”. Li esperis, ke per efektivigo de la humana regado la rilatoj interne de la reganta klaso povos harmoniiĝi kaj la kontraŭdiroj inter la regantoj kaj regatoj povos malakriĝi, tiel ke aperos tie ideala sociordo, en kiu “la princo estu princo, la ministro estu ministro, la patro estu patro kaj la filo estu filo”. Tiu ĉi lia politika idealo, kompreneble, estis tute nerealigebla en lia tempo.

Heredinte la tradician koncepton pri belo , Konfuceo konfesis ĉielon kiel ĉiopovan estaĵon, kiu decidas pri la naskiĝo kaj morto de la homo kaj pri la homa feliĉo aŭ malfeliĉo. La volo de Ĉielo, laŭ li, ne estas malobeebla. Li diris, ke oni devas “timi la volon de Ĉielo” kaj ke “al tiu, kiu ofendas Ĉielon, preĝoj neniel helpas”. Koncerne epistemologion, unuflanke li opiniis, ke troviĝas geniuloj, kiuj “naskiĝas kun la posedo de scioj”, aliflanke li emfazis la gravecon de lernado. Li diris “En niaj naturoj ni estas similaj unu al alia, sed kutimoj faras nin diferencaj inter ni.” Li neis, ke li mem estas tia homo, kiu havas kunnaskitajn sciojn. Kvankam en la tempo de Konfuceo regis superstiĉo pri fantomoj kaj dioj, tamen li ne estis tiel pia al ili. Li diris: “Respektante la spiritojn, la saĝa homo devas forteni sin de ili.” Kiam la disĉiplo Zilu demandis pri la servado al la spiritoj de mortintoj, li respondis: “Dum vi ankoraŭ ne povas servi al vivantoj, kiel vi povus servi al la spiritoj de mortintoj? ” Lia nekredo je spiritoj montras, ke troviĝas iom da materiisma elemento en lia filozofia penso, kaj tial estas malfacile diri, ĉu lia ideologio estas ideisma aŭ materiisma.

Rilate la kontraŭdiron inter pravo kaj malpravo, Konfuceo insistis pri la principo de la Ĝusta Mezo, nome eklektika filozofio, kaj oponis kontraŭ ekstremaj opinioj kaj rimedoj. Laŭ li la homaj paroloj kaj agoj ne devas esti troaj, nek maltroaj. “La transiro de la Ĝusta Mezo estas same malbona, kiel la neatingo.” La tezo de Konfuceo pri la Ĝusta Mezo havas profundan influon

sur la postaj generacioj de la ĉinoj.

La eldiroj de Konfuceo pri la edukado estas aparte valoraj. Li diris: “Instruado konas neniajn kastojn.” Li ne rifuzis instrui ĉiujn tiujn, kiuj volis studi sub li, tute egale, ĉu ili estis nobeloj aŭ ordinaraj homoj, ĉu riĉuloj aŭ malriĉuloj . Li aplikis la instrumentodon doni al ĉiu lernanto instruon konforman al lia kapablo. Li opiniis, ke en la lernado oni “ne devas fari konjekton, nek absolutan jesigon; ne devas obstini, nek opinii sin ĉiam prava”. Dum sia tuta vivo li ĉiam “lernadis sen enuo kaj instruadis sen laciĝo”. Sed li malestimis lernadon de terkulturado. Kiam lia disĉipo Fan Chi petis instrui al li terkulturadon kaj legomplantadon, li riproĉe diris, ke Fan Chi estas “malgranda homo”.

Konfuceo esprimis siajn opiniojn ankaŭ pri literaturo. Li diris al siaj disĉiploj: “La Poemoj povas helpi al vi eksciti vian imagon , altigi vian observkapablon, vivi en akordo kun aliaj, lerni kiel fari satiradon. Ili povas esti uzataj en la servado al viaj gepatroj en la hejmo kaj en la servado al la princo en lia palaco. Plie, ili povas ankaŭ plivastigi vian konon pri la nomoj de birdoj, bestoj kaj plantoj.” Ĉi tiuj liaj vortoj montras, ke li jam sufiĉe konsciis, ke la poeziaĵoj havas valoron en edukado kaj mondkonado kaj eĉ povas servi al la regnorgado. Konfuceo diris ankaŭ: “Estas sufiĉe, se la vortoj povas klare esprimi la penson.” Tio signifas, ke por eldiri siajn pensojn kaj verki literaturaĵojn oni preferas direkti sian atenton al la klareco, ol aliaj floroj

de retoriko. Tio estas la plej frua literatura kritiko en la historio de Ĉinio.

Konfuceo ankaŭ donis grandan atenton al la kulturado de la moralaj kvalitoj de la homoj. Li diris: “La komandanto povas esti kaptita for de sia armeo, sed la volo de la ordinara homo ne povas esti prenita for de li.” Kial la volo ne povas esti prenita? Ĉar ankaŭ la ordinara homo havas sian nehumiligeblan sendependan karakteron. Pri la demandoj, kiajn moralajn kvalojn oni devas posedi kaj kiel oni povas kulturi tiajn kvalitojn, Konfuceo parolis multe. Interalie li diris “Mielaj vortoj kaj hipokrita mieno estas ne ligitaj kun la vera virto.” “Frostiĝas, kaj ni ekscias, ke la pinoj kaj cipresoj perdas siajn foliojn la lastaj.” “Kiam vi vidas homon bonan, pensu pri egaliĝo al li; kiam vi vidas homon nebonan, faru en vi memekzamenon.” “Riĉaĵoj kaj honoroj maljuste akiritaj estus por mi kiel flosantaj nuboj.” Ĉiuj ĉi vortoj de Konfuceo enhavas en si tre belajn moralajn ideojn kaj veron de la vivo. Ili disradias la brilon de saĝeco kaj meritas nian foj-refojan legadon.

La lingvo en «Analektoj de Konfuceo» estas konciza kaj flua. Kvankam la libro konsistas ĉefe el mallongaj konversacioj inter Konfuceo kaj liaj disĉiploj aŭ liaj respondoj al demandoj levitaj de liaj disĉiploj, tamen la ideoj esprimitaj en ili estas tre riĉaj kaj profundaj. Multaj el la eldiroj de Konfuceo jam fariĝis sentencoj kaj aforismoj nun vaste konataj de la ĉinoj. Ekzemple, preskau ĉiuj ĉinoj povas parkere reciti

la jenajn fragmentojn: “Se vi lernas ion kaj konstante metas ĝin en praktikon, ĉu tio ne estas plezuro?” “Se vi havas amikojn venintajn de malproksime, ĉu tio ne estas ĝojo?” “Se, ne alte ŝatata de aliaj, vi ne sentas malkontentecon, ĉu tio ne estas la kvalito propra al la noblulo?” “Kiam mi promenas kune kun du aliaj, mi certe havas mian instruiston inter ili.” “Mi elektos liajn bonajn kvalitojn por sekvi kaj liajn malbonajn kvalitojn por eviti.” “La tempo pasas kaj pasas, kiel la akvo en la rivero, kiu senĉese fluas tage kaj nokte!” “Kiam vi scias ion, diru, ke vi tion scias; kiam vi ne scias ion, konfesu, ke vi tion ne scias. Jen la vera sciado.” “Se mi povus aŭdi pri la vero en mateno, mi volonte mortus en tiu vespero.” Cetere, en la libro troviĝas ankaŭ anekdotoj kaj plastikaj priskriboj pri la mienoj de Konfuceo kaj liaj disĉipuloj dum konversacioj, pri la etoso de konversacioj kaj pri la karakteroj de personoj. Legante la libron ni povas vidi la figuron de Konfuceo. Li estis homo progresema, profundpensa, memfida, lernema, optimisma kaj grandanima. Li diris pri si mem, ke “li estas tia homo, kies fervoro por studado estas tiel forta, ke li eĉ forgesas manĝadon; kies ĝojo en serĉado de scioj estas tiel granda, ke li eĉ forgesas siajn ĉagrenojn kaj ne konscias, ke maljuna aĝo baldaŭ venos al li”. Zilu, unu el la plej proksimaj disĉipuloj de Konfuceo, estis homo kun karaktero malkaŝema, nefleksema kaj iom impertinenta, kaj Yan Yuan, alia proksima disĉipulo de Konfuceo, estis junulo lernema, pacama, kontenta en

malriĉeco kaj sindona al la doktrino, je kiu li sin tenis. Ankaŭ la aliaj personoj en la libro havas ĉiu sian propran karakteron.

La pensoj kaj instruoj de Konfuceo, kiuj ofte estas nomataj konfuceanismo, havas grandan influon sur la disvolviĝo de la ĉina kulturo. Konfuceanismo estis la reganta penso en Ĉinio dum pli ol 2000 jaroj. Ekde Han-dinastio (206 a.K.—220 p.K.) la feŭdaj regantoj de diversaj dinastioj honoris lin kiel “sanktan saĝulon”, donante al li la titolon “Plej Sankta Instruisto”. La libro «Analektoj de Konfuceo», en kiu estas registritaj liaj pensoj kaj instruoj, estas la plej grava verko de konfuceanismo. Ĝi longtempe servis kiel la ĉefa, por ĉiuj lernantoj deviga, lernolibro en la feŭdisma Ĉinio.

Jam en 1594 tiu ĉi verko estis tradukita de Matteo Ricci, itala misiisto, en la latinan lingvon. Tio estis la unua fremdlingva traduko de «Analektoj de Konfuceo». De tiam, precipe en tiu ĉi jarcento, aperis multaj fremdlingvaj tradukoj de tiu ĉi fama verko. Sed bedaŭrinde ĝis nun ne ekzistis ĝia Esperanta versio. Por kontentigi la esperantistan publikon, kiu ja deziras legi ĉinajn verkojn en Esperanto, nun mi prezentas al ĝi tiun ĉi mian tradukon.

Mi ekvolis traduki tiun ĉi mondfaman verkon en Esperanton jam en la komenco de mia esperantisteco. Mi konvinkigis, ke Esperanto multe profitos el la tradukado de tiu ĉi grava verko. Sed la malfacileco de la tradukado estis tiel timige granda, ke mi longatempe ne havis la kuraĝon komenci la

laboron. Pasis pli ol tridek jaroj. Nur antaŭ kvar jaroj, instigate de miaj amikoj, mi ekhavis la kuraĝon entrepreni la tradukadon.

Entreprenante tian laboron mi alfrontis du ĉefajn malfacilojn, kiujn mi devis ĉiel venki. Unue, ĉar la originalo estas skribita en la antikva ĉina lingvo, kiun nun konas nur fakuloj, kaj la stilo de la originalo estas treege lakona kun multaj subkomprenitaĵoj kaj ellasoj, tial, legante ĝin oni neeviteble povas de tempo al tempo renkonti malfacile kompreneblajn kaj dubajn lokojn. Tiaokaze mi devis konsulti fidindajn vortarojn kaj diversajn eldonojn de tiu ĉi verko kun komentarioj, por ĝuste kaj plene kompreni la originalan tekston. Due, pro la terure granda diferenco inter la strukturo de la ĉina klasika lingvo kaj tiu de Esperanto, kaj pro la kundensigiteco de saĝaj pensoj esprimitaj en formo de klasika koncizo de la originalo, aperigi tiun ĉi verkon en Esperanta vesto ja estas laboro ŝvitiga, kiu postulas ekstreman klopodon kaj grandan tradukistan lertecon. Ĉar ŝajnis al mi tre valora, elmeti nian karan lingvon kaj min mem al tiu ĉi severa provo, mi ne domaĝis la penon laboregi super la tradukado, penon, kiu ja estis ligita kun nemalgranda plezuro.

LA TRADUKINTO

ĈAPITRO I XUE ER¹

1. La Majstro² diris: “Se vi lernas ion kaj konstante metas ĝin en praktikon, ĉu tio ne estas plezuro? Se vi havas amikojn venintajn de malproksime, ĉu tio ne estas ĝojo? Se, ne alte ŝatata de aliaj, vi tamen ne sentas malkontentecon, ĉu tio ne estas kvalito propra al la nobluloj³?”

2. Majstro You⁴ diris: “Malmultaj estas tiuj, kiuj, ĉiam respektante siajn gepatrojn kaj pli aĝajn fratojn, inklinas ofendi siajn superulojn. Ekzistas neniu, kiu, ne inklinate ofendi siajn superulojn, emas fari malordon. La noblulo koncentras sian atenton al tio, kio estas fundamenta. Se la fundamento estas firmigita, estiĝas la doktrino. La respekto de filo al siaj gepatroj kaj la respekto de pli juna frato al siaj pli aĝaj — jen la fundamento de la homaj virtoj.”

3. La Majstro diris: “Mielaj vortoj kaj hipokrita mieno estas ne ligitaj kun vera virto.”

4. Majstro Zeng⁵ diris. “Ĉiun tagon mi ekzamenas min pri tri punktoj: en plenumo de iu afero por aliulo, ĉu mi jam faris mian plejblon? En miaj rilatoj kun miaj amikoj, ĉu mi kondukis sincere? Ĉu mi jam ellernis kaj praktikis tion, kion instruis al mi mia instruisto?”

5. La Majstro diris: “En regado de regno kun mil militĉaroj, la reganto devas tre serioze trakti la politikajn aferojn, bone teni siajn promesojn, malpliigi la

elspezojn, montri amon al siaj regatoj, kaj uzi popolajn laborfortojn nur en senokupa sezono de la faro.”

6. La Majstro diris: “Juna homo devas respekti siajn gepatrojn hejme kaj siajn pliaĝulojn ekstere. Li devas montri amon al ĉiuj kaj intimiĝi kun homoj virtaj. Se restas al li ankoraŭ energio post plenumo de ĉi tiuj aferoj, li devas studi kulturajn sciojn.”

7. Zixia⁶ diris: “Se homo preferas la virton al la beleco; se, en servado al siaj gepatroj, li povas fari sian plejblon; se, en servado al la princo⁷, li povas dediĉi sian vivon; se, en la rilatoj kun liaj amikoj, liaj vortoj estas sinceraj; tiam, kvankam oni diras, ke li ne faris lernadon, tamen, mi diras, ke li jam ĝin faris.”

8. La Majstro diris: “Se la noblulo ne estas serioza, li ne estas digna kaj ne povas firmigi tion, kion li ellernis. Tenu fidelecon kaj sincerecon kiel unuajn principojn. Ne amikiĝu kun tiuj, kiuj estas malpli bonaj ol vi. Kaj se vi faris erarojn, ne timu ilin korekti.”

9. Majstro Zeng⁵ diris: “Se estas zorge plenumitaj la funebraj ritoj al la mortintaj gepatroj kaj estas pie farataj la oferadoj al la prapatroj, tiam la popolo estos kondukita al virtemo kaj bonmoreco.”

10. Ziqin⁸ faris demandon al Zigong⁹, dirante: “Kiam nia Majstro venas en iun ajn alian regnon, li nepre aŭdas ĉion pri ĝia regado. Ĉu li mem elpetas la informojn aŭ oni propravole liveras ilin al li?” Zigong respondis: “Nia Majstro estas milda, bonkora, humila, modera kaj modesta, kaj tiel li akiras al si informojn. Lia

maniero informiĝi ja diferencas de tiu de aliaj, ĉu ne?”

11. La Majstro diris: “Dum ankoraŭ vivas la patro, observu la intencojn de la filo. Post la morto de lia patro, observu liajn agojn. Se en la daŭro de tri jaroj li ne deflankiĝas de la vojo irita de sia patro, li povas esti nomata fidela filo.”

12. Majstro You⁴ diris: “En la praktikado de la decreguloj plej valoras la modereco. En ĝi kuŝas la laŭdindeco de la regadmanieroj de la antikvaj reĝoj, kaj tial en plenumado de aferoj, bagatelaj kaj gravaj, ni devas sekvi ilian ekzemplon. Tamen la modereco ne devas esti observata en ĉiuj okazoj. Se iu, sciante ĝian valorecon, observu ĝin sen ĝin reguligi per la decreguloj, tio do ne estas praktikebla.”

13. Majstro You diris: “Kiam interkonsento atingita konformiĝas al la justeco, la vortoj diritaj estas plenumebaj. Kiam respekto montrita konformiĝas al la deco, oni estas malproksima de honto kaj malhonoro. Kiam la homoj, sur kiuj iu sin apogas, estas al li intimaj, li povas fari ilin siaj gvidantoj.”

14. La Majstro diris: “Tiu, kiu celas esti homo de perfekta virto, ne serĉas plezuron ĉe manĝotablo, nek komforton en sia loĝejo. Li estas rapida en agoj kaj singarda en parolo. Li ofte kunestas kun tiuj, kiuj posedas la Principon, por ke li povu esti korektita — tia homo ja povas esti nomata lernemulo.”

15. Zigong⁹ diris: “Kiel vi juĝas pri la malriĉulo, kiu ne flatas, kaj pri la riĉulo, kiu ne arogantas?” La Majstro respondis: “Ili estas bonaj; sed ili ne estas egalaj

al tiu, kiu kvankam malriĉa, vivas en ĝojo, nek al tiu, kiu, kvankam riĉa, bone observas la deĉregulojn.”

Zigong diris: “En «Libro de Poezio»¹⁰ estas dirite, ‘kiel oni tranĉas oston kaj poste glatigas ĝin per fajlilo, kiel oni skulptas jadon kaj poste poluras ĝin’. Mi pensas, ke tio estas la sama, ĉu ne?” La Majstro diris: “Ĉi¹¹, nun mi jam povas komenci paroli kun vi pri la Poemoj. Mi diras al vi unu punkton, kaj vi povas el ĝi kompreni alian.”

16. La Majstro diris: “Min afliktas ne tio, ke aliaj min ne komprenas, sed tio, ke mi ilin ne komprenas.”

ĈAPITRO II WEI ZHENG

1. La Majstro diris: “Kiu regas per la forto de sia virto, povas esti komparata kun la Norda Stelo, kiu ĉiam restas en loko, dum ĉiuj aliaj steloj iras ĉirkaŭ ĝi.”

2. La Majstro diris: “En 《Libro de Poezio》¹⁰ legiĝas cent poemoj, sed ili ĉiuj povas esti resumitaj per unu frazo — ‘Ne havu malvirtan ideon’”

3. La Majstro diris: “Se vi gvidos la popolon per leĝoj kaj gardos la ordon inter ili per punoj, ili detenos sin de malbonoj sen scii la hontosenton. Se vi gvidos ilin per la forto de la virto kaj gardos la ordon inter ili per la decreguloj, ili havos la hontosenton kaj memvole korektos siajn erarojn.”

4. La Majstro diris: “En la dekkvina jaro mi inklinigis mian tutan koron al lernado. En la trideka mi jam firme staris inter homo. En la kvardeka mi ne plu havis dubojn. En la kvindeka mi jam konis la volon de Ĉielo. En la sesdeka miaj oreloj fariĝis kapablaj por percepti la veron. En la sepdeka mi povis sekvi la deziron de mia koro sen malobservi ĉiajn regulojn.”

5. Meng Yi¹² demandis pri la fila devo. La Majstro diris: “Ne malobeu la decon!”

Kiam Fan Chi¹³ kondukis kaleŝon por la Majstro, tiu diris al Fan: “Mensun¹⁴ demandis min pri la fila devo kaj mi respondis al li: ‘Ne malobeu la decon!’” Fan Chi demandis: “Kion vi volas diri per tio?” La Majstro klarigis: “Dum vivas la gepatroj, servu ilin laŭ la deco. Post kiam ili mortis, enterigu ilin laŭ la deco kaj faru

oferadojn al ili laŭ la deco.”

6. Meng Wu¹⁵ demandis pri la fila devo. La Majstro respondis: “Konduku tiamaniere, ke viaj gepatroj maltrankvilas pri nenio koncerne vin, escepte pri via malsano.”

7. Ziyou¹⁶ demandis pri la fila devo. La Majstro respondis: “En la nuna tempo la fila devo signifas nur la vivtenadon al la gepatroj. Sed eĉ hundoj kaj ĉevaloj povas esti same bone prizorgataj. Se oni ne montras respekton al siaj gepatroj, kie do kuŝas la diferenco inter vivteno de la gepatroj kaj bredado de tiuj bestoj?”

8. Zixia⁶ demandis pri la fila devo. La Majstro respondis: “Estas malfacile por filo ĉiam havi afablan mienon antaŭ la gepatroj. Ĉu la fila devo signifas nur tion, ke oni prenas sur sin penigan laboron, kiam io estas farena, aŭ proponas vinon kaj manĝaĵojn al siaj gepatroj?”

9. La Majstro diris: “Mi parolis kun Hui¹⁷ tutan tagon, kaj li prezentis nenian kontraŭan opinion al ĉiuj miaj vortoj, kvazaŭ li estus stulta. Li retiriĝis, kaj mi ekzamenis lian konduton sen lia scio kaj trovis, ke li povas ilustrati miajn instruojn. Hui! — Li ne estas stulta.”

10. La Majstro diris: “Por koni la amikojn, observu la rimedojn, per kiuj li penas atingi siajn celojn, ekzamenu, kio povas lin kontentigi. Kaj tiam, kiel li povus kaŝi sian karakteron! Kiel li povus kaŝi sian karakteron!”

11. La Majstro diris: “Se oni akiras novajn sciojn,

relernante tion, kion ili jam lernis, ili do povos esti instruanto de aliaj.”

12. La Majstro diris: “La klera noblulo ne estas vazo.”¹⁸

13. Zigong⁹ demandis, kia devas esti la noblulo. La Majstro respondis: “Li agas, antaŭ ol paroli, kaj poste parolas laŭ siaj agoj.”

14. La Majstro diris: “La noblulo estas senpartia kaj faras nenian komploton. La malgranda homo¹⁹ estas kaj partia kaj komplotema.”

15. La Majstro diris: “Kiu lernas sen pripensado, tiu facile trompiĝas. Kiu pripensas sen lernado, tiu daŭre estas en dubo.”

16. La Majstro diris: “La studado de herezaj doktrinoj estas la kaŭzo de malfeliĉoj.”

17. La Majstro diris: “You²⁰, mi do instruu al vi, kio estas la sciado. Kiam vi scias ion, diru, ke vi tion scias; kiam vi ne scias ion, konfesu, ke vi tion ne scias. Jen la vera sciado.”

18. Zizhang²¹ petis opinion pri altrangiĝo kun bona salajro. La Majstro diris: “Aŭskultu multe, sed silentu pri dubaj aferoj kaj estu singarda en parolo pri la cetero; tiam vi malofte falos en eraron. Rigardu multe, sed silentu pri tio, kio estas duba, kaj estu singarda en agado super la cetero; tiam vi malofte havos penton. Kiu malofte eraras en siaj paroloj kaj malofte pentas pri siaj agoj, tiu certe estos rekompencita per alta rango kaj bona salajro.”

19. La princo Ai²² demandis: “Kion do mi faru, por ke la popolo volonte submetiĝu al mi?” Konfuceo respondis: “Promociu homojn honestajn kaj postenigu ilin super la malhonestaj, tiam la popolo volonte sin submetos al vi. Promociu homojn malhonestajn kaj postenigu ilin super la honestaj, tiam la popolo ne sin submetos al vi.”

20. Ji Kang²³ demandis: “Kion do mi faru, por ke la popolo povu esti respektama kaj lojala al mi kaj esti instigate sekvi la vojon de virto?” La Majstro diris: “Estu serioza en ilia alesto, tiam ili estos respektamaj. Estu obeema al viaj gepatroj kaj afabla al viaj subuloj, tiam ili estos lojalaj. Promociu la homojn bonajn kaj instru la malpli kompetentajn, tiam ili estos instigataj sekvi la vojon de virto.”

21. Iu diris al Konfuceo: “Kial vi ne okupiĝas pri registaraj aferoj?” La Majstro diris: “Estas dirite en 《Libro de Historio》²⁴: ‘Estu fidela filo kaj plenumu viajn fratecajn devojn, tiam vi per via ekzemplo influos la registaron.’ Ankaŭ tio ĉi povas esti rigardata kiel ‘okupiĝi pri registaraj aferoj’. Kial do oni nepre devas teni ian oficon en la registaro?”

22. La Majstro diris: “Mi ne scias, kiel la homo sen fideleco povas esti taŭga por io. Kiel do la bovĉaro aŭ ĉevalĉaro povas esti veturigata sen la transversa lignopeco por jungo de la tirbestoj?”

23. Zizhang²¹ demandis, ĉu la ritario post dek generacioj povas esti antaŭsciata? La Majstro respondis:

“Mi scias, en kiaj manieroj Yin-dinastio²⁵ modifis la ritaron, kiam ĝi heredis ĝin de Xia-dinastio²⁶. Ni scias, en kiaj manieroj Zhou-dinastio²⁷ modifis la ritaron, kiam ĝi heredis ĝin de Yin-dinastio. Kaj tial ni povas antaŭscii, kia estos la ritaro de la postvenontoj post Zhou-dinastio, eĉ se ĝi aperos post cent generacioj.”

24. La Majstro diris: “Estas flato fari oferadon al la spirito de mortinto, kiu ne apartenas al via famiĥo. Estas malkuraĝo rifuzi fari tion, kio estas justa.”

ĈAPITRO III BA YI

1. Parolante pri la ĉefo de Ji-familio²⁸, Konfuceo diris: “Li ordonis al ok vicoj da personoj²⁹ muziki kaj danci en lia korto. Se tion ĉi li aŭdacis fari, kion alian li ne aŭdacas?”

2. La tri familioj³⁰ uzis la odon Yong³¹ tiam, kiam la oferaĵoj estis forprenataj ĉe la fino de la oferceremonio. La Majstro diris; “La princoj helpas ĉe la oferado; la filo de Ĉiel’ solenaspektas.”³² — En kia senco do la du versoj estis kantataj en la haloj de la tri familioj?”

3. La Majstro diris: “Kiel la homo senvirta povus agi laŭ la decreguloj? Kiel la homo senvirta povus ami la muzikon?”

4. Lin Fang³³ demandis pri la esenco de la ceremonioj. La Majstro diris: “Granda estas via demando! En festaj ceremonioj ŝparo estas preferinda al malŝparo. En funebraj ceremonioj profunda malĝojo estas preferinda ol atento al ĉiuj detaloj de la eksteraj formoj.”

5. La Majstro diris: “Kvankam la sovaĝaj triboj de la oriento kaj nordo havas siajn estrojn, tamen ili estas malpli bonaj ol la regnoj de nia granda lando, eĉ se tiuj ne havus siajn suverenojn.”

6. La ĉefo de Ji-familio²⁸ volis iri por fari oferadon al la monto Tai³⁴. La Majstro diris al Ran You³⁵: “Ĉu vi ne povas deadmoni lin de tia ago?” Li respondis: “Mi ne

povas.” La Majstro diris: “Ho ve! Ĉu oni povas eĉ diri, ke la dio de la monto Tai ne estas tiel ceremoni-scia, kiel Lin Fane?”

7. La Majstro diris: “La nobluloj ne konkuras. Se ili ne povas eviti konkuron, ĝi okazas nur en la arkapafado. Sed eĉ tiaokaze ili salutas sin reciproke, antaŭ ol iri al la pafejo, kaj trinkas vinon post la pafado. Do eĉ dum sia konkurado ili restas nobluloj.”

8. Zixia⁶ demandis: “Kion signifas la versoj: ‘Kiel bela la vizzaĝ’ kun ridkavetoj! Kiel ĉarmaj la okuloj blankaj-nigraj!’ ‘La pure blanka fon’ por la koloroj buntaj’³⁶?” La Majstro diris: “La pentrado sekvas la preparon de la blanka fono.”

Zixia demandis: “Ĉu do ceremonioj estas afero, kiu sekvas la virton kaj justecon?” La Majstro diris: “Estas Shang³⁷, kiu kapablas elvolvi mian ideon. Nun mi povas ekparoli kun vi pri la Poemoj³⁸.”

9. La Majstro diris: “La ceremoniojn de Xia-dinastio²⁶ mi povas priskribi, sed Qi-regno, kie regas la posteuloj de Xia, ne povas liveri sufiĉan ateston al miaj vortoj. La ceremoniojn de Yin-dinastio²⁵ mi povas priskribi, sed Song-regno, kie regas la posteuloj de Yin, ne povas liveri sufiĉan ateston al miaj vortoj. Ili ne povas tion fari, ĉar en la du regnoj mankas sufiĉaj dokumentoj kaj historio-konantaj saĝuloj. Se tiaj estus sufiĉaj, mi povus citi ilin kiel apogon por miaj vortoj.”

10. La Majstro diris: “Ĉe la Granda Oferado³⁹, post la unua oferferŝo de vino, mi jam ne volas plu spekti.”

11. Iu demandis pri la signifo de la Granda Oferado. La Majstro respondis: “Mi ne scias. Kiu sciuz ĝian signifon, tiu povus trovi la regadon de la imperio tiel facila, kiel meto de io ĉi tien.”⁴⁰ Tion dirante, li fingromontris sian manplaton.

12. La Majstro faris oferadon al siaj prapatroj, kvazaŭ ili alestus. Li faris oferadon al dioj, kvazaŭ ili alestus. La Majstro diris: “Se mi ne povas persone ĉeesti la oferadon, tio estas kvazaŭ okazus nenia oferado.”

13. Wangsun Jia⁴¹ demandis pri la signifo de la popoldiro “Prefere flatu la dion de la kuirforno, ol la dion de la sudokcidenta angulo de la domo⁴²”. La Majstro diris: “Ĝi ne estas ĝusta. Al tiu, kiu ofendas Ĉielon, preĝoj neniel helpas.”

14. La Majstro diris: “La ritaro de Zhou-dinastio²⁷ estis starigita surbaze de tiu de la du antaŭaj dinastioj⁴³. Kiel kompleta kaj eleganta ĝi estas! Mi sekvas la ritaron de Zhou.”

15. Enirinte Grandan Templon⁴⁴, la Majstro demandis pri ĉiu afero tiea. Iu diris: “Kiel oni povas diri, ke la filo de la Zou-ano⁴⁵ konas la decregulojn! Li eniris en Grandan Templon kaj demandis pri ĉiu afero tiea.” Aŭdinte tion, la Majstro diris: “Ĝuste tio estas decregulo.”

16. La Majstro diris: “En arkpafado de rita ceremonio ne estas necese trapafi la ledan celtabulon, ĉar ne ĉiu havas egalan forton. Tio ĉi estas regulo el la antikveco.”

17. Zigong⁹ intencis ne uzi kapron kiel viktimon ĉe la oferado al la prapatroj okazigata en la unua tago de ĉiu monato. La Majstro diris: “Ci¹¹, vi amas la kapron; mi amas la ceremonion.”

18. La Majstro diris : “La plena observado de la decreguloj en servado al la suvereno estas kalkulata de aliaj homoj kiel flato.”

19. La princo Ding⁴⁶ demandis: “Kiel la suvereno devas uzi siajn korteganojn kaj kiel tiuj devas servi sian suverenon?” Konfuceo respondis: “La suvereno devas uzi siajn korteganojn laŭ la decreguloj dum la korteganoj devas servi sian suverenon kun fideleco.”

20. La Majstro diris: “La poemo Guan Ju⁴⁷ esprimas ĝojon sen malĉasteco kaj malĝojon sen korŝiro.”

21. La princo Ai²² demandis Zai Wo⁴⁸ pri la altaroj de la terdio. Zai Wo respondis: “Ili estis faritaj el pina ligno en Xia-dinastio²⁶, el la cipresa en Yin-dinastio²⁵ kaj el la kaŝtanarba en Zhou-dinastio²⁷. La kaŝtanarba ligno laŭkrede havis la efikon timtremigi la popolon.” Aŭdinte pri tio, la Majstro diris al Zai Wo: “Pri tio, kio estas farita, ne estas necese paroli; de tio, kio estas jam en sia irado, ne estas necese deadmoni; al tio, kio estas pasinta, ne estas necese fari riproĉon.”

22. La Majstro diris: “Malgrandanima ja estis Guan Zhong⁴⁹!” Iu demandis: “Ĉu Guan Zhong estis ŝparema?” “Guan,” respondis la Majstro, “havis sian privatan tenejon, en kiu amasiĝis mono, kaj el liaj

subuloj neniŭ plenumis duoblan oficon. Kiel do li povas esti kalkulata kiel ŝparema?”

“Do, ĉu Guan Zhong konis la decregulojn?” La Majstro respondis: “La princoj de regnoj havas ĉiu ekranmuron kontraŭ sia pordego; ankaŭ Guan havis tian muron. La princoj de regnoj havas ĉiu en sia halo meblon uzatan por surmeti pokalojn dum akcepto de aliregna princo; ankaŭ Guan havis tian meblon. Se Guan konis la decregulojn, kiu do ilin ne konas?”

23. Parolante pri muziko kun la Granda Muzik-majstro de Lu-regno, la Majstro diris: “Estas konebla la muzikludado. La muzikpeco komenciĝas per forta unisono. Baldaŭ la tono fariĝas pure harmonia, klara, kontinue flua kaj tiel venas al la fino.”

24. La landlima gardisto en Yi⁵⁰ petis la permeson viziti la Majstron, dirante: “Kiam homoj de alta virto venis ĉi tien, mi neniam estis senigita je la privilegio ilin vidi.” La disĉiploj, kiuj tiam sekvis Konfuceon, alkondukis lin al sia Majstro. Elirinte post la vizito, la homo diris al la disĉiploj: “Miaj amikoj, kial vi malĝojas pri tio, ke via Majstro perdis sian oficon? La reĝlando jam estas longe sen la principoj de vero kaj justeco. Ĉielo certe faros vian Majstron kvazaŭ sonorilo kun ligna lango⁵¹.”

25. Parolante pri la muzikpeco Shao⁵², la Majstro diris: “Ĝi estas perfekte bela kaj ankaŭ perfekte bona. Sed pri la muzikpeco Wu⁵³ li diris: “Ĝi estas perfekte bela, sed ne perfekte bona.”

26. La Majstro diris: “Altaj postenoj okupataj sen grandanimeco; ceremonioj plenumataj sen respekto; funebraĵoj kondukataj sen malĝojo — jen estas la aferoj, kiujn mi ne toleras!”

ĈAPITRO III LI REN

1. La Majstro diris: “Loĝi inter virtuloj estas bela afero. Se homo elektas por si loĝejon tie, kie ne estas virtuloj, kiel li povus esti rigardata kiel saĝulo?”

2. La Majstro diris: “Tiuj, kiuj ne havas virton, ne povas longe resti en mizero, nek en komforto. La virtuloj kontentiĝas per la virto kaj la saĝuloj agas laŭ la virto.”

3. La Majstro diris: “Nur la virtuloj povas scii, kiajn homojn oni devas ami kaj kiajn malami.”

4. La Majstro diris: “Se iu prenos la decidon sekvi la virton, tio alportos al li nenian malbonon.”

5. La Majstro diris: “Riĉeco kaj alta rango estas tio, kion ĉiu deziras; sed se ili ne estas akiritaj per decaj rimedoj, oni preferas ilin rezigni. Malriĉeco kaj malnobleco estas tio, kion ĉiu abomenas; sed se ili ne estas forigitaj per decaj rimedoj, oni ilin ne evitas. Se la nobluloj forlasas la virton, kiel ili povas akiri sian bonan renomon? La nobluloj ne deflankiĝas, eĉ unu momenton, de la vojo de virto. Ili estas ĉiam kun la virto, eĉ kiam ili estas en hasto aŭ en malespera vagado.”

6. La Majstro diris: “Mi neniam vidis homon, kiu amas la virton, nek homon, kiu malamas malvirton. Tiu, kiu amas la virton, rigardas ĝin kiel ion plej altan. Tiu, kiu malamas malvirton, praktikas la virton tiamaniere, ke li ne permesas al io ajn malvirta tuŝi lin mem. Ĉu

ekzistas iu, kiu povas iam dediĉi sian forton al la virto? Mi ankoraŭ neniam vidis homon, kiu havas nesufiĉan forton. Eble tia homo ekzistas, sed mi lin ne vidis.”

7. La Majstro diris: “La eraroj de homoj estas karakterizaj. Observante erarojn de iu, oni povas ekscii, kia homo li estas.”

8. La Majstro diris: “Se mi aŭdus pri la vero en la mateno, mi volonte mortus en la vespero.”

9. La Majstro diris: “Ne valoras fari diskuton kun klerulo, kiu, sin dediĉante al la vero, hontas porti eluzitajn vestojn kaj manĝi krudajn manĝaĵojn.”

10. La Majstro diris: “La sintenado de la noblulo kontraŭ la mondo estas tia, ke li montras nenian preferon, nek malpreferon. Li sekvas nur tion, kio estas justa.”

11. La Majstro diris: “La noblulo pensas pri la virto; la malgranda homo pensas pri kampoj. La noblulo pensas pri leĝoj; la malgranda homo pensas pri riceveblaj favoroj.”

12. La Majstro diris: “Tiu, kies agoj celas proprajn profitojn, kaŭzos kontraŭ si multajn plendojn.”

13. La Majstro diris: “Ĉu la princo povas regi sian regnon per la komplezeco propra al la decreguloj? Kian malfacilon tio prezentas? Se li ne povas tion fari, kiel do li povas sekvi la decregulojn?”

14. La Majstro diris: “Mi ne estas maltrankvila pri tio, ke mi ne okupas ian postenon; mi zorgas nur pri tio, kiel mi povas fari min taŭga por la posteno. Mi ne estas

maltrankvila pri tio, ke oni ne ŝatas min; mi penas nur esti inda, ke oni min ŝatu.”

15. La Majstro diris: “Shen⁵⁴! Mia doktrino havas unu fadenon, kiu kuras tra ĝi.” La disĉiplo Zeng⁵⁶ respondis: “vi pravas.”

La Majstro eliris, kaj la aliaj disĉiploj demandis: “Kion li volas diri per tio?” Zeng diris: “La doktrino de nia Majstro estas nur fideleco kaj indulgemo.”

16. La Majstro diris: “La nobluloj scias, kio estas justa; la malgrandaj homoj scias, kio estas profitodona.”

17. La Majstro diris: “Kiam vi vidas homon bonan, pensu pri egaligo al li; kiam vi vidas homon nebonan, faru al vi memekzamenon.”

18. La Majstro diris: “En servado al siaj gepatroj filo devas milde deadmoni ilin de nebona ago. Kiam li vidas, ke ili ne inklinas sekvi lian konsilon, li ne devas malpliigi sian respekton, nek ofendi ilin. Li povas malĝoji en si, sed ne devas havi malpardonemon kontraŭ ili.”

19. La Majstro diris: “Dum la gepatroj vivas, la filo ne devas vojaĝi malproksimen. Se al li nepre necesas vojaĝi, la vojaĝo devas havi fiksan celitan lokon.”

20. La Majstro diris: “Se en la daŭro de tri jaroj la filo ne deflankiĝas de la vojo irita de sia patro, li povas esti nomata fidela filo.”

21. La Majstro diris: “La agoj de la gepatroj ne povas ne esti tenataj en la memoro de la filo. Unuflanke, ili estas fonto de ĝojo; aliflanke ili estas fonto de timo.”

22. La Majstro diris: “La kaŭzo, kial la antikvuloj hezitis eldiri siajn vortojn, estis ke ili timis, ke ili povos suferi honton, se iliaj agoj ne sukcesos sekvi iliajn vortojn.”

23. La Majstro diris: “Kiu tenas sin interne de la limoj de la dereguloj, tiu malofte eraras.”

24. La Majstro diris: “La nobluloj devas esti malrapidaj en parolo kaj rapidaj en agoj.”

25. La Majstro diris: “La virtuloj neniam vivas en izoliteco. Ili certe ĉiam havas najbarojn.”

26. Ziyou¹⁶ diris: “En servado al la suvereno tro oftaj admonoj kondukas al malhonoro. Inter amikoj tro oftaj admonoj malintimigas la amikecon.”

ĈAPITRO V GONGYE CHANG

1. Parolante pri Gongye Chang⁵⁶, la Majstro diris: “Li povus esti edzigita. Kvankam li iam estis en malliberejo, tamen tio ne estis lia kulpo.” Li do edzinigis sian filinon al Gongye.

2. Parolante pri Nan Rong⁵⁷, la Majstro diris: “Kiam la lando estis en bona ordo li ne estis deoficigita kaj kiam la lando estis malbone regata, li evitis punon kaj malhonoron.” Li do edzinigis al li la filinon de sia pli aĝa frato.

3. Parolante pri Zijian⁵⁸, la Majstro diris: “Tiu ĉi homo ja estas virta! Se en Lu-regno ne ekzistus virtuloj, de kie li povus akiri tiajn bonajn kvalitojn?”

4. Zigong demandis: “Kion vi diras pri mi?” La Majstro diris: “Vi estas vazo.” “Kia vazo do?” “Jada vazo uzata dum oferado⁵⁹.”

5. Iu diris: “Yong⁶⁰ estas perfekte virta, sed li ne estas dotita per elokventeco.” La Majstro diris: “Kial do necesus la elokventeco? Akralanga parolo ofte elvokas abomenon ĉe aŭskultantoj. Mi ne scias, ĉu li estas perfekte virta, sed kial do necesus al li la elokventeco?”

6. La Majstro diris al Qidiao Kai⁶¹, ke li fariĝu ŝtatoficisto. Tiu respondis: “Mi ankoraŭ ne estas memfida pri tio ĉi.” Aŭdinte tion, la Majstro ekĝojis.

7. La Majstro diris: “Se oni ne sekvos mian doktrinon, mi vojaĝos per flosa trans la maron, kaj tiam eble nur You²⁰ volos min akompani.” Aŭdinte tion,

Zilu⁶² ĝojiĝis. La Majstro diris: “You, via braveco estas pli granda ol la rnia, sed vi ne bone uzas vian juĝkapablon.”

8. Meng Wu¹⁵ demandis, ĉu Zilu estas perfekte virta. La Majstro diris: “Mi ne scias.” Li refoje demandis, kaj tiam la Majstro respondis: “En regno kun mil militĉaroj oni povus fari lin ministro pri militaj aŭ aliaj regnaj aferoj, sed mi ne scias, ĉu li estas perfekte virta.”

“Kaj kiel vi opinias pri Ran Qiu⁶³?” La Majstro respondis: “En urbo el mil familioj oni povus fari lin la reganto, aŭ en la domo de feŭdulo posedanta cent militĉarojn oni povus fari lin la intendanto, sed mi ne scias, ĉu li estas perfekte virta.”

“Kiel do vi opinias pri Chi⁶⁴?” La Majstro respondis: “Starante en ceremonia vesto en princa palaco, li povus esti komisiita akcepti alilandajn gastojn, sed mi ne scias, ĉu li estas perfekte virta.”

9. La Majstro diris al Zigong⁹: “Kiu laŭ vi estas pli kapabla, vi aŭ Hui¹⁷?” Zigong respondis: “Kiel mi kuraĝas kompari min kun Hui¹⁷? Instruite pri unu afero, li kapablas dedukti dek aliajn, dum mi kapablas nur du.” La Majstro diris: “Vi ne egalas lin. Mi konsentas kun vi, vi ne egalas lin.”

10. Zai Yu⁶⁵ dormis tage. La Majstro diris: “Putra lingo ne estas skulptebla, muro el malpura tero ne indas truladon. Tiu ĉi Yu! — Kian utilon alportus al li mia admono?”

La Majstro diris: “Antaŭe mia maniero trakti aliajn estis aŭskulti iliajn vortojn kaj meti mian fidon sur iliajn agojn. Nun mia maniero estas aŭskulti iliajn vortojn kaj observi iliajn agojn. Estis Yu, kiu igis min fari tiun ĉi ŝanĝon.”

11. La Majstro diris: “Mi neniam vidis homon kun karaktero nefleksebla.” Iu respondis: “Shen Cheng⁶⁶ estas tia homo.” “Cheng,” diris la Majstro, “havas tro multajn dezirojn. Kiel do li povas esti kalkulata kiel homo nefleksebla?”

12. Zigong⁹ diris: “Kion mi ne deziras, ke aliaj faru al mi, tion mi ne deziras fari al aliaj.” La Majstro diris: “Ci¹¹, tion ĉi vi ne povas atingi.”

13. Zigong diris: “La instruoj de nia Majstro pri lia doktrino estas aŭdeblaj; liaj instruoj pri la homa naturo kaj la volo de ĉielo ne estas aŭdeblaj.”

14. Zilu⁶² ne deziras ion novan antaŭ ol praktiki la malnovan.

15. Zigong demandis: “Kial Kong Wen⁶⁷ ricevis postmortem la titolon Wen?” La Majstro respondis: “Li estis inteligenta kaj lernema, tiel lernema, ke li ne hontis demandi eĉ siajn subulojn pri tio, kion li ne scias. — Jen kial li estis titolita per Wen.”

16. Parolante pri Zichan⁶⁸, la Majstro diris: “Li havis kvar kvalitojn de noblulo; en sia konduto li estis humila; en servado al siaj superuloj li estis respektema; en nutrado de la popolo li estis bonkora; en ordonado al la popolo li estis justa.”

17. La Majstro diris: “Yan Pingzhong⁶⁹ sciis kiel bone teni sian amikecon al aliaj. Ju pli longe oni amikis kun li, des pli profunde oni respektis lin.”

18. La Majstro diris: “Zang Wenzhong⁶⁹ tenis grandan testudon en speciala domo, kies kolonoj havis montet-formajn kapiteleojn, kun pentraĵoj de herboj kaj floroj sur la mallongaj kolonetoj super la traboj subtenantaj la ĉevronojn. — Kiel li povis esti tiel ‘saĝa’?”⁷¹

19. Zizhang²¹ demandis: “Kiam Ziwen⁷² estis trifoje nomumita ĉefministro de Chu-regno, li ne havis ĝojan mienon. Kiam li estis trifoje deoficigita, li ne havis koleretan mienon. Ĉiun fojon, kiam li forlasis sian postenon, li nepre donis detalajn klarigojn al la nova ĉefministro pri ĉiuj aferoj koncernantaj la postenon. Kian opinion vi havas pri li?” La Majstro respondis: “Li estis lojala.” “Ĉu li estis perfekte virta?” “Mi ne scias. Kiel do tio povus esti kalkulata kiel perfekta virto?”

Zizhang ree demandis: “Kiam la granda oficisto⁷³ Cui⁷⁴ ribele mortigis la regnestron de Qi, Chen Wen⁷⁵, kvankam li estis la posedanto de kvardek ĉevaloj, forlasis ilin kaj foriris el sia regno. Veninte en alian regnon, li diris: ‘Ĉi tie la regantoj estas tiaj, kia nia Cui estas’, kaj foriris el ĝi. Li alvenis en ankoraŭ alian regnon kaj kun la sama diro foriris ankaŭ el ĝi. — Kian opinion vi havas pri li?” La Majstro respondis: “Li estis morale senmakula.” “Ĉu li estis perfekte virta?”

“Mi ne scias. Kiel do tio povus esti kalkulata kiel perfekta virto?”

20. Ji Wen⁷⁶ agis nur post trifoja pensado. Aŭdinte pri tio, la Majstro diris: “Du fojoj sufiĉus.”

21. La Majstro diris: “Kiam en la regno regis bona ordo, Ning Wu⁷⁷ estis saĝa. Kiam la regno estis en malordo, li ŝajnis sin malsaĝa. Lia saĝeco estas atingebla por aliaj, sed lia ŝajnigo de malsaĝeco ne.”

22. Kiam la Majstro estis en Chen-regno, li diris: “Lasu min reniri! Lasu min reniri! La lernantoj en mia hejmloko havas altan ambicion kaj brilan beletran talenton, sed ili ne scias kiel sin pritajli.”

23. La Majstro diris: “Boyi kaj Shuqi⁷⁸ estis pardonemaj al siaj ofendintoj, sekve tre malmultaj estis tiuj, kiuj havis malpardonemon kontraŭ ili.”

24. La Majstro diris: “Kiu diras, ke Weisheng Gao⁷⁹ estas verdirema? Foje oni petis iom da vinagro de li, li elpetis tion de sia najbaro kaj donis ĝin al la petanto.”

25. La Majstro diris: “Mielaj vortoj, hipokrita mieno kaj troa respekto estis rigardataj de Zuoqiu Ming⁸⁰ kiel hontindaĵoj. Ankaŭ mi tiel opinias. Kaŝi sian malkontenton kontraŭ iu sed ŝajnigi sin amika al li estis rigardata de Zuoqiu Ming kiel hontindaĵo. Ankaŭ mi tiel opinias.”

26. Foje, kiam la Majstro sidis kaj Yan Yuan⁸¹ kaj Jilu⁸² staris apude, li diris al ili: “Kial vi ne diru vian aspiron?”

Zilu⁸² diris: “Mi volus, se mi havus ĉarojn, ĉevalojn kaj peltaĵojn, dividi la uzon de ili kun miaj amikoj kaj, eĉ se ili eluziĝus, mi ne sentus bedaŭron.”

Yan Yuan diris: “Mi volus ne fanfaroni pri miaj bonaj kvalitoj, nek elmontri miajn meritojn.”

Zilu do diris: “Ni deziras, Majstro, aŭdi vian aspiro.”

La Majstro diris: “Mia aspiro estas, ke la maljunuloj vivu pace kaj komforte, amikoj havu fidon unu al alia kaj la junaj homoj estu bone prizorgataj.”

27. La Majstro diris: “Ba ! Mi neniam vidis homon, kiu povus konscii siajn proprajn kulpojn kaj sin akuzi en si.”

28. La Majstro diris: “En dekfamilia vilaĝeto vi certe trovos iun, kiu estas honesta kaj sincera kiel mi, sed mi dubas, ĉu vi povus trovi iun, kiu estus same lernema kiel mi.”

ĈAPITRO VI YONG YE

1. La Majstro diris: “Koncerne Yong⁶⁰, li povus okupi gravan postenon.”

2. Zhonggong⁸³ demandis pri Zisang Bozi⁸⁴. La Majstro diris: “Laŭdinda estas lia simpligo de la formalajtoj.”

Zhonggong diris: “Se oni regas la popolon per seriozeco kaj samtempe per simpligo de la formalajtoj, ĉu tio ne estas aprobinda? Sed se oni simpligas la formalajtojn nur pro la simpligo mem, ĉu tio ne estas troa simpligo? ” La Majstro diris: “Vi estas prava.”

3. La princo Ai²² demandis Konfuceon: “Kiu el viaj disĉiploj estas la plej lernema?” La Majstro respondis: “Yan Hui⁸⁵ estis la plej lernema. Li ne verŝis sian koleron sur aliajn. Li ne ripetis eraron. Malfeliĉe, lia vivo estis mallonga kaj li mortis. Kaj nun la simila homo ne troviĝas. Mi neniam aŭdis pri iu alia, kiu estus tiel lernema, kiel li.”

4. Post kiam Zihu⁸⁶ estis sendita kun komisio al Qi-regno, la disĉiplo Ran Qiu⁶³ petis grenon por lia patrino. La Majstro diris: “Donu al ŝi unu fu-on⁸⁷.” Ran petis pli. “Donu al ŝi unu ju-on⁸⁸,” diris la Majstro.

Sed Ran donis al ŝi kvin bing-ojn⁸⁹.

La Majstro diris: “Kiam Chi⁶⁴ veturis al Qi-regno, li havis fortikajn ĉevalojn jungitajn al la kaleŝo, kaj havis sur si malpezajn peltaĵojn. Mi aŭdis la onidiron : noblulo helpas homon en urĝa bezono, sed ne faras aldonon al la ricaĵo de riĉulo.”

5. Dum Yuan Si⁹⁰ funkciis kiel intendanto de la domo de Konfuceo, tiu donis al li 90 hektolitrojn da greno kiel salajron, sed Yuan Si ne akceptis ilin. La Majstro diris: “Ne rifuzu ilin. La superfluan vi povas disdoni al la malriĉuloj en via hejmloko.”

6. Parolante pri Zhonggong⁸³, la Majstro diris: “Se la ido de plugbovo havus ruĝajn harojn kaj belajn kornojn, kvankam homoj ne volus uzi ĝin kiel oferaĵon, ĉu la dioj de la montoj kaj riveroj povus doni nenian atenton al ĝi?”

7. La Majstro diris: “Tia estis Hui¹⁷, kiu dum tre longa tempo povis havi en sia menso nenion kontraŭan al la perfecta virto. La aliaj nur okaze pansas pri ĝi dum mallonga tempo.”

8. Ji Kang²³ demandis: “Ĉu zhong You⁹¹ taŭgas por esti registara oficisto?” La Majstro diris: “You estas homo decidema; kian malfacilon do li povus trovi en sia funkciado kiel registara oficisto?”

Ji Kang redemandis: “Ĉu Ci¹¹ taŭgas por esti registara oficisto?” La Majstro diris: “Ci estas homo prudenta; kian malfacilon do li povus trovi en sia funkciado kiel registara oficisto?”

Kaj al la sama demando pri Ran Qiu⁶³ la Majstro donis la saman respondon: “Qiu estas homo kun multflankaj kapabloj; kian malfacilon do li povus trovi en sia funkciado kiel registara oficisto?”

9. La ĉefo de Ji-familio²⁸ sendis peti Min Ziqian⁹² funkcii kiel prefekto de Bi⁹³. Min Ziqian diris al la

sendito: “Bonvolu ĝentile transdiri mian fordankon. Se iu ree venos al mi kun dua invito, mi estos devigita forkuri norden de Wen-rivero⁹⁴ kaj vivi tie.”

10. Kiam Boniu⁹⁵ suferis malsanon, la Majstro iris lin viziti. Per sia mano etendita tra la fenestro li tenis la manon de Boniu kaj diris: “Li pereas. Tio estas la destino de lia sorto, ho ve! Tia homo estas trafita eĉ de tia malsano! Tia homo estas trafita eĉ de tia malsano!”

11. La Majstro diris: “Admirinda estis la virto de Hui¹⁷! Korbeto da nutraĵo por manĝi, botelkukurba ĉerpilo da akvo por trinki, loĝo ĉe aĉa strateto — ĉion ĉi tion aliaj rigardus kiel mizeron neelteneblan, sed Hui restis ĉiam bonhumora malgraŭe. Admirinda ja estis la virto de Hui!”

12. Ran Qiu⁶³ diris: “Ne via doktrino malplaĉas al mi, sed mia forto estas nesufiĉa.” La Majstro diris: “Tiu, kies forto estas nesufiĉa, haltas en la mezo de la vojo, sed vi ankoraŭ ne ekiris.”

13 . La Majstro diris al Zixi⁶: “Estu noblulo-klerulo, kaj ne malnoblulo-klerulo.”

14 . Kiam Ziyou¹⁶ funkciis kiel prefekto de Wucheng⁹⁶, la Majstro diris al li: “Ĉu vi jam trovis homon multkapablan tie?” Li respondis: “Ĉi tie estas homo nomata Dantai Mieming⁹⁷. Li neniam prenas vojeton survoje kaj neniam vizitis min escepte se li havas ofican aferon.”

15. La Majstro diris: “Meng Zhifan⁹⁸ neniam fanfaronas pri sia merito. En okazo de militfuĝo li

ariergarde ŝirmis la soldatojn. Sed kiam liaj soldatoj estis tuj enirontaj la pordegon de sia propra urbo, li vipis sian ĉevalon kaj diris: ‘Estas ne mia kuraĝo, kiu igas min esti la lasta; sed mia ĉevalo ne povis kuri rapide.’”

16. La Majstro diris: “Se oni posedas ne la elokvantecon de Zhu Tuo⁹⁹, sed nur la belan aspekton de Song Chao¹⁰⁰, estas malfacile por li eviti malfeliĉojn en la nuna tempo.”

17. La Majstro diris: “Kiu povas eldomiĝi sen trairi la pordon? Kial do oni ne iras laŭ tiu ĉi vojo mia?”

18. La Majstro diris: “Kiam simpleco superas la rafinitecon, krudeco rezultas. Kiam rafiniteco superas simplecon, supraĵeco estiĝas. Nur kiam rafiniteco kaj simpleco estas en egalpezo, oni fariĝas homo nobla.”

19. La Majstro diris: “La homo naskiĝas por honesteco. Se homo perdas sian honestecon kaj ankoraŭ vivas, lia evito de morto estas nur la efiko de bona ŝanco.”

20. La Majstro diris: “Tiuj, kiuj scias la veron, ne estas egalaj al tiuj, kiuj ĝin amas, kaj tiuj, kiuj ĝin amas, ne estas egalaj al tiuj, kiuj trovas plezuron en ĝi.”

21. La Majstro diris: “Al tiuj, kies inteligenteco estas super la meza nivelo, oni povas instrui ion ne facile kompreneblan. Al tiuj, kies inteligenteco estas sub la meza nivelo, oni ne povas tion instrui.”

22. Fan Chi¹³ demandis pri saĝeco. La Majstro diris: “Kiu sin donas al la devo gvidi la popolon sur la vojon de justeco kaj, respektante la spiritojn, fortenas sin

de ili, tiu povas esti nomata homo saĝa.”

Li demandis pri la perfekta virto. La Majstro diris: “Kiu rigardas penegadon kiel sian unuan aferon kaj sukceson nur kiel postan konsideron, tiu povas esti rigardata kiel homo de perfecta virto.”

23. La Majstro diris: “La saĝulo trovas plezuron en akvo; la virtulo trovas plezuron en montoj. La saĝulo estas aktiva; la virtulo estas trankvila. La saĝulo estas ĝoja; la virtulo estas longviva.”

24. La Majstro diris: “Qi-regno, en politika reformado, povus atingi la staton de Lu-regno. Lu-regno, en politika reformado, povus atingi la staton, en kiu superregus veraj principoj.”

25. La Majstro diris: “Jen gu-o¹⁰¹ estas anguloj. — — Stranga gu-o! Stranga gu-o!”

26. Zai Wo⁴⁸ demandis: “Se oni diras al virtulo, ke iu homo virta falis en puton, ĉu li sin ĵetos en ĝin post li?” La Majstro diris: “Kial do necesus tiel agi? Li povus iri al la puto por savi la enfalinton, sed li ne devus vane perdi la vivon. La virtuto povas esti trompita per io ŝajne pravigebla, sed li ne povas esti traktata kiel stultulo.”

27. La Majstro diris: “La noblulo, kiu vaste studas literaturon kaj samtempe scias, kiel kondukti laŭ la decreguloj, ne povas deflankiĝi de la ĝusta vojo.”

28. La Majstro vizitis Nanzi¹⁰². Tio malplaĉis al Zilu⁶². La Majstro do ĵuris: “Se mi faris tie ion ne decan, Ĉielo min abomenu! Ĉielo min abomenu!”

29. La Majstro diris: “Kiel transcenda estas la morala forto de la Ĝusta Mezo¹⁰³! Malofta jam de longe estas ĝia praktikado inter la popolo!”

30. Zigong⁹ diris: “Se troviĝus homo, kiu ne nur vaste farus bonon al la popolo, sed ankaŭ donus helpon al ĉiuj, kion do vi dirus pri li? Ĉu tia homo povus esti rigardata kiel perfekte virta?” La Majstro diris: “Ĉu li estus nur perfekte virta? Li sendube estus sankte saĝa! Eĉ Yao kaj Shun¹⁰⁴ malfacile tion faris. Laŭ mi la perfekta virto konsistas en tio: Vi mem deziras stari, tiam helpu aliajn stariĝi; vi mem deziras sukceson, tiam helpu aliajn atingi la samon. Se vi kapablas juĝi pri aliaj laŭ kriterio, laŭ kiu vi juĝas ankaŭ pri vi mem; tio povas esti nomata la arto praktiki la perfektan virton.”

ĈAPITRO VII SHU ER

1. La Majstro diris: “Estante interpretanto kaj neverkanto, havante kredon kaj amon al la antikveco, mi en mia koro komparas min kun la maljuna Peng¹⁰⁵.”

2. La Majstro diris: “Silente enmemorigi viditaĵojn kaj aŭditaĵojn, lernadi sen enuo kaj instruadi sen laciĝo. Kiun el ĉi tiuj aferoj mi jam bone plenumas?”

3. La Majstro diris: “Ne kulturi la virton, ne transdoni al aliaj ĉion, kion vi ellernis; ne povi aliri al justeco sciante, kie ĝiestas; kaj ne ĝustatempe korekti viajn erarojn — jen ĉio, pri kio mi maltrankvilas.”

4. Kiam la Majstro estis senfare hejme, li estis bonorde vestita, kaj lia mieno estis milda kaj trankvila.

5. La Majstro diris: “Ekstrema estas mia kadukeco. Jam de longe mi ne sonĝas pri la duko de Zho¹⁰⁶.”

6. La Majstro diris: “Metu vian koron sur la doktrinon, subtenu vin per alta moraleco, apogu vin sur la perfekta virto, kaj serĉu distriĝon en la artoj.”

7. La Majstro diris: “Mi neniam rifuzas instrui tiujn, kiuj volonte alportas al mi faskon da sekigitaj viandopecoj kiel pagon por la instruado.”

8. La Majstro diris: “Kiu ne avidas sciojn, tiun mi ne instruas; kiu ne troviĝas en malfacilo sin esprimi, al tiu mi ne donas helpon. Se mi montras unu angulon de objekto al iu kaj li ne povas ekscii la aliajn tri, mi ne daŭrigas mian lecionon.”

9. La Majstro neniam satmangis flanke de funebranto.

10 . La Majstro ne kantis en la tago, en kiu li jam plorispor funebro.

11. La Majstro diris al Yan Yuan⁸¹: “Kiam mi estas bezonata, mi prenas sur min oficon; kiam mi ne estas bezonata, mi min kaŝas. Mi pensas, ke nur mi kaj vi povas tiel agi.”

Zilu demandis: “Se vi estus komisiita komandi la armeojn de iu regno, kiun do vi prenus por vin helpi? ”

La Majstro diris: “Tian homon, kiu estus preta senarme lukti kun tigro aŭ transiri riveron sen ŝipo je risko de sia vivo, mi ne prenus. Mi devus preni iun, kiu alfrontus malfacilajn taskojn kun malriskemo kaj kiu preferus atingi sukceson per strategiaj rimedoj.”

12. La Majstro diris: “Se oni povus akiri por si riĉaĵojn juste, mi akirus ilin ĉiamaniere, eĉ se mi fariĝus pordogardisto kun vipo en la mano¹⁰⁷. Se la akiro neniel sukcesos, mi do plu okupos min pri tio, kion mi amas. ”

13. La aferoj, kontraŭ kiuj la Majstro estis aparte singarda, estas fasto, milito kaj malsano.

14. Kiam la Majstro estis en Qi-regno, li aŭdis la muzikpecon Shao⁵², kaj post tio li ne konis la guston de viando dum tri monatoj. “Mi ne atendis, ” li diris, “ke mi povos droni en ĝuo de tiu muziko ĝis tia grado.”

15. Ran You³⁵ diris: “Ĉu nia Majstro estas por la princo de Wei¹⁰⁸?” Zigong⁹ diris: “Nu, mi demandos lin.”

Enirinte en la ĉambbron de la Majstro, Zigong

demandis: “Maj homoj estis Boyi kaj Shuqi⁷⁸?” “Ili estis distingigaj homoj en la antikveco,” respondis la Majstro. “Ĉu ili havis bedaŭron pro siaj agoj?” La Majstro respondis: “Ili penis virte agi, kaj ili tiel agis. Kial do ili devus bedaŭri?”

Elirinte el la ĉambro, Zigong diris al Ran You: “Nia Majstro ne estas por li.”

16. La Majstro diris: “Eĉ kun kruda nutraĵo por manĝi, malvarma akvo por trinki, kaj fleksita brako kiel kapkuseno, mi ankoraŭ havas ĝojon. Riĉaĵoj kaj honoro maljuste akiritaj estus por mi kiel flosantaj nuboj.”

17. La Majstro diris: “Se kelkaj jaroj estos aldonitaj al mia vivo, mi komencos studi 《Libron de Ŝanĝiĝoj》¹⁰⁹ en mia kvindeka jaro, kaj de tiam mi povos esti libera de grandaj eraroj.”

18. La Majstro uzis ankaŭ la komunan elparoladon. Kiam li voĉlegis el 《Libro de Poezio》¹⁰ kaj 《Libro de Historio》²⁴ kaj plenumis ritajn ceremoniojn, li ĉiam uzis la komunan elparoladon.

19. La duko de She¹¹⁰ demandis Zilu⁶² pri Konfuceo. Zilu ne respondis al li. La Majstro poste diris al Zilu: “Kial vi ne diris al li: Li estas tia homo, kies diligenteco en studado estas tiel forta, ke li eĉ forgesas manĝadon; kies ĝojo en serĉado de scioj estas tiel granda, ke li eĉ forgesas siajn ĉagrenojn kaj ne konscias, ke maljuna aĝo baldaŭ venos al li?”

20. La Majstro diris: “Mi ne estas tia homo, kiu havas kunnaskitajn sciojn. Mi estas nur tia homo, kiu amas lerni el la antikveco kaj estas diligenta en serĉado

de scioj.”

21. La Majstro ne parolis pri monstroj, nek pri perfortaĵoj, nek pri ribeloj, nek pri spiritoj.

22. La Majstro diris: “Kiam mi promenas kune kun du aliaj, mi certe havas mian instruiston inter ili. Mi elektos liajn bonajn kvalitojn por sekvi kaj liajn malbonajn kvalitojn por eviti.”

23. La Majstro diris: “Ĉielo dotis min per la virto. Huan Tui¹¹¹ — kion li povus fari al mi?”

24. La Majstro diris: “Ĉu vi pensas, miaj disĉiploj, ke mi havas ion kaŝitan? Mi kaŝas nenion de vi. Mi faras nenion, kion mi ne komunikus al vi. Jen kia mi estas.”

25. La kvar aferoj, kiujn instruis la Majstro, estis literaturo, etiko, lojaleco kaj fideleco.

26. La Majstro diris: “Sanktan saĝulon mi ne povas vidi. Se mi povus vidi homon vere talentan kaj virtan, do min kontentiĝus.”

La Majstro diris: “Homon vere bonan mi ne povas vidi. Se mi povus vidi homon havantan konstantecon en virto, do min kontentigus. Ekzistas tiaj homoj, kiuj havas nenion kaj tamen afektas ion havi, estas malplenaj kaj tamen afektas esti plenaj, troviĝas en mizero kaj tamen afektas troviĝi en lukso; — estas malfacile por ili havi la konstantecon en virto.”

27. La Majstro kaptis fiŝojn per hoko, sed ne per reto. Li arkpafis birdojn flugantajn, sed ne nestiĝintajn.

28. La Majstro diris: “Eble ekzistas tiaj homoj, kiuj

agaz sen scii la kialon. Sed koncerne min, mi ne estas unu el ili. Aŭdi multe kaj elekti tion, kio estas bona, kaj ĝin sekvi; vidi multe kaj noti ĝin al si en la memoro; — la scioj tiel akiritaj estas malpli superaj nur al la scioj kunnaskitaj.”

29. Estis malfacile paroli kun la homoj de Huxiang¹¹². Tial, kiam iu knabo tiea venis peti intervidiĝon kaj estis akceptita de la Majstro, ties disĉiploj tre miris. La Majstro diris: “Mi aprobas lian aliron al mi kaj malaprobas lian retiriĝon de mi. Ni ne devas esti tro postulemaj. Se iu purigas sin por veni al ni, ni devas aprobi tiun ĉi sinpurigon. Ni ne bezonas ĉiam teni lian pasintecon en nia memoro.”

30. La Majstro diris: “Ĉu la virto estas io malproksima? Mi volas esti virta, kaj jen ĝi estas apude.”

31. Chen Sibai¹¹³ demandis la Majstron, ĉu la princo Zhao¹¹⁴ konas la decon, kaj Konfuceo diris: “Li konas la decon.”

Post kiam Konfuceo foriris, Chen Sibai salutis Wuma Qi¹¹⁵ per kunigitaj manoj kaj petis lin alproksimiĝi, dirante: “Mi aŭdis, ke la noblulo estas senpartia. Ĉu Konfuceo povas esti partia? La princo Zhao edzinigis al si virinon el la regno Wu, kies princo havis la saman familian nomon kiel li, kaj nomis sin Wu Mengzi¹¹⁶. Se la princo Zhao konis la decon, kiu do ĝin nekonas?”

Wuma Qi transdiris ĉi tiujn vortojn al la Majstro,

kaj tiu diris: “Feliĉa mi estas! Se mi havas erarojn, oni certe ilin scias.”

32. Kiam la Majstro kantis kun aliaj, se iu kantis bele, li nepre petis tiun ripeti la kanton kaj poste akompanis ĝin per sia propra voĉo.

33. La Majstro diris: “Mi jam posedas sufiĉe multe da libraj scioj, sed mi ankoraŭ ne fariĝis granda virtulo, kiu sincere praktikas en la ĉiutaga vivo tion, kion li ellernis.”

34. La Majstro diris: “Mi neniel kuraĝas pretendi esti sankta saĝulo aŭ homo de perfekta virto. Pri mi estas direble nur, ke mi neniam tediĝas de lernado, nek laciĝas de instruado al aliaj.” Gongxi Hua¹¹⁷ diris: “Ĝuste tion ni, viaj disĉiploj, ne povas fari.”

35. Kiam la Majstro estis serioze malsana, Zilu⁶² petis la permeson fari preĝon por li. La Majstro diris: “Ĉu tia afero estas farebla?” Zilu respondis: “Jes. En la Preĝolibro estas dirite, ‘Preĝo estu farita al la spiritoj de la supra kaj suba mondoj’.” La Majstro diris: “Ma preĝo jam antaŭ longe estis farita.”

36. La Majstro diris: “Luksemo kondukas al aroganteco, kaj ŝparemo al humileco. Mi preferas esti humila ol esti aroganto.”

37. La Majstro diris: “La noblulo estas komplete trankvila; la malgranda homo estas ĉiam ĉagrenata.”

38. La Majstro estis milda, kaj tamen severa; digna, kaj tamen ne furiozema; majesta, kaj tamen trankvila.

ĈAPITRO VIII TAI BO

1. La Majstro diris: “Taibo¹¹⁸ povas esti kalkulata kiel homo jam atinginta la plej altan gradon de la virto. Trifoje li cedis la tronon al Jili¹¹⁹, kaj pro tio la popolo preskaŭ ne povis trovi ĝustajn vortojn por laŭdi lian konduton.”

2. La Majstro diris: “Respekto, sen la decreguloj, fariĝas laciĝo; singardo, sen la decreguloj, fariĝas timemo; kuraĝo, sen la decreguloj, fariĝas malobeco; malkaŝemo, sen la decreguloj, fariĝas parolpikeco. Kiam tiuj, kiuj okupas altajn postenojn, bone plenumas ĉiujn siajn devojn al siaj parencoj, la popolo estas vekita al la virto. Kiam malnovaj amikoj ne estas neglektataj de ili, la popolo ne tenas sin fremda unu kontraŭ alia.”

3. Kiam Majstro Zeng⁵ estis malsana, li vokis al si siajn disĉiplojn kaj diris: “Rigardu miajn piedojn! Rigardu miajn manojn! Estas dirite en 《Libro de Poezio》¹⁰: ‘Ni estu singardaj kaj atentemaj, kvazaŭ ni starus sur la rando de abismo, aŭ irus sur maldika glacio sur akvo.’ De nun mi scios, kiel mi povos eviti ĉiujn malfeliĉojn. Ho! vi, miaj knaboj.”

4. Kiam Majstro Zeng estis malsana, Meng Jing¹²⁰ iris viziti lin. Zeng diris: “Kiam birdo estas mortanta, ĝiaj kantoj estas malgajaj; kiam homo estas mortanta, liaj vortoj estas afablaj. En sia konduto la altrangulo devas konsideri aparte gravaj la jenajn principojn: Li seriozigu sian sintenon por esti libera de krudeco kaj malrespekto; li sincerigu sian mienon por ĝui alies konfidon; kaj li

afabligu sian parolon por eviti malĝentilaĵojn kaj malagrabraĵojn. Koncerne tiajn aferojn, kiaj estas la detaloj de oferado, lasu specialajn taskitojn zorgi pri ili.”

5. Majstro Zeng diris: “Esti dotita per kapablo, kaj tamen modeste meti demandojn al tiuj, kiuj estas nekapablaj; posedi multajn sciojn, kaj tamen meti demandojn al tiuj, kiuj posedas malmultajn; havi, kvazaŭ li ne havus; esti plena, kvazaŭ li estus malplena; esti ofendita, kaj tamen esti pardonema — Jen la manieroj, en kiuj kondukis unu el miaj antaŭaj amikoj¹²¹.”

6. Majstro Zeng diris: “Se troviĝas persono, al kiu oni povas konfidi junan orfan regnestridon kaj komisi la aŭtoritaton super regno de cent li-oj¹²², kaj kiun nenio povas fleksi en kriza momento de vivo aŭ morto: — ĉu tia homo estas noblulo? Li vere estas noblulo.”

7. Majstro Zeng diris: “La klerulo ne devas malhavi grandanimecon kaj firman volon. Lia ŝarĝo estas peza kaj lia vojo estas longa. Li prenas la realigon de la perfekta virto kiel sian taskon: — ĉu lia ŝarĝo ne estas peza? Nur kun morto lia vojiro ĉesas: — ĉu lia vojo ne estas longa?”

8. La Majstro diris: “La Poemoj¹⁰ inspiras min; la decreguloj firme starigas min; kaj la muziko perfektigas min.”

9. La Majstro diris: “Ni povas igi la ordinaran popolon sekvi nian vojon, sed ne povas igi ilin scii la kialon.”

10. La Majstro diris: “La homo, kiu estas aŭdaca kaj malkontenta pri malriĉeco, emas fari malordon. Tian emon havas ankaŭ la homo nevirta, kiam vi havas troan abomenon kontraŭ li.”

11. La Majstro diris: “Kvankam iu havas kapablojn admirindajn kiaj tiuj de la duko de Zhou¹⁰⁶, tamen se li estas fieraj kaj avara, la ceteraj kvalitoj de li ne meritas konsideron.”

12. La Majstro diris: “Estas malfacile trovi homon, kiu studas tri jarojn ne pensante pri enoficiĝo en registaro.”

13. La Majstro diris: “Havu firman kredon, amu lernadon kaj, se necesas, estu preta morti por la bona doktrino. Ne eniru en regnon, kiu sekvas danĝeran politikon, nek loĝu en regno malordigita. Kiam ĝustaj principoj venkas, vi vin montru; kiam ili senfortiĝas, vi vin kaŝu. Kiam la lando estas bone regata, kalkulu malriĉecon kaj malaltan situacion kiel hontindaĵojn; kiam la lando estas malbone regata, kalkulu riĉecon kaj honoron kiel hontindaĵojn.”

14. La Majstro diris: “Tiu, kiu ne okupas tiun postenon, ne enmiksiĝas en ĝiajn administrajn aferojn.”

15. La Majstro diris: “De la komenco de la muziko ludata de la muzikmajstro Zhi¹²³ ĝis Guan Ju⁴⁷, kiu estis de la fino, miaj oreloj estis plenplenaj de belaj harmoniaj sonoj.”

16. La Majstro diris: “Fervorega kaj tamen ne honesta, naiva kaj tamen ne senruza, sinceraspekta kaj tamen ne fidinda — tian personon mi ne komprenas.”

17. La Majstro diris: “Lernu tiamamere, kvazaŭ vi ne povus atingi vian celon kaj ĉiam timus perdi tion, kio estas jam akirita.”

18. La Majstro diris. “Kiel majesta estis la maniero, en kiu Shun¹²⁴ kaj Yu¹²⁵ regis la landon! Kiel suverenoj ili dediĉis sian tuton al la bono de la popolo.”

19. La Majstro diris: “Granda ja estis Yao¹²⁶ kiel suvereno! Kiel majesta li estis! Nur Ĉielo estis plejalta, kaj nur Yao povis sekvi ĝian ekzemplon. Kiel vasta estis lia favoro! La popolo neniel povis trovi ĝustajn vortojn por lin laŭdi. Kiel majesta estis li en la verkoj, kiujn li kreis! Kaj kiel glora estis li en la eleganta ritario, kiun li iniciatis!”

20. Shun¹²⁴ havis kvin eminentajn ministrojn, kaj la lando estis bone regata. Reĝo Wu¹²⁷ diris: “Mi havas dek kapablajn ministrojn, kiuj helpas al mi regi la landon.” Konfuceo diris: “Proverbo diras: Talentuloj estas malfacile troveblaj. Ĉu ĝi ne estas vera? Post Tang-kaj Yu-epokoj¹²⁸, talentuloj estis plej abundaj en la tempo de Reĝo Wu, tamen inter ili troviĝis unu virino. Efektive estis nur naŭ eminentaj ministroj. Reĝo Wen¹²⁹ posedis du trionojn de la lando, tamen li daŭre vasalis al Yin-dinastio²⁵. Lia virto, oni povas diri, ja atingis la perfektecon.”

21. La Majstro diris: “Mi povas trovi nenion neperfektan en la moralaj ecoj de Yu¹²⁵. Li mem nutris sin per simplaj manĝaĵoj, sed li oferis abundajn bongustaĵojn al la spiritoj. Liaj ĉiutagaj vestoj estis tre

malbonaj, sed li vestis sin luksege dum la oferadoj. Li vivis en domo tre modesta, sed li dediĉis sian tutan forton al la konstruado de irigaci- kaj dren-sistemoj. Mi povas trovi nenion neperfektan en Yu.”

ĈAPITRO IX ZI HAN

1. La Majstro malofte parolis pri profito, la volo de Ĉielo kaj perfekta virto¹³⁰.

2. Iu en Daxiang¹³¹ diris: “Granda ja estas Konfuceo! Liaj scioj estas vastaj, sed bedaŭrinde li ne havas specialan kapablon, per kiu li povus sin famigi.” Aŭdinte pri tio, la Majstro diris al siaj disĉiploj: “Pri kio do mi min okupu? Ĉu pri ĉaro-veturigo? Ĉu pri arkpafado? Mi do min okupu pri caro-veturigo.”

3. La Majstro diris: “Laŭ la ceremoniaj reguloj la ceremonia ĉapo devus esti farita el kanabtololo, sed nun oni portas la silkan anstataŭe. Tio estas pli ŝpara, kaj mi sekvas la ĝeneralan kutimon. La ceremoniaj reguloj preskribas, ke oni riverencu malsupre de la perono de la palaco kaj ankaŭ antaŭ la trono, sed nun oni riverencas nur antaŭ la trono post eniro en la palacan ĉambregon. Tio estas arogantaĵo. Mi preferas riverenci malsupre de la perono kaj ankaŭ antaŭ la trono, kvankam tio ne estas konforma al la nuna ĝenerala kutimo.”

4. La Majstro estis tute libera de la kvar mankoj: Li faris nenian konjekton, nek absolutan jesigon; li neniam obstinis, nek opiniis sin ĉiam prava.

5. Kiam la Majstro estis retenita en Kuang¹³², li diris: “Post la morto de Reĝo Wen¹²⁹, ĉu la kulturo ne konserviĝas ĉi tie de mi? Se Ĉielo vere intencus pereigi la kulturon, tiam mi, mortema homo, ne devus havi rilaton al ĝi. Kaj se Ĉielo ne intencas pereigi la

kulturon, loon do la popolo de Kuang povasfari kun mi?”

6. Iu altranga regna oficisto demandis Zigong⁹: “Ĉu via Majstro estas sankta saĝulo? Kial li estas kapabla je tiom multe da aferoj?” Zigong respondis: “Estas Ĉielo, kiu faris lin saĝa kaj kapabla je diversaj aferoj.”

Aŭdinte pri tio, la Majstro diris: “Kiel tiu altranga regna oficisto povus min koni? Kiam mi estis juna, mi estis mariĉa, kaj tial mi akiris al mi la kapablon fari multajn praktikajn aferojn. Ĉu klerulo en la vera senco de la vorto povus havi tian diversecon de kapablo? Certe ne! ”

7. Lao¹³³ diris: “La Majstro diris: “Ĉar mi ne estis dungita kiel regna oficisto, mi ellernis multajn artojn.””

8. La Majstro diris: “Ĉu mi rigardis min kiel posedanton de scioj? Ne. Sed se eĉ simpla terkulturisto venas kaj demandas min pri iu afero, kiun mi tute ne scias, mi estas preta funde esplori la aferon kun ĉiuj ĝiaj ‘por’ kaj ‘kontraŭ’ kaj laŭeble klarigi ĝin al li.”

9. La Majstro diris: “La Feng-birdo¹³⁴ ne alflugas, la Rivero ne aperigas Ok Diagramojn¹³⁵— jam restas al mi nenia espero!”

10. Kiam la Majstro vidis personon en funebra kostumo, aŭ iun en ceremoniaj ĉapo kaj vesto, aŭ blindulon, kvankam tiu estis pli juna ol li, li ĉiam stariĝis, kaj se li devis preterpasi tiun, li ĉiam rapidigis siajn paŝojn¹³⁶.

11. Yan Yuan⁸¹, kun admiro al la Majstro pri liaj

doktrinoj, diris: “Ju pli supren mi levas miajn rigardojn al ili, des pli altaj ili ŝajnas fariĝi; ju pli mi penas trapenetri ilin, des pli firmaj ili ŝajnas fariĝi; mi vidas, ke ili estas antaŭ mi, kaj subite ili ŝajnas esti malantaŭe. La Majstro pacience gvidas homojn paŝo post paŝo sur la vojo de lernado. Li pli klerigas mian menson per vasta literaturo kaj bridas mian konduton per la decreguloj. Kaj eĉ se mi dezirus ĉesi studi liajn doktrinojn, mi ne povus tion fari ĝis la elĉerpiĝo de mia tuta forto. Ŝajnas, ke antaŭ mi staras io alta; sed, kvankam mi deziras ĝin surgrimpi, mi trovas neniun vojon al ĝia supro.”

12. Kiam la Majstro estis serioze malsana, Zilu⁶² deziris, ke oni faru preparojn por grandiozaj funebraĵoj. Post mildigo de sia malsano la Majstro diris: “Jam longe daŭras la trompa konduto de You²⁰! Kiun mi trompus per pretendo pri grandiozaj funebraĵoj, kiujn mi ne meritas? Ĉu mi trompus Ĉielon? Cetere, mi preferus morti en la manoj de vi, miaj disĉiploj, ofen la manoj de preparantoj de funebraĵoj. Kaj eĉ se mi ne povos esti solene enterigita, ĉu eblus al mi morti sur la vojo?”

13. Zigong⁹ diris: “Ĉi tie estas peco da bela jado. Ĉu mi metu ĝin en keston kaj konservu ĝin, aŭ mi serĉu ion jad-konanton kaj ĝin vendu?” La Majstro diris: “Vendu ĝin! Vendu ĝin! Mi atendas iun jad-konanton. ”

14. La Majstro deziris transloĝiĝi al loko loĝata de la naŭ sovaĝaj triboj de la oriento. Iu diris: “Ili estas krudaj. Kiel vi povas fari tian aferon? ” La Majstro

diris: “Se noblulo loĝos tie, kia krudeco povus resti tie? ”

15. La Majstro diris: “Post kiam mi revenis de Wei-regno al Lu-regno, mi reformis la muzikon, por ke la pecoj en la Kortegaj Kantoj kaj Oferceremoniaj Kantoj ĉiu trovu sian ĝustanlokon.”

16. La Majstro diris: “Ekstere, servi al la princo kaj liaj ministroj; hejme, servi al siaj gepatroj kaj pli aĝaj fratoj; rilate al funebraĵoj, ne kuraĝi ne fari sian plejblon; kaj ne esti venkita de vino — kiun el ĉi tiuj aferoj mi jam bone plenumas?”

17. Starante ĉe rivero, la Majstro diris: “La tempo pasas kaj pasas, kiel la akvo en ĉi tiu rivero, kiu senĉese fluas tage kaj nokte!”

18. La Majstro diris: “Mi neniam vidis homon, kiu amuz virton kiel belecon.”

19. La Majstro diris: “La lernado povas esti komparata kun teramasigo. Se nur per unu plia korbo da tero mi povus fini la laboron kaj tamen mi ĉesas tion fari, la fakto estas, ke mi mem ĉesas. Ĝi povas esti komparata ankaŭ kun ebenigo de grundo per terĵeto. Kvankam ĉiun fojon nur unu korbo da tero estas ĵetitaj, tamen la fakto estas, ke mi ja progresigas la ebenigadon.”

20. La Majstro diris: “Tiu, kiu neniam laciĝas de aŭskultado de miaj instruoj, estas neniu alia ol Hui¹⁷.”

21. La Majstro diris pri Yan Yuan⁸¹: “Kiel bedaŭrinda estas lia morto! Mi vidis lian konstantan progresadon. Mi neniam vidis lian halton.”

22. La Majstro diris: “Estas plantidoj, kiuj elkreskas, sed ne floras; estas plantidoj, kiuj elkreskas kaj floras, sed ne donas fruktojn.”

23. La Majstro diris: “La junulo estas timinda. Kiel do ni povas scii, ke lia estonteco ne estos egala al la nia! Se li atingos la agon de kvardek aŭ kvindek jaroj sen distingiĝo, tiam li ne meritos esti timinda.”

24. La Majstro diris: “Ĉu homoj povas rifuzi la vortojn de severa admono? Sed tio, kio valoras, estas korekti sian konduton. Ĉu homoj povas ne ĝojigi aŭdinte vortojn obeajn kaj flatajn? Sed tio, kio valoras, estas fari analizon al ili. Se iu ĝojiĝas pro tiuj ĉi vortoj sen fari analizon kaj akceptas alies admonon sen korekti sian konduton, mi ja povas fari nenion kontraŭ li.”

25. La Majstro diris: “Tenu fidelecon kaj sincerecon kiel unuajn principojn. Ne amikiĝu kun tiuj, kiuj estas malpli bonaj ol vi. Se vi faris erarojn, tiam ne timu ilin korekti.”

26. La Majstro diris: “La komandanto povas esti kaptita for de sia armeo, sed la volo de eĉ ordinara homo ne povas esti prenita for de li.”

27. La Majstro diris: “Tiu, kiu ne sentas honton starante en ĉifona vatita robo ce la flanko de homoj vestitaj per peltaĵoj, probable estas neniu alia ol You²⁰. ‘Li estas nek envia, nek avida; kial li la prosperon ne atingas?’” Ĉi tiujn vortojn el «Libro de Poezio»¹⁰ Zilu⁶² konstante ripetis. La Majstro diris: “Kiel do oni povus atingi prosperon nur per tio ĉi?”

28. La Majstro diris: “Frostiĝas, kaj mi ekscias, ke la pinoj kaj cipresoj perdas siajn foliojn la lastaj.”

29. La Majstro diris: “La saĝuloj estas liberaj de perplekseco; la virtuloj de maltrankvilo; kaj la kuraĝuloj de timo.”

30. La Majstro diris: “Troviĝas homo, kun kiu oni povas kune studi, sed ne povas kune progresi. Troviĝas homo, kun kiu oni povas kune progresi, sed ne povas kune sin teni je la decreguloj. Troviĝas homo, kun kiu oni povas kune sin teni je la decreguloj, sed ne povas kune adapti sin al la ŝangiĝantaj cirkonstancoj.”

31. *La floraj branĉoj de l' sovaga pruno,*

Kiel gracie ili sin balancas !

Ne ĉar mi forte al vi ne sopiras,

Sed ĉar tre fore vi de mi distancas.

La Majstro komentis: “Fakte li ne sopiras al ŝi. Se li vere sopirus, la distanco estus por li nemo.”¹³⁷

ĈAPITRO X XIANG DANG

1. Konfuceo, en sia hejmloko, estis milda, afabla kaj kvazaŭ mallerta en parolo.

Kiam li estis en la templo al la prapatroj aŭ en la princa palaco, li parolis klare kaj flue, sed diskrete.

2. Kiam la Majstro atendis la princon en lia palaco, parolante kun regnaj oficistoj de la malpli alta rango, li aspektis milde kaj ĝoje; parolante kun la pli altaj regnaj oficistoj, li aspektis honeste kaj respekte. Kiam la princo alestis, li aspektis respekte kaj iom maltrankvile, kaj lia paŝado estis senhasta kaj firma.

3. Kiam la princo alvokis la Majstron, por komisi al li akcepti gaston el alia regno, lia mieno serioziĝis kaj lia paŝado plirapidiĝis. Kiam li salutadis per kunigitaj manoj la regnaj noficistojn, kiuj staris dekstre kaj maldekstre de li, la baskoj de lia robo flirtadis jen antaŭen, jen malantaŭen, en bonordo. Li iris per rapidaj paŝoj, kun siaj brakoj kiel disetenditaj flugiloj de birdo. Post kiam la gasto foriris, li nepre tuj raportis al la princo: “La gasto, dirinte adiaŭ, jam estas for.”

4. Kiam la Majstro eniris tra la pordego de la princa palaco, li aspektis time kaj singarde, kvazaŭ la pordego ne estus sufiĉe granda, por ke li povu ĝin trapaŝi.

Kiam li staris, li ne okupis la mezon de la pordego ; kiam li transpaŝis, li ne piede tuŝis la sojlon.

Kiam li preterpaŝis la vakan seĝon de la princo, lia mieno serioziĝis, liaj paŝoj plirapidiĝis, kaj liaj vortoj estis tiel mallaŭtaj, kvazaŭ li havus apenaŭ sufiĉan spiron por ilin eldiri.

Kiam li, tenante supren la baskon de sia robo per ambaŭ manoj, supreniris al la princo, li aspektis respektive kaj singarde, kaj li tiel retenis la spiradon, kvazaŭ ĝi jam haltus.

Post kiam li eliris el la aŭdienchalo, apenaŭ li malsupreniris unu ŝtupon, lia vizaĝo sereniĝis kaj li ekhavis kontentan mienon.

Alveninte al la malsupro de la perono, li iris, antaŭen per rapidaj paŝoj, kun siaj brakoj kiel disetenditaj flugiloj de birdo.

Post kiam li revenis al sia loko, lia aspekto ankoraŭ montris respekton kaj maltrankvilon.

5. Kiam la Majstro partoprenis kiel sendito en kortega ceremonio de alia regno, tenante sian gui-on¹³⁸ en la manoj, li sin klinis respektive kaj singarde, kvazaŭ li ne havus sufiĉan forton por porti ĝin. Levante ĝin, li havis teniĝon kvazaŭ de saluto per kunigitaj manoj; mallevante ĝin, li kvazaŭ intencis doni ĝin al alia. Lia mieno estis serioza kvazaŭ en milito, kaj liaj paŝoj estis malgrandaj, kvazaŭ li irus laŭ linio.

Dum prezentado de donacoj li havis afablan mienon.

Ĉe sia privata aŭdienco li montris sin senĝena kaj ĝoja.

6. Noblulo ne uzis la koloron nigreruĝan nek la

ruĝenigran por la borderoj de sia kostumo. En sia hejmo li portis nenion de koloro ruĝa aw purpura.

En varmaj tagoj li surhavis sensubŝtofan veston el kruda aŭ fajna kanabtolo, sed ĝi nepre estis portata sur subvesto por esti videbla.

Sur ŝafida peltaĵo li portis nigran superveston; sur cervida peltaĵo blankan; kaj sur vulpa peltaĵo flavan.

La pelta ĵako portata hejme estis longa, kun la dekstra maniko mallonga.

Li postulis, ke lia litkovrilo estu duonoble pli longa ol lia korpo.

En sia hejmo li uzis dikan pelton vulpan aŭ melan kiel sidkusenon.

Post kiam pasis la tempo de funebro, li portis diversajn ornamaĵojn.

Lia jupoforma malsupra vesto, kiu ne estis destinita por la okazoj de kortega kaj ofera ceremonioj, estis farita el unupeca tuko, kies superflua parto nepre devis esti fortondita.

Li ne portis nigran ŝafidan peltaĵon nek nigran ĉapon ĉe kondolenca vizito.

En la unua tago de ĉiu monato li nepre metis sur sin sian kortegan robon kaj faris viziton al la princo en lia palaco.

7. Sin banante por fastado¹³⁹, oni nepre portis banrobon el kanaba tolo.

Dum fastado li nepre ŝanĝis sian nutraĵon kaj ankaŭ sian dormoĉambron.

8. Oni ne malŝatas la grenon sufiĉe senbranigitan, nek la viandon sufiĉe haketitan.

Li ne manĝis, grenon ŝiman, nek viandon putran. Li ne mangis manĝaĵon alikoloriĝintan, nek malbonodoran, nek malbone kuiritan, nek prezentitan en nekutima horo. Li ne manĝis viandon, kiu ne estis stranĉita en difinita maniero, nek tion, kio ne estis spicita per difinita saŭco.

Kvankam sur la tablo estis abundo da viando, tamen li manĝis malpli da ĝi, ol da grennutraĵo.

Nur en drinkado li ne limigis sin, sed li ne permesis al si esti konfuzita de ĝi.

Li ne prenis vinon kaj kuiritan viandon, aĉetitajn en bazaro.

Li neniam estis sen zingibro dum manĝado, sed daĝi li prenis ne multe.

9. Oni konservis ne ĝis la sekvanta tago la viandon, kiun li ricevis post sia partopreno en oferado fare de la princo¹⁴⁰. Laviandon de sia familia oferado li konservis ne pli ol tri tagojn. Sed pli ol tri tagojn, li ĝin ne manĝis.

10. Dum manĝado oni ne konversaciis. En la lito li ne parolis.

11. Kvankam la manĝaĵoj estis nur malfajna rizo kaj legoma supo, tamen oni nepre faris oferon per iom da ili¹⁴¹. Dum la ofero li nepre estis tiel respektplena kiel dum fastado.

12. Se la mato estis oblikve metita, sur ĝi oni ne

sidis.

13. Vintrinkinte kun najbaroj, oni ne eldomiĝis antaŭ foriro de ĉiuj maljunuloj.

14. Kiam la najbaroj plenumis siajn ceremoniojn por forpeli pestajn influojn, oni en sia kortega robo staris sur la orienta perono.

15. Kiam oni petis transdoni sian saluton al sia amiko en alia regno, li dufoje klinsalutis la komisiiton kaj poste lin adiaŭis.

16. Kiam Ji Kang²³ donacis al la Majstro medikamenton, tiu klinsalutis kaj akceptis ĝin, dirante: “Mi ne konas ĝian econ. Mi ne kuraĝas ĝin prove preni.”

17. Iun tagon fajro forlekis la ĉevalstalon de Konfuceo. Reveninte el la princa palaco, li demandis: “Ĉu iu homo brulvundiĝis?” Li ne demandis pri la ĉevaloj.

18. Kiam la princo donacis al la Majstro kuiritan viandon¹⁴⁰, tiu nepre ordigis sian maton, mem gustumis ĝin kaj poste disdonis ĝin al aliaj. Kiam la princo donacis al li nekuiritan viandon, tiu nepre kuiris ĝin kaj oferis ĝin al la spiritoj de siaj prapatroj. Kiam la princo donacis al li vivan animalon, tiu nepre tenis ĝin vivanta.

Kiam Konfuceo servis la princon kunmanĝante kun li, antaŭ ol la princo faris oferon, li gustumis ĉiun manĝaĵon.

19. Kiam la Majstro estis malsana kaj la princo venis lin viziti, li turnis la kapon al la oriento kaj kovris siajn ŝultrojn per sia kortega robo kaj lasis ĝian zonon

pendanta.

20. Kiam la princo sendis alvoki Konfuceon, antaŭ of la ĉevaloj aljungitaj al la kaleŝo, tiu jam piede ekiris.

21. Enirinte en Grandan Templon⁴⁴, Konfuceo demandis pri ĉiu afero tiea.

22. Kiam amiko de Konfuceo mortis, se la mortinto havis neniun parencon, kiu povas zorgi pri la sepulto, li diris: “Mi lin enterigos.”

23. Akcentante donacon de amiko, eĉ se ĝi povis esti kaleŝo kaj ĉevaloj, li ne klinsalutis la donacanton. La sola donaco, pro kiu li klinsalutis, estis oferviendo.

24. En la lito Konfuceo ne kuŝis surdorse kiel kadavro. En la hejmo li ne havis seriozan mienon kiel en ceremoniaj okazoj.

25. Kiam Konfuceo vidis iun en funebra vesto, eĉ se tiu estis al li tre intima, li nepre ŝanĝis sian mienon. Kiam li vidis iun surhavantan ceremonioan ĉapon, aŭ blindulon, eĉ se tiu estis ofte renkontata de li, li nepre salutis tiun en ceremonia maniero.

Al tiu, kiu estis portanta vestojn de mortinto, li nepre klinis sin antaŭen kun la manoj sur la transversa stango de sia kaleŝo, por montri simpatian. Li klinis sin en la sama maniero ankaŭ al tiu, kiu portis sur la dorso landmapojn aŭ loĝantarajn registrojn de la regno, por esprimi respekton.

Vidante abundon da fajnaj manĝaĵoj sur la tablo, li nepre ŝanĝis sian mienon kaj stariĝis.

Ĉe subita ektondro kaj fortega vento li nepre ŝanĝis sian mienon.

26. Kiam Konfuceo estis preta enkaleŝiĝi, li nepre rekte staris, tirante la rimenon de la kaleŝo.

Kiam li estis en la kaleŝo, li ne rigardis posten, nek haste parolis, nek montris per la fingro jen ion jen alion.

27. Sentante sin minacataj de danĝero, kelkaj fazanoj, tuj flugis supren kaj, post kelktempa rondflugado, falis sur arbon.” La Majstro diris: “La fazaninoj tie sur la montego konas la cirkonstancojn! Ili konas la cirkonstancojn!” Zilu⁶² respektoplene salutis ilin per kunigitaj manoj, kaj ili forflugis kun krioj.

ĈAPITRO XI MAN JIN

1. La Majstro diris: “Tiuj, kiuj lernas ceremoniojn kaj muzikon antaŭ ol fariĝi regnaj oficistoj, estas kleruloj senprivilegiaj, dum tiuj, kiuj fariĝas regnaj oficistoj antaŭ ol lerni ceremoniojn kaj muzikon, estas aristokratoj. Se mi devus elekti inter ili kompetentulojn, mi preferus la unuajn.”

2. La Majstro diris: “El tiuj, kiuj siatempe sekvis min en Chen- kaj Cai-regnoj, nun jam neniu estas ĉe mi.”

3. Tiuj, kiuj distingiĝas per siaj virtaj principoj kaj praktiko, estas Yan Yuan, Min Ziqian, Ran Boniu kaj Zhonggong. Per sia kapablo en parolo: Zai Wo kaj Zigong. Per siaj administrataj talentoj: Ran You kaj Jilu. Per siaj literaturaj scioj: Ziyou kaj Zixia¹⁴².

4. La Majstro diris: “Hui¹⁷ ne estas tia homo, kiu povus doni al mi helpon, ĉar ĉion, kion mi diras, li akceptas kun ĝojo senescepte.”

5. La Majstro diris: “Fidela filo ja estas Min Ziqian⁹². Pri li aliaj homoj diras nenion malsaman de la laŭdoj al li fare de liaj gepatroj kaj fratoj.”

6. Nan Rong⁵⁷ ripetade voĉlegis la versojn pri la blankjadagui-o¹⁴³. Konfuceo edzigis lin al la filino de sia pliagxa frato.

7. Ji Kang²³ demandis, kiu el la disĉiploj de Konfuceo amas lerni. La Majstro respondis: “Yan Hui⁸⁵ amis lerni. Malfeliĉe lia vivdaŭro estis mallonga, kaj li

mortis. Nun troviĝas neniu, kiu tiel amas lerni, kiel li.”

8. Post kiam Yan Yuan⁸¹ mortis, Yan Lu¹⁴⁴, lia patro, petis la Majstron, vendi sian kaleŝon, por aĉeti per tio al YanYuan eksteran ĉerkon. La Majstro diris: “Ĉiu nomas sian filon sia filo, tute egale, ĉu li estas talenta aŭ ne. Kiam mortis Li¹⁴⁵, mia filo, li havis nur internan ĉerkon, sed ne eksteran. Mi ne povas vendi mian kaleŝon, por aĉeti al li eksteran ĉerkon, ĉar al mi, iama granda oficisto, ja ne decus piediri.”

9. Kiam Yan Yuan mortis, la Maistro diris: “Ho ve! Ĉielo pereigas min! Ĉielo pereigas min! ”

10. Kiam Yan Yuan mortis, la Majstro dolorege priploris lin, kaj liaj disĉiploj, kiuj estis kun li, diris “Vi tro malĝojas!” “Ĉi troas mia malĝojo?” li diris. “Se mi ne forte funebus pri tiu ĉi homo, pri kiu do mi devus funebri? ”

11. Post kiam Yan Yuan mortis, la disĉiploj de la Majstro volis doni al li pompan enterigon. La Majstro diris: “Vi ne povas tion fari.”

Sed malgraŭe ili enterigis lin en pompa maniero. La Majstro diris: “Hui¹⁷ traktis min kiel sian patron, sed mi ne povis trakti lin kiel mian filon. La kulpo ne estas mia, ĉar liaj kunlernantoj tiel faris.”

12. Jilu⁸² demandis pri la servado al la spiritoj de mortintoj. La Majstro diris: “Dum vi ankoraŭ ne povas servi al vivantoj, kiel vi povus servi al la spiritoj de mortintoj?” Jilu aldonis: “Ĉu vi permesas al mi demandi pri la morto?” La Majstro diris: “Dum vi ankoraŭ ne

scias, kio estas la vivo, kiel vi povus scii, kio estas la morto?”

13. Min Ziqian⁹² staris ĉe la flanko de la Majstro kun mieno honesta kaj respektplena; Zilu⁶² kun mieno firmavola kaj sentima; Ran You³⁵ kaj Zigong⁹ kun mieno milda kaj gaja. La Majstro ekĝojis, sed li diris “Vidante tian mienon de You²⁰, mi timas, ke li mortos nenaturan morton.”

14. En Lu-regno oni alikonstruis la regnan trezorejon nomatan Changfu. Min Ziqian diris: “Ĉu ne estus pli bone, se ĝi estus riparita laŭ sia malnova stilo? Kial do ĝi devas esti alikonstruita?” La Majstro diris: “Tiu ĉi homo malofte parolas. Kiam li parolas, li certe diras ion trafan.”

15. La Majstro diris: “Kial You²⁰ ludas se-on¹⁴⁶ ĉi tie ĉe mi?” La aliaj disĉiploj pro tio komencis ne respekti Zilu. La Majstro diris: “You jam ascendis al la halo, kvankam li ankoraŭ ne eniris en la internan ĉambrom¹⁴⁷.”

16. Zigong⁹ demandis, kiu el la du, Shi¹⁴⁸ aŭ Shang³⁷, estas la pli bona. La Majstro diris: “Shi transiras la Ĝustan Mezon, kaj Shang ne atingas ĝin.”

“Do,” diris Zigong, “Shi devas esti la pli bona.” La Majstro diris: “Transiro estas same malbona, kiel neatingo.”

17. La ĉefo de Ji-familio²⁸ estis pli riĉa ol la duko de Zhou, kaj tamen Ran Qiu⁶³ kolektis por li impostojn kaj pligrandigis lian riĉecon. La Majstro diris: “Ran Qiu

ne plu estas mia disĉiplo. Miaj knaboj, tamburu kaj lin ataku.”

18. Chai¹⁴⁹ estis stulteta. Shen⁵⁴ estis nesprita. Shi¹⁴⁸ estis ekstremema. You²⁰ estis riskema.

19. La Majstro diris: “Hui¹⁷ estas preskaŭ perfekte virta, sed li ofte suferas ekstreman malriĉecon. Ci¹¹, kiu ne submetas sin al la volo de Ĉielo, faras negocojn, kaj liaj juĝoj en spekulado ofte estas ĝustaj.”

20. Zizhang²¹ demandis, kiel, oni povas fariĝi bona homo. La Majstro diris: “Tiu, kiu ne sekvas la paŝosignojn de aliaj, ne povas eniri en la ĉambbron de la virto kaj saĝo.”

21. La Majstro diris: “Ni ĉiam laŭdas iun pro liaj solidaj kaj sinceraj vortoj, sed ĉu li efektive estas noblulo aŭ ĉu li nur ŝajnigas sin tia?”

22. Zilu⁶² demandis: “Ĉu mi devas tuj plenumi tion, kion mi aŭdis?” La Majstro respondis: “Kiel vi povas tiel agi, dum ankoraŭ vivas viaj patro kaj pliaĝaj fratoj, kiujn vi devas konsulti?”

Ran You³⁵ demandis la samon, tamen la Majstro respondis: “Jes, tuj plenumu tion, kion vi aŭdis.”

Gongxi Hua¹¹⁷ do diris: “You²⁰ demandis, ĉu li devas tuj plenumi tion, kion li aŭdis, kaj vi diris: ‘Vi devas konsulti viajn patron kaj pliaĝajn fratojn.’ Qiu⁶³ demandis, ĉu li devas tuj plenumi tion, kion li aŭdis, kaj vi diris: ‘Tuj ĝin plenumu.’ La respondoj, kiujn vi ĵus donis, konfuzas min, kaj mi permesas al mi peti vin pri klarigo.” La Majstro diris: “Qiu estas retiriĝema, tial

mi lin instigis. You havas tro da kuraĝo, tial mi lin retenis.”

23. La Majstro estis retenita en Kuang¹³² kaj Yan Yuan⁸¹ postiĝis . La Majstro, ĉe ilia rekuniĝo, diris: “Mi pensis, ke vi jam mortis.” Hui¹⁷ respondis: “Dum vi vivas, kiel mi kuraĝus morti? ”

24. Ji Ziran¹⁵⁰ demandis: “Ĉu Zhong You⁹¹ kaj Ran Qiu⁶³ povas esti ministroj? ” La Majstro diris: “Mi pensis, ke vi demandos pri iuj aliaj personoj. Sed nun vi demandas nur pri You kaj Qiu! Homo, kiu estas nomata ministro, devas servi sian princon laŭ tio, kio estas ĝusta, kaj kiam li trovas, ke li ne povas tiel agi., li retiriĝas. Nun, koncerne You kaj Qiu, ili povas esti nomataj nur ordinamj subuloj de la suvereno.”

Ji Ziran daŭre demandis: “Do ili ĉiam sekvos sian ĉeon, ĉu ne?” La Majstro diris: “En ago de mortigo de patro aŭ suvereno, ili certe ne sekvus lin.”

25. Zilu⁶² rekomendis Zigao¹⁵¹ por la ofico de prefekto de Bi¹⁵². La Majstro diris: “Tio alportos malutilon al la tieuloj.”

Zilu diris: “Tie estas la popolo kaj regnaj oficistoj; tie estas la altaroj de la dioj de la tero kaj greno. Kial do oni nepre devas legi librojn antaŭ ol esti rigardata kiel homo jam farinta lernadon?” La Majstro diris: “Jen kial mi abomenas homon, kiu ruze sin pravigas.”

26. Zilu, Zeng Xi¹⁵³, Ran You³⁵ kaj Gongxi Hua¹¹⁷ sidis apud la Majstro.

La Majstro diris al ili: “Kvankam mi estas iom pli

aga ol vi ĉiuj, tamen ne vin ĝenu pro mia alesto. De tago al tago vi diras: ‘Oni ne konas min!’ Se iu princo konus vin kaj volus komisi al vi ion plenumi, kion do vi dezirus fari?”

Zilu respondis senpripense: “Supozu regnon kun mil militĉaroj. Ĝi troviĝas inter aliaj potencaj regnoj kaj estas atakata de invadantaj armeoj kaj suferas malsategon. Se oni konfidus al mi la regadon de ĝi, en tri jaroj mi povus fari la popolon kuraĝa en milito kaj iĝi ilin ekscii la regulojn de virta konduto.”

La Majstro ekridetis al li.

Turninte sin al Ran You, la Majstro demandis:

“Kaj vi, Ran You?”

Ran You respondis: “Supozu regnon de sesdek aŭ sepdek kvadrataj li-oj¹²², aŭ regnon de kvindek aŭ sesdek. Se oni konfidus al mi la regadon de ĝi, en tri jaroj mi povus riĉigi ĝian popolon ĝis abundeco. Koncerne la aferon instrui al la popolo la decregulojn kaj muzikon, mi devus atendi kompetentan noblulon.”

“Kio estas viaj deziroj, Chi⁶⁴?” demandis la Majstro al Gongxi Hua.

Gongxi Hua respondis: “Mi ne pretendas esti kapabla plenumi ĉi tiujn aferojn, sed mi dezirus ilin lerni. Ĉe oftaj ceremonioj en la princa prapatra templo aŭ en kunvenoj de princoj por alianciĝo mi volus, portante ceremoniajn veston kaj ĉapon, esti nur eta asistanto.”

Laste la Majstro demandis Zeng Xi: “Dian¹⁵⁴, kio estas viaj deziroj?”

Farante paŭzon dum ludado sur sia se-o¹⁴⁶, kies pli kaj plimallaŭtiĝanta sono abrupte ĉesis, Zeng Xi flanken metis la instrumenton kaj stariĝis. “Miaj deziroj,” li diris, “estas diferencaj de tiuj de la tri kamaradoj.”

“Kia malutilo povas esti en tio?” diris la Majstro. “Do ankaŭ vi, same kiel ili, eldiru viajn dezirojn.”

“Nu, bone. La lastan monaton de printempo, portante printempajn vestojn, kune kun kvin aŭ ses ĉapitaj junuloj¹⁵⁵ kaj ses aŭ sep neĉapitaj knaboj, mi min banus en la rivero Yi¹⁵⁶, ĝuus la karesadon de la brizo de Pluv-altaro¹⁵⁷, kaj kantante revenus hejmen.”

La Majstro sentoplene faris profundan elspiron kaj diris: “Mi donas aprobon al Dian.”

Post kiam la tri aliaj eliris, Zeng Xi restis tie kaj demandis: “Kion vi opinias pri la vortoj de tiuj ĉi tri kamaradoj?”

La Majstro respondis: “Ili nur eldiris ĉiu siajn dezirojn.” Zeng Xi daŭrigis: “Majstro, kial vi ridetis je You^{20?}”

La Majstro respondis: “La regado de regno postulas la decregulojn. Liaj vortoj ne estis modestaj, tial mi ridetis je li.”

Zeng Xi ree diris: “Sed ĉu tia regno, kiun Ran Qiu proponis al si, ne estas regno en la vera senco de la vorto?”

“Jes ja. Ĉu vi iam vidis teritorion de sesdek aŭ sepdek kvadrataj li-oj, aŭ de kvindek aŭ sesdek, kiu ne estis regno?”

Ankoraŭfoje Zeng Xi demandis: “Kaj ĉu tia regno, kiun Chi proponis al si, ne estas regno?”

La Majstro ree respondis: “Se ĝi, en kiu troviĝas prince prapatra templo kaj povas okazi kunvenoj de princoj por alianciĝo, ne estas regno, kio do ĝi estas? Se Chi estus eta asistanto en tiuj okazoj, kiu do povus esti granda asistanto?”

ĈAPITRO XII YAN YUAN

1. Yan Yuan⁸¹ demandis pri la perfekta virto. La Majstro diris: “Kiu povas sin reteni kaj submetiĝi al la deco, tiu estas perfekte virta. Se vi unu tagon povos vin reteni kaj submetiĝi al la deco, ĉiuj sub la ĉielo honoros vin kiel homon perfekte virtan. En la praktikado de la perfekta virto oni dependas de si mem, ĉu eblas dependi de aliaj?”

Yan Yuan diris: “Permesu al mi demandi pri la detaloj de la submetiĝo al la deco.” La Majstro respondis: “Rigardu nenion kontraŭan al la deco; aŭskultu nenion kontraŭan al la deco; diru nenion kontraŭan al la deco; faru nenion kontraŭan al la deco.”

Yan Yuan diris: “Kvankam mi estas ne sufiĉe inteligenta, tamen mi volas praktiki viajn vortojn.”

2. Zhonggong⁸³ demandis pri la perfekta virto. La Majstro diris: “Kiam vi estas for el la hejmo, konduku al ĉiu kvazaŭ vi akceptus honoran gaston; kiam vi laborigas la popolon, agu tiel kvazaŭ vi asistus ĉe granda oferado; ne faru al aliaj tion, kion vi ne dezirus fari al vi mem; ne havu plendemon en la regno, nek en la familio. Jen perfekta virto.”

Zhonggong diris: “Kvankam mi estas ne sufiĉe inteligenta, tamen mi volas praktiki viajn vortojn.”

3. Sima Niu¹⁵⁸ demandis pri la perfekta virto. La Majstro diris: “La homo perfekte virta estas diskreta en sia parolo.”

“Diskreta en sia parolo!” diris Sima Niu. “Ĉu tio

povas esti rigardata kiel la perfekta virto?” La Majstro diris: “Kiam oni sentas malfacilon en plenumo, ĉu oni povus esti alia ol diskreta en parolo?”

4. Sima Niu demandis, kia devas esti la noblulo. La Majstro diris: “La noblulo havas nek maltrankvilon, nek timon.”

“Havi nek maltrankvilon, nek timon!” diris Sima Niu. “Ĉu tio povas konsistigi kion ni nomas la noblulo?” La Majstro diris: “Kiam interna memkzameno malkovras nenion malbonan, kio do estas maltrankviliga kaj kio do estas timinda?”

5. Sima Niu, plena de malĝojo, diris: “Ĉiuj aliaj havas fratojn, nur mi havas neniun.” Zixia⁶ diris al li: “Mi aŭdis la proverbon: ‘Morto kaj vivo estas destinitaj de la sorto, riĉeco kaj honoro dependas de Ĉielo.’ Se la noblulo konsciencie zorgas siajn aferojn kaj ne faras erarojn, kaj se li kondutas ĝentile al aliaj kaj observas la decregulojn, tiam ĉiuj en la mondo estos liaj fratoj. Kiel do la vera noblulo povus malĝoji pro manko de fratoj?”

6. Zizhang²¹ demandis pri la prudento. La Majstro diris: “Tiu, sur kiun efikas nek kalumnioj, kiuj iom post iom penetras en la menson, nek miskulpigoj, kiuj estas dolorigaj kiel vundo en la karno, povas esti nomata homo prudenta. Tiu, sur kiun efikas nek kalumnioj, kiuj iom post iom penetras en la menson, nek miskulpigoj, kiuj estas dolorigaj kiel vundo en la karno, povas esti nomata ankaŭ homo malproksimvida.”

7. Zigong⁹ demandis pri la regado. La Majstro diris:

“La necesaj kondiĉoj de regado estas sufiĉaj nutraĵoj, sufiĉaj armiloj kaj la fido de la popolo al sia reganto.”

Zigong diris: “Se oni estas devigitaj nepre forigi unu el la tri, kiun do unue laŭ vi?” “La armilojn,” diris la Majstro.

Zigong ree demandis: “Se oni estas devigitaj nepre forigi unu el la du restantaj, kiun do laŭ vi?” La Majstro respondis: “La nutraĵojn. De la antikveco neniu povas eviti la morton. Sed se la popolo havas nenian fidon al siaj regantoj, la regno neniel povas firme stari.”

8. Ji Zicheng¹⁵⁹ diris: “Por la noblulo sufiĉas nur la esencaj kvalitoj — kial do necesas la ornamaj ecoj?” Zigong diris: “Estas bedaŭrinde, ke vi, sinjoro, tiel erare parolas pri la noblulo! Vian langon ja ne povas kuratingi kvar ĉevaloj. Ornamaĵoj estas kiel esenco; esenco estas kiel ornamaĵoj. La felo de tigro aŭ leopardo senigita je ĝiaj haroj ja estas simila al la felo de hundo aŭ kapro senigita je ĝiaj haroj.”

9. La princo Ai²² demandis You Ruo¹⁶⁰: “La jaro estas malgrasa, kaj la kolektitaj impostoj ne sufiĉas por kovri la regnajnspezojn. Kion do fari?”

You Ruo respondis: “Kial ne meti dek-pocentan imposton?”

La princo diris: “Eĉ la dudek-pocentan mi trovas nesufiĉa, kiel do mi povus meti la sistemon de dek pocentoj?”

You Ruo respondis: “Se la popolo ĝuas sufiĉecon, kiel do vi povus suferi malsufiĉecon? Se la popolo

suferas malsufiĉecon, kiel do vi povus ĝui sufiĉecon?”

10. Kiam Zizhang²¹ demandis, kiel altigi la virton kaj fari distingon inter la konfuziteco kaj nekonfuziteco de pensoj, la Majstro diris: “Teni fidelecon kaj sincerecon kiel unuajn principojn kaj alproksimiĝi al tio, kio estas justa — tio estas la maniero altigi la virton. Kiam oni amas iun, oni deziras, ke li longe vivu; kiam oni malamas lin, oni deziras, ke li tuj mortu. Deziri, ke li vivu kaj ankaŭ tuj mortu, estas ekzemplo de konfuziteco de pensoj. Tio ŝajnas stranga kaj alportas nenian utilon.”

11. La princo Jing de Qi¹⁶¹ demandis Konfuceon pri la regado. Konfuceo respondis: “La princo konduku princo, la ministro konduku ministre, la patro konduku patre kaj la filo konduku file.” “Prave!” diris la princo. “Se la princo ne kondutus princo, la ministro ne kondutus ministre, la patro ne kondutus patre kaj la filo ne kondutus file, kvankam da milio mi havas abundon, ĉu mi povus ĝin ĝui?”

12. La Majstro diris: “Ha! Estas nur You²⁰, kiu povus decidi procesojn aŭskultinte unu partion!”

Zilu⁶² neniam prokrastis la plenumon de sia promeso.

13. La Majstro diris: “Juĝante procesojn, mi estas same kiel la aliaj. Laŭ mi, kio estas necesa estas igi la popolon havi nenian proceson.”

14. Zizhang²¹ demandis pri la regado. La Majstro diris: “Estu senlaca sur via posteno kaj fidela en plenumo de dekretoj.”

15. La Majstro diris: “La noblulo, kiu vaste studas literaturon kaj samtempe scias, kiel kondukti laŭ la decreguloj, ne povas deflankiĝi de la ĝusta vojo.”

16. La Majstro diris: “La nobluloj ebligas al aliaj plenumi siajn bonajn dezirojn kaj ne ebligas al ili plenumi siajn malbonajn dezirojn. La malgrandaj homoj faras ĝuste la malon.”

17. Ji Kang²³ demandis Konfuceon pri la regado. Konfuceo respondis: “Regi signifas esti virtema. Se vi donas virtan ekzemplon en via gvidado, kiu do kuraĝus alie kondukti?”

18. Ji Kang, afliktita pri la granda nombro da ŝelistoj en la lando, petis konsilon de Konfuceo. Konfuceo respondis: “Se vi povus bridi vian avidecon, ili ne ŝtelus, eĉ se vi ilin rekomencus.”

19. Ji Kang demandis Konfuceon pri la regado: “Kiel vi opinias pri mortigo de la homoj malvirtaj por la bono de la virtaj?” Konfuceo respondis: “Sinjoro, kial do necesus al vi mortigi homojn en la regado de via regno? Se viaj montritaj deziroj estas vere por tio, kio estas bona, la popolo certe fariĝos bona. La rilato inter la regantoj kaj la regatoj estas kiel tiu inter la vento kaj la herboj. La herboj devas kliniĝi, kiam la vento blovas sur ilin.”

20. Zizhang²¹ demandis: “Kia devas esti la klerulo, kiu povas esti nomata distingiĝa?” La Majstro diris: “Kion signifas via distingiĝo?” Zizhang respondis: “Tio estas: esti vaste konata kaj en la regno kaj en la

feŭdo de iu granda oficisto.” La Majstro diris: “Tio estas renomo, ne distingigo. La homo distingiga devas esti honesta kaj justama. Li estas sperta en pensado de alies vortoj kaj en observado de alies mienoj. Li volonte humiligas sin al aliaj. Tia homo certe distingigas kaj en la regno kaj en la feŭdo de iu granda oficisto. Koncerne la homon, kiu amas renomon, li estas virta nur ŝajne, sed ne en siaj agoj, tamen li, kun nenia dubo pri si mem, pretendas esti virtema. Tia homo certe povas akiri al si renomon kaj en la regno kaj en la feŭdo de iu granda oficisto.”

21. Promenante kun la Majstro sub Pluv-altaro¹⁵⁷, Fan Chi¹³ diris: “Mi arogas al mi demandi, kiel altigi la virton, korekti la kulpon kaj fari distingon inter la konfuziteco kaj nekonfuziteco de pensoj.” La Majstro diris: “Vere bonan demandon vi faris! Se oni diligente laboras antaŭ ol rikolti sukceson, ĉu tio ne signifas altigi la virton? Se oni atakas sian propran malbonon kaj ne tiun de aliaj, ĉu tio ne signifas korekti la kulpon? Se pro momenta kolero oni forgesas sian memon kaj eĉ siajn gepatrojn, ĉu tio ne estas ekzemplo de konfuziteco de pensoj?”

22. Fan Chi demandis pri la perfekta virto. La Majstro diris: “Ĝi estas ami ĉiujn homojn.” Li demandis pri la saĝeco de la reganto. La Majstro diris: “Ĝi estas bone koni ĉiujn homojn.”

Fan Chi ne tuj komprenis ĉi tiujn respondojn. La Majstro aldonis: “Promociu la honestajn kaj postenigu ilin super la malhonestaj; tiamaniere la malhonestaj

povos esti honestigitaj.”

Fan Chi retiriĝis kaj, vidinte Zixia⁶, diris al tiu:

“Ĝus mi vizitis nian Majstron kaj demandis lin pri la saĝeco de la reganto. Li diris: ‘Promociu la honestajn kaj postenigu ilin super la malhonestaj; tiamaniere la malhonestaj povos esti honestigitaj.’ Kion signifas liaj vortoj?”

Zixia diris: “Vere signifoplenaj estas liaj vortoj! Kiam Shun¹²⁴ ekregis la landon, li elektis Gaoyao¹⁶² el inter la sennombraj homoj kaj promociis lin al ministreco, kaj pro tio ĉiuj senvirtuloj malaperis. Kiam Tang¹⁶³ ekregis la landon, li elektis Yiyin¹⁶⁴ el inter la sennombraj homoj kaj promociis lin al ĉefministreco, kaj pro tio ĉiuj senvirtuloj malaperis.”

23. Zigong⁹ demandis pri la amikeco. La Majstro diris: “Fidele admonu vian amikon kaj lerte gvidu lin. Se tio malsukcesas, ĉesu. Ne kaŭzu malhonoron al vi.”

24. Majstro Zeng⁵ diris: “La nobluloj intimiĝas kun siaj amikoj sur literatura bazo kaj helpas sian virton per ilia amikeco.”

ĈAPITRO XIII ZILU

1. Zilu⁶² demandis pri la regado. La Majstro diris: “Donu virtan ekzemplon por la popolo kaj poste diligentigu ilin.” Li petis pluan instruon. La Majstro diris: “Estu senlaca en ĉi tiuj aferoj.”

2. Zhonggong⁸³, fariĝinte intendanto de Ji-familio²⁸, demandis pri la regado. La Majstro diris: “Donu bonan ekzemplon por viaj subuloj, pardonu iliajn eraretojn, kaj promociu homojn virtajn kaj talentajn.”

Zhonggong diris: “Kiel oni povas scii, kiuj estas virtaj kaj talentaj, por ke mi povu ilin promocii?” La Majstro diris: “Promociu tiujn, kiujn vi bone konas. Koncerne tiujn, kiujn vi ne bone konas, ĉu aliaj povos ilin neglekti?”

3. Zilu⁶² diris: “La princo de Wei¹⁰⁸ atendas, ke vi venu al li kaj administru lian regionon. Kion, do vi opinios, vi antaŭ ĉio devas fari?”

La Majstro diris: “Tio certe estos ĝustigi nomojn.”

Zilu diris: “Ĉu? Certe via diro havas nenian rilaton al la afero. Kial nomoj devas esti ĝustigitaj?”

La Majstro diris: “Kiel senklara vi estas, You²⁰! La noblulo, rilate kion li ne scias, plejofte prenas rezerviĝeman sintenon. Se nomoj ne estas ĝustaj, tiam kio estas dirita do ne estas firme bazita; kaj se kio estas ne firme bazita, do ne povas esti sukcese efektivigita. Se kio ne estas sukcese efektivigita, tiam la decreguloj kaj muziko ne prosperas. Se la decreguloj kaj muziko ne

prosperas, tiam punoj ne trafas krimojn. Kaj se punoj ne trafas krimojn, tiam la popolo ne scias, kien meti siajn manojn kaj piedojn. Tial la nomoj, kiiujn la nobluloj uzas, nepre devas esti adekvate diritaj, kaj tio, kio estas dirita, nepre devas esti adekvate efektivigita. Tial la nobluloj neniam devas diri senpripense.”

4. Fan Chi¹³ petis instrui al li terkulturadon. La Majstro diris: “Mi ne estas tiel taŭga por tio, kiel veterana terkulturisto.” Li petis instrui al li ankaŭ legomkulturadon, kaj la Majstro diris: “Mi ne estas tiel taŭga por tio, kiel veterana legomkulturisto.”

Post kiam Fan Chi eliris, la Majstro diris: “Malgranda homo ja estas Fan Xu¹⁶⁵! Se la reganto amas la decon, la popolo ne kuraĝas ne respekti lin. Se li agas juste, la popolo ne kuraĝas ne submeti sin al lia ekzemplo. Se li estas sincera, la popolo ne kuraĝas ne diri la veron. Kiam ĉi tiuj aferoj ekzistas, homoj el ĉiuj lokoj venos al li, portante surdorse siajn infanojn. Kial do li bezonas sin okupi pri terkulturado?”

5. La Majstro diris: “Homo povas reciti la Tricent Poemojn¹⁰, sed, postenigite al registara ofico, li ne scias kiel agi, aŭ, sendite al alia regno kun komisio, li ne kapablas lerte fari traktadon sen helpo de aliaj. Eĉ se tia homo estas leginta multajn librojn, kian utilon do tio povas alporti al li?”

6. La Majstro diris: “Kiam la reganto dece kondutas, ĉio iras bone, eĉ se li ne donas ordonojn. Sed se li ne dece kondutas, eĉ se li donas ordonojn, oni ne obeas lin.”

7. La Majstro diris: “La regado de Lu-regno kaj tiu de Wei-regno estas fratoj.”

8. Koncerne Jing¹⁶⁶, princidon de Wei, la Majstro diris: “Li bone scias la familian ekonomion. Kiam li komencis havi posedaĵon, li diris: ‘Ha! preskaŭ sufiĉe! Kiam la posedaĵo iom plimultiĝis, li diris: ‘Ha! preskaŭ komplete!’ Kiam li fariĝis riĉa, li diris: ‘Ha! preskaŭ lukse!’”

9. Kiam la Majstro veturis al Wei-regno, Ran You³⁵ kondukis lian kaleŝon. La Majstro diris: “Kiel grandnombra estas la popolo !” Ran You demandis: “Nun kiam la popolo estas grandnombra, kio pli devas esti farita por ili?” “Riĉigu ilin,” estis la respondo.

“Kaj kiam ili jam estas riĉigitaj, kio pli devas esti farita?” La Majstro respondis: “Instruu ilin.”

10. La Majstro diris: “Se iu princo komisius al mi la regadon de sia regno, en la daŭro de dek du monatoj mi farus ion konsiderindan. En tri jaroj la regado estus perfektigita.”

11. La Majstro diris: “ ‘Se bonaj homoj regus regnon dum cent jaroj sinsekve, ili povus venki la brutalecon kaj nenecesigi la mortpunojn.’¹⁶⁷ Pravaj ja estas ĉi tiuj vortoj!”

12. La Majstro diris: “Se aperus vere bona reĝo, li certe bezonus tridek jarojn, por igi la virton regi en la lando.”

13. La Majstro diris: “Se la reganto faras sian konduton laŭdeca, kian malfacilon li havos en sia regado?”

Se li ne povas fari sian konduton laŭdeca, kiel do li povus laŭdecigi aliajn?”

14. Kiam Ran You³⁵ revenis el sia oficejo, la Majstro demandis al li: “Kial vi revenas tiel malfrue?” Li respondis: “Mi havis registarajn aferojn.” La Majstro diris: “Certe nur ordinarajn aferojn. Se troviĝas gravaj aferoj, kvankam mi nun ne estas en ofico, mi devus esti konsultita pri ili.”

15. La princo Ding⁴⁶ demandis: “Ĉu ekzistas tia afero, ke unu sola frazo povus prosperigi regnon?”

Konfuceo respondis: “Tia rezulto ne povas esti atendata el unu frazo. Tamen troviĝas popoldiro — ‘Princi estas malfacile; ministry ne estas facile.’ Se princo, sciante la malfacilecon esti princo, regas kun zorga konscienco, ĉu tio ne estas proksima al la prosperigo de regno fare de unu sola frazo?”

La princo Ding ree demandis: “Ĉu ekzistas tia afero, ke unu frazo povus ruinigi regnon?”

Konfuceo respondis: “Tia rezulto ne povas esti atendata ke unu frazo. Tamen troviĝas popoldiro — ‘Mi, estante princo, havas nenian alian plezuron, ol mi neniam estas malobeata en tio, kion mi diras.’ Se la vortoj diritaj de reganto estas bonaj kaj neniu malobeas lin, ĉu ankaŭ do ne estas bona? Sed se la vortoj diritaj de li ne estas bonaj, kaj neniu malobeas lin, ĉu tio ne estas proksima al la ruinigo de regno fare de unu sola frazo?”

16. La duko de She¹¹⁰ demandis pri la regado. La Majstro diris: “Bona regado estiĝas tiam, kiam tiuj, kiuj

loĝas proksime, estas feliĉaj, kaj tiuj, kiuj loĝas malproksime, estas altirataj.”

17. Zixia⁶, fariĝinte prefekto de Jufu¹⁶⁸, demandis pri la regado. La Majstro diris: “Ne deziru troan rapidecon, nek rigardu malgrandajn profitojn. Se vi deziras troan rapidecon, vi ne atingos sukceson; kaj se vi fiksas la rigardon sur malgrandaj profitoj, grandaj aferoj ne estos plenumitaj.”

18. La duko de She¹¹⁰ informis Konfuceon: “En mia hejmloko estas homo honesta. Foje lia patro ŝtelis ŝafon, kaj li denunciis sian patron pri la stelo.” Konfuceo diris: “En mia hejmloko la honestuloj estas diferencaj de tiu homo. La patro kaŝas la miskonduton de la filo, kaj la filo kaŝas la miskonduton de la patro. Honesteco ja troviĝas en tio ĉi.”

19. Fan Chi¹³ demandis pri la perfekta virto. La Majstro diris: “Ĉi estas, en la ĉiutaga vivo, seriozeco; en la administrado de aferoj — diligenteco; en rilatoj kun aliaj — sincereco. Ĉi tiuj kvalitoj ne povas esti neglektataj eĉ inter krudaj nekulturitaj triboj.”

20. Zigong⁹ demandis: “Kiajn kvalitojn oni devas posedi, por esti klerulo?” La Majstro diris: “Tiu, kiu en sia konduto konservas hontosenton kaj, sendite al alia regno, ne malhonoras komision de sia princo, meritas esti klerulo.”

Zigong daŭrigis: “Ĉu vi permesas al mi demandi, kiu povas esti rigardata kiel klerulo malpli bona?” La Majstro diris: “Tiu, kiun liaj parencoj laŭdas pri lia

fideleco al siaj gepatroj, kaj kiun liaj samlokanoj kaj najbaroj laŭdas pri lia respektemo al siaj pli aĝaj fratoj.”

La disĉiplo ree demandis: “Ĉu vi permesas al mi demandi pri klerulo ankoraŭ malpli bona?” La Majstro diris: “Li estas nepre sincera en tio, kion li diras, kaj nepre efektivigas tion, kion li faras. Li estas obstina malgranda homo! Tamen li povas esti rigardata kiel klerulo ankoraŭ malpli bona.”

Zigong fine demandis: “Kia specaj do estas tiuj de la nuna tempo, kiuj sin okupas pri registaraj aferoj? ?” La Majstro diris: “Ba! tiuj malgrandanimuloj ne meritas konsideron!”

21. La Majstro diris: “Se mi ne povus trovi homojn sekvantajn la Ĝustan Mezon¹⁰³”, kun kiuj mi povus havi rilatojn, mi preferus la fervorajn kaj la singardemajn. La fervoraj havas entreprenemon; la singardemaj detenas sin de tio, kio estas malbona.”

22. La Majstro diris: “La suduloj havas proverbon: ‘Homo sen konstanteco ne povas esti eĉ sorĉisto-kuracisto.’ Prave! ”

En « Libro de Ŝanĝiĝoj »¹⁰⁹ estas dirite: “Nekonstanta en sia virto, li pli aŭ malpli frue hontigos sin mem.” La Majstro diris: “Tio signifas nur, ke al tiu, kiu ne havas konstantecon, ne necesas fari divenadon per Ok Diagramoj¹³⁵.”

23. La Majstro diris: “La nobluloj akordiĝas, sed ne flatas; la malgrandaj homoj flatas, sed ne akordiĝas.”

24. Zigong⁹ demandis: “Kion vi diras pri homo,

kiu estas laŭdataj de ĉiuj loĝantoj en sia vilaĝo?” La Majstro respondis: “Tio ne estas sufiĉa por doni mian aprobon al li.”

“Kaj kion vi diras pri tiu, kiu estas malamata de ĉiuj loĝantoj en sia vilaĝo?” La Majstro diris: “Ankaŭ tio ne estas sufiĉa por fari konkludon. Pli bone estus se, inter la loĝantoj en lia vilaĝo, la bonaj laŭdus lin kaj la malbonaj malamus lin.”

25. La Majstro diris: “Servi sub noblulo estas facile kaj plaĉi al li estas malfacile. Se vi penas plaĉi al li en tia maniero, kiu ne estas konforma al la virto, vi neniel povas plaĉi al li. Sed en lia dungado de homoj, li uzas ilin laŭ ilia kapablo. Servi sub malgranda homo estas malfacile kaj plaĉi al li estas facile. Se vi penas plaĉi al li, kvankam la maniero ne estas konforma al la virto, vi povas facile plaĉi al li. Sed en lia dungado de homoj, li postulas, ke ili estu kapablaj je ĉio.”

26 . La Majstro diris: “La nobluloj estas dignoplenaj, sed neniam arogantaj; la malgrandaj homoj estas arogantaj, sed neniam dignoplenaj.”

27. La Majstro diris: “Tiu, kiu estas firma, persistema, modesta kaj diskreta, estas proksima al la perfekta virto.”

28. Zilu⁶² demandis: “Kiajn kvalitojn oni devas posedi, por esti klerulo?” La Majstro diris: “Li devas esti bonintence kritikema kaj indulge milda: — inter siaj amikoj bonintence kritikema; inter siaj fratoj indulge milda.”

29. La Majstro diris: “Se homo vere bona instruas la popolon sep jarojn, ili ankaŭ povos esti senditaj kiel soldatoj en militon.”

30. La Majstro diris: “Sendi netrejnitan popolon en militon signifas ilin forĵeti.”

ĈAPITRO XIV MAN WEN

1. Xian¹⁶⁹ demandis, kio estas honto. La Majstro diris: “Kiam la regno estas administrata de saĝa kaj honesta registaro, oni povas esti ĝia oficisto kaj ricevi salajron: sed, kiam la regno estas administrata de malluma kaj koruptita registaro, estas honto funkcii kiel ĝia salajrata oficisto.”

“Ĉu tiuj, kiuj estas liberaj de superemo, fanfaronemo, malpardonemo kaj avido, povas esti nomataj homoj de perfekta virto?” La Majstro diris: “Ili povas esti rigardataj kiel bonaj homoj malfacile troveblaj, sed ĉu ili povas esti kalkulataj kiel homoj de perfekta virto, mi ne scias.”

2. La Majstro diris: “La kleruloj, kies koro kroĉiĝas al komforto, ne meritas esti rigardataj kiel kleruloj.”

3. La Majstro diris: “Kiam la regno estas bone regata, oni estas honesta en siaj paroloj kaj agoj. Kiam la regno estas malbone regata, oni estas honesta en siaj agoj sed deteniĝema en siaj paroloj.”

4. La Majstro diris: “Tiu, kiu havas moralan povon, certe posedas ankaŭ famajn dirojn; sed tiu, kiu havas famajn dirojn, ne nepre posedas moralan povon. La virta homo certe posedas kuraĝon; sed kuraĝa homo ne nepre estas virta.”

5. Nangong Kuo¹⁷⁰ demandis Konfuceon: “Yi¹⁷¹ estis lerta en arkpafado, kaj Ao¹⁷² estis bona kondukanto de ŝipbatalo, sed neniu el ili mortis naturan

morton. Yu¹²⁵ kaj Ji¹⁷³ mem faris terkulturadon, kaj ili fariĝis posedantoj de la lando. Kial do estis tiel? ” La Majstro faris nenian respondon.

Post kiam Nangong Kuo eliris, la Majstro diris: “Noblulo ja estas tiu ĉi homo! Estimanto de alta moralo ja estas tiu ĉi homo!”

6. La Majstro diris: “Inter homoj en alta situacio probable ekzistas tiuj, kiuj ne estas virtaj; sed malgranda homo, kiu samtempe estas virta, nemam ekzistas.”

7. La Majstro diris: “Se vi amas iun homon, kiel vi povas ne penlaborigi lin? Kaj se vi estas lojala al li, kiel vi povas ne doni al li admonon?”

8. La Majstro diris: “En preparo de la leĝaj dokumentoj kaj dekretoj de Zheng-regno Bi Chen¹⁷⁴ unue faris la malneton; Shi Shu¹⁷⁵ ekzamenis ĝian enhavon kaj donis siajn opiniojn; Ziyu¹⁷⁶, diplomato, poste faris aldonojn aŭ modifon; kaj, fine, Zichan⁶⁸ de Dongli¹⁷⁷ donis al ĝi finan poluradon.”

9. Oni demandis pri Zichan. La Majstro diris: “Li estis bonkora homo.”

Li demandis pri Zixi¹⁷⁸. La Majstro diris: “Tiu homo! Tiu homo!”

Li demandis pri Guan Zhong⁴⁹. La Majstro diris: “Li estis kompetentulo. Li senigis la ĉefon de Bo-familio¹⁷⁹ je lia feŭdo Pianyi¹⁸⁰ kun tricent familioj kaj igis lin manĝi nur krudan grenon, tamen tiu eldiris neniun plendan vorton ĝis la morto.”

10. La Majstro diris: “Vivi en malriĉeco sen plendoj

estas malfacile. Vivi en riĉeco sen fiero estas facile.”

11. La Majstro diris: “Meng Gongchuo¹⁸¹ estas pli ol taŭga por esti vasalo al la familioj de Zhao kaj Wei¹⁸², sed li ne estas taŭga por esti granda oficisto de la malgrandaj regnoj Teng kaj Xue¹⁸³.”

12. Zilu⁶² demandis, kio konsistigas kompletan homon. La Majstro diris: “Supozu homon kun la saĝo de Zang Wuzhon¹⁸⁴, la malavideco de Meng Gongchuo¹⁸¹, la braveco de Zhuangzi de Bian¹⁸⁵, kaj la multflankaj talentoj de Ran Qiu⁶³ kaj aldonu al tiuj ĉi kvalitoj la kulturitecon pri la decreguloj kaj muziko; tia homo povus esti kalkulata kiel kompleta homo.” Li poste aldonis: “Sed kial do necesas al la nuntempa kompleta homo havi ĉi tiujn kvalitojn? La homo, kiu, vidante profiton, pensas pri justeco; kiu, vidante danĝeron, estas preta fordoni sian vivon; kaj kiu ne forgesas siajn malnovajn promesojn, kiel ajn longe li vivas en mizero; tia homo nun povas esti kalkulata kiel kompleta homo.”

13. La Majstro demandis Gongming Jia¹⁸⁶ pri GongshuWen¹⁸⁷: “Ĉu estas vere, ke via mastro ne parolas, nek ridas, nek faras prenon?”

Gongming Jia respondis: “Tio estas malvera raporto. Mia mastro parolas tiam, kiam estas la tempo por paroli, kaj tial oni ne antipatias liajn parolojn. Li ridas tiam, kiam prezentiĝas okazo por ridi, kaj tial oni ne antipatias lian ridon. Li faras prenon tiam, kiam la preno estas konforma al justeco, kaj tial oni ne antipatias lian prenon.”

La Majstro diris: “Ĉu tiel estas? Ĉu vere tiel estas?”

14. La Majstro diris: “Zang Wuzhong¹⁸⁴, sin apogante sur la de li posedata urbo Fang¹⁸⁸, postulis, ke la princo de Lu-regno nomumu liajn posteulojn ministroj kaj nobeloj. Kvankam oni diris, ke li ne uzis forton kontraŭ sia suvereno, tamen tion nune kredas.”

15. La Majstro diris: “La princo Wen de Jin¹⁸⁹ estis ruza kaj ne honesta. La princo Huan¹⁹⁰ de Qi estis honesta kaj ne ruza.”

16. Zilu⁶² diris: “La princo Huan¹⁹⁰ kaŭzis, ke lia pli aĝa frato Jiu¹⁹¹ estis mortigita, kaj pro tio Shao Hu¹⁹² sin mortigis kun la mastro, sed Guan Zhong⁴⁹ ne mortis.” Poste li demandis: “Ĉu oni povas diri, ke Guan Zhong estis homo sen virto?” La Majstro diris: “La princo Huan multfoje kunvenis kun diversregnaj princoj kaj tiel evitis uzi armilojn kaj militĉarojn: tio efektiviĝis dank’ al la influo de Guan Zhong. Jen la virto de Guan Zhong. Jen la virto de Guan Zhong.”

17. Zigong⁹ diris: “Ĉu oni povas diri, ke Guan Zhong estis homo sen virto? Kiam la princo Huan kaŭzis, ke lia pli aĝa frato estis mortigita, Guan Zhong ne mortis kun li. Plie, li eĉ fariĝis ĉefministro al Huan.” La Majstro diris: “Guan Zhong funkciis kiel ĉefministro al la princo Huan, helpis al li fariĝi ĉefo super ĉiuj princoj, kaj ĝustigis ĉion ne ĝustan sub la ĉielo. Nun la popolo ankoraŭ ĝuas la donacojn, kiujn li faris al ni. Sen Guan Zhong nun ni eble ankoraŭ portus niajn harojn

neligitajn, kaj niaj jakoj ankoraŭ butonumiĝus ĉe la maldekstra flanko¹⁹³! Ĉu oni povus postuli de li la malgrandan fidelecon de ordinaraj viroj kaj ordinaraj virinoj, kiuj sin mortigus en valo, sen kono de aliaj?”

18. La granda oficisto Xun¹⁹⁴, kiu antaŭe estis vasalo de Gongshu Wen¹⁸⁷, estis rekomendita de Gongshu Wen kaj, kune kun tiu, estis promociita al ministreco de la princo. La Majstro, aŭdinte pri tio, diris: “Gongshu ja meritas la postmortan titolon Wen (la Virta).”

19. Kiam la Majstro parolis pri la senmoraleco de la princo Ling de Wei¹⁹⁵, Ji Kang²³ diris: “Havante tian senmoralan naturon, kial do li ne perdas sian regnon?” Konfuceo diris: “Zhongshu Yu¹⁹⁶ prizorgas la akceptadon de liaj aliregnaj gastoj. Zhu Tuo⁹⁹ administras lian prapatran templon. Wangsun Jia⁴¹ komandas la armeojn. Kun la subuloj kiaj tiuj ĉi, kiel li povus perdi sian regnon?”

20. La Majstro diris: “Tiu, kiu parolas sen modesteco, trovos malfacila efektivigi siajn vortojn.”

21. Chen Cheng¹⁹⁷ murdis la princon Jian¹⁹⁸ de Ji-regno. Aŭdinte pri tio, Konfuceo sin banis, iris al la princa palaco de Lu-regno kaj informis la princon Ai²²: “Chen Heng¹⁹⁷ mortigis sian suverenon. Mi petas, ke vi lin punu.” La princo diris: “Informu la ĉefojn de la tri familio¹⁹⁹ pri tio.”

Konfuceo retiriĝis kaj diris: “Ĉar mi iam estis granda oficisto, mi ne kuraĝas ne raporti tion, sed mia princo diris al mi: ‘Informu la ĉefojn de la tri familioj pri

tio'."

Li iris al la ĉefoj kaj informis ilin, sed ili ne volis agi. Konfuceo do diris: "Ĉar mi iam estis granda oficisto, mi ne kuraĝas ne raporti tion al vi."

22. Zilu⁶² demandis kiel servi la princon. La Majstro diris: "Ne trompu lin kaj, se necese, kontraŭstaru lin ĝuste en la vizaĝon."

23. La Majstro diris: "La nobluloj supreniras al la virto kaj justo; la malgrandaj homoj malsupreniras al riĉeco kaj profito."

24. La Majstro diris: "En la antikveco oni lernis kun la celo perfektigi sin mem. Nuntempe oni lernas kun la celo rikolti alies laŭdon."

25. Qu Boyu²⁰⁰ sendis senditon kun amikaj salutoj al Konfuceo. Konfuceo sidigis la senditon kaj demandis lin: "Pri kio nun via mastro sin okupas?" La sendito respondis: "Mia maestro deziras malmultigi siajn kulpojn, sed li ankoraŭ ne sukcesas."

Post kiam la sendito eliris, la Majstro diris: "Vere bona sendito! Vere bona sendito!"

26. La Majstro diris: "Tiu, kiu ne okupas tiun postenon, ne enmiksiĝas en ĝiajn administrajn aferojn."

Majstro Zeng⁵ diris: "La nobluloj, en siaj pensoj, ĉiam estas sur sia posteno."

27. La Majstro diris: "La nobluloj hontas pri tio, ke liaj paroloj superas liajn agojn."

28. La Majstro diris: "La morala naturo de la noblulo estas triobla, sed ĝin mi ne povas posedi. Virta,

li estas libera de maltrankvilo; saĝa, li estas libera de konfuzo; kuraĝa, li estas libera de timo.” Zigong⁹ diris: “Majstro, tio ja estas la morala naturo de vi mem.”

29. Zigong havis la kutimon paroli pri alies mankoj. La Majstro diris: “Ĉu vi, Ci¹¹, jam atingis altan gradon de virto? Koncerne min, mi ne havas liberan tempon por tio.”

30. La Majstro diris: “Min maltrankviligas ne tio, ke oni ne konas min, sed tio, ke al mi mankas kapablo.”

31. La Majstro diris: “Ĉu tiu, kiu ne anticipas alies trompemon, nek senbaze suspektas alian pri malsincereco, kaj tamen estas kapabla antaŭtempe ilin percepti, ne estas homo vere saĝa?”

32. Weisheng Mu²⁰¹ diris al Konfuceo: “Qiu²⁰², kial vi tiel iradas de loko al loko? Ĉu vi ne jam fariĝis parolanto kun glata lango?” Konfuceo diris: “Mi ne kuraĝas ludi la rolon de tia parolanto, sed mi malamas tiujn obstinajn homojn.”

33. La Majstro diris: “Ĉevalo estas laŭdinda ne pro sia forto, sed pro siaj bonaj kvalitoj.”

34. Iu diris: “Kion vi diras pri la principo, ke ofendo devas esti rekompencita per bonfaro?” La Majstro diris: “Tiuokaze per kio do vi rekompencos bonfaron? Prefere rekompencu ofendon per justo, kaj rekompencu bonfaron per bonfaro.”

35. La Majstro diris: “Ho ve! troviĝas neniu, kiu min komprenus.” Zigong⁹ diris: “Kiel povas esti, ke neniu vin komprenas?” La Majstro diris: “Mi ne

grumblas kontraŭ Ĉielo, nek murmuris kontraŭ homoj, ĉar mi studas mondajn aferojn kaj konas la volon de Ĉielo. — Tiu. Kiu min komprenas, probable estas nur Ĉielo !”

36 . Gongbo Liao²⁰³ kalumniis Zilu⁶² al Jisun²⁰⁴. Zifu Jingbo informis Konfuceon pri tio, dirante: “Lia moŝto certe lasas sin trompita de Gongbo Liao, sed mi ankoraŭ havas sufiĉan forton por mortigi tiun kaj elmontri ties kadavron en la bazaro.”

La Majstro diris: “Ĉu miaj principoj povos efektiviĝi? — Tio estas destinita de la sorto. Ĉu ili neniam povos efektiviĝi? — Ankaŭ tio estas destinita de la sorto. Kion do Gongbo Liao povas fari kontraŭ mia sorto?”

37. La Majstro diris: “Iuj eminentuloj ermitiĝas por eviti la mondon. Iuj ermitiĝas por eviti sian propran landon . Iuj ermitiĝas por eviti malrespektajn mienojn. Iuj ermitiĝas por eviti malicajn vortojn.”

Poste la Majstro aldonis: “Estas sep homoj²⁰⁶, kiuj jam ermitiĝis.”

38. Foje Zilu⁶² pasigis nokton apud Shimen²⁰⁷. La sekvantan matenon, kiam li estis enironta la urbon, la gardisto de la urbopordego diris al li: “De kiu vi venas?” Zilu diris: “De s-ro Kong²⁰⁸.” “Ĉu li estas tiu,” diris la gardisto, “kiu scias, ke io estas nefarebla, kaj tamen nepre volas tion fari?”

39. Iun tagon, kiam la Majstro ludis sur ŝtona frapinstrumento en Wei-regno, in homo, portante pajlan

korbon, preterpasis la pordon de la domo, kie Konfuceo estis, kaj diris: “Tiu, kiu frapas la muzikilon, havas koron pensoplenan.” Iom poste li aldonis: “Kiel fiaj estas la ideoj, kiujn tiuj sonoj montras! Per la sonoj li kvazaŭ plendas, ke oni donas nenian atenton al li. Se estas tiel, li devas simple forĵeti sian deziron pri publika enoficiĝo. ‘Profundan akvon oni devas travadi kun la vestoj surportataj; malprofundan akvon oni povas travadi kun la vestoj supren levitaj.’”²⁰⁹

La Majstro diris: “Kiel obstina li estas! Neniu povas lin konvinki.”

40. Zizhang²¹ diris: “Kion signifas la frazo el 《Libro de Historio》²⁴ ‘Gaozong²¹⁰ dum la tempo de la landa funebro, ne parolis tri jarojn’ ? ” La Majstro diris “Kial vi menciis nur Gaozong? Ĉiuj antikvuloj tiel agis. Post kiam la suvereno mortis, la tronheredinto ne parolis pri administraj aferoj tri jarojn, kaj dum la tempo ĉiuj oficistoj prenis instrukciojn de la ĉefministro.”

41. La Majstro diris: “Kiam la regantoj amas observi la decregulojn, la popolo estas preta obei iliajn ordonojn.”

42. Zilu⁶² demandis, kiaj devas esti la nobluloj. La Majstro diris: “Ili devas kulturi sin, por esti respektemaj kaj modestaj.”

“Kaj ĉu tio estas ĉio?” demandis Zilu. “Ili kulturas sin, por povi doni trankvilon kaj feliĉon al aliaj,” estis la respondo.

“Kaj ĉu tio estas ĉio?” ree demandis Zilu. La

Majstro diris: “Ili kulturas sin, por povi doni trankvilon kaj feliĉon al la tuta popolo — tion ĉi eĉ Yao kaj Shun¹⁰⁴ siatempe ne povis plene efektiviĝi.”

43. Yuan Rang²¹¹ sidis kun disigitaj kruroj²¹² kaj tiel atendis la alvenon de la Majstro. La Majstro diris al li: “Kiam vi estis juna, vi kondukis ne laŭ la deco. Kiam vi estis plenaĝa, vi faris nenion valoran. Kaj nun, kiam vi vivas ĝis maljuneco, vi estas homo malutila!” Ĉe la fino de la parolo li frapis lin sur la kruron per sia promenbastono.

44. Knabo de Quedang²¹³ venis por porti mesaĝon al Konfuceo. Oni demandis Konfuceon: “Ĉu tiu ĉi knabo havas la deziron fari progresojn en sia lernado?” La Majstro diris: “Mi observis, ke li amas okupi la sidlokon por plenaĝulo; mi observis, ke li iras ŝultro ĉe ŝultro kun siaj pliaĝuloj. Li ne estas tia knabo, kiu penas fari progresojn en sia lernado. Li deziras nur rapide fariĝi plenaĝulo.”

ĈAPITRO XV WEI LING GONG

1. La princo Ling de Wei¹⁹⁶ demandis Konfuceon pri la batalarango kaj Konfuceo diris: “Mi aŭdis pri oferceremonioj, sed mi ne lernis militajn aferojn.” En la sekvanta tago li do foriris de Wei-regno.

2. Kiam Konfuceo estis en Chen²¹⁴, lia provianto elĉerpiĝis, kaj liaj sekvantoj estis tiel malsanaj, ke ili eĉ ne povis ellitiĝi. Zilu⁶², kun evidenta malkontenteco, diris: “Ĉu ankaŭ la noblulo devas suferi tian mizeron?” La Majstro diris: “La noblulo, suferante mizeron, restas noblulo, sed la malgranda homo, kiam li estas en mizero, permesas al si agi senbride kaj kontraŭdece.”

3. La Majstro diris: “Ci¹¹, ĉu vi pensas, ke mi estas tia homo, kiu lernas multajn aferojn kaj povas konservi ilin en la memoro?” Zigong respondis: “Jes. — Ĉu ne estas tiel?” “Ne,” estis la respondo, “mi havas unu bazan ideon, per kiu mi interligas ilin ĉiujn.”

4. La Majstro diris: “You²⁰! Tiuj, kiuj scias la virton, estas tre malmultaj.”

5. La Majstro diris: “Eble Shun¹²⁴ estis la sola suvereno, kiu povis efike regi sen penoj. Kion li faris? Li faris nenion alian krom gravmiene sidi sur sia trono.”

6. Zizhang²¹ demandis, kiel oni devas konduki, por esti ĉie ŝatata. La Majstro diris: “Liaj paroloj estu sinceraj kaj veraj, kaj liaj agoj honestaj kaj seriozaj — tia konduto povas esti ŝatata eĉ inter la krudaj triboj de la Sudo aŭ la Nordo. Se liaj paroloj ne estas sinceraj kaj

veraj, kaj liaj agoj ne honestaj kaj seriozaj, ĉu ili povus, kun tia konduto, esti ŝatataj eĉ en sia najbaraĵo? Kiam li estas staranta, lasu al li vidi la vortojn ‘sincereco, vereco, honesteco kaj seriozece’, kvazaŭ ili aperus antaŭ liaj okuloj. Kiam li estas en kaleŝo, lasu al li vidi ilin, kvazaŭ ili estus alfiksitaj al la transversa lignopeco antaŭ li. Tiamaniere li povas esti ĉie ŝatata.” Zizhang do skribis ĉi tiun konsilon sur la rubandon de sia robo.

7. La Majstro diris: “Vere nefleksebla estis Shi Yu²¹⁵! Kiam la regno estis bone regata, li estis kiel sago. Kiam la regno estis malbone regata, li estis ankaŭ kiel sago. Ja noblulo estas Qu Boyu²⁰⁰! Kiam la regno estas bone regata, li estas en ofico. Kiam la regno estas malbone regata, li povas kaŝi siajn principojn kaj ermitiĝi.”

8. La Majstro diris: “Ne paroli al tiu, kiu povus esti alparolata, estas perdi ŝancon; paroli al tiu, kiu ne povus esti alparolata, estas malŝpari vortojn. Tiu, kiu estas vere saĝa, neniam perdas ŝancon, nek malŝparas siajn vortojn.”

9. La Majstro diris: “Tiu, kiu sin dediĉas al la virto, ne volas konservi sian vivon per difekto al sia virto. Ili estas pretaj eĉ oferi sian vivon, por konservi sian virton.”

10. Zigong⁹ demandis pri la praktikado de la virto. La Majstro diris: “La metiisto, kiu deziras bone fari sian laboron, devas antaŭ ĉio akriigi siajn ilojn. Kiam vi loĝas en iu regno, vi devas servi la indajn inter ĝiaj grandaj oficistoj kaj amikiĝi kun la virtaj inter ĝiaj

kleruloj.”

11. Yan Yuan⁸¹ demandis kiel administri la regionon. La Majstro diris: “Sekvu la kalendaron de Xia²¹⁶. Veturu en la kaleŝo de Yin²¹⁷. Portu la ceremonian ĉapon de Zhou²⁷. Ludu la muzikaĵojn de Shao⁵² kaj Wu⁵³. Forĵetu la kantojn de Zheng²¹⁸, kaj fremdigu vin de flatuloj. La kantoj de Zheng estas malĉastaj, kaj flatuloj estas danĝeraj.”

12. La Majstro diris: “Tiu, kiu ne direktas siajn pensojn malproksimen, certe trovos malĝojon en la proksimeco.”

13. La Majstro diris: “Ba! Mi neniam vidis homon, kiu amus la virton kiel la belecon.”

14. La Majstro diris: “Ĉu Zang Wenzhong⁷⁰ ne similis homon, kiu ŝtelis sian postenon²¹⁹? Sciante pri la virto kaj la talentoj de Hui de Liuxi²²⁰, li komisiis al li nenian oficon.”

15. La Majstro diris: “Tiu, kiu multe riproĉas sin kaj malmulte riproĉas aliajn, gardu sin fariĝi objekto de rankoro.”

16. La Majstro diris: “Se iu ne ofte diras ‘Kion mi devas fari? Kion mi devas fari?’, mi vere ne scias, kion mi devas fari kontraŭ li!”

17. La Majstro diris: “Tiu, kiu kunestas la tutan tagon sen paroli pri justeco kaj nur amas elmontri sian etan inteligentecon, ja estas malfacile instrueblaj.”

18. La Majstro diris: “La nobluloj rigardas la justecon kiel la esencon. Ili plenumas ĝin laŭ la decreguloj. Ili eldiras ĝin per humilaj vortoj. Ili

kompletigas ĝin per sincereco. Tiaj homoj ja estas nobluloj.”

19. La Majstro diris: “La nobluloj ĉagreniĝas nur pro tio, ke al ili mankas kapablo. Ili ne ĉagreniĝas pro tio, ke oni ilin ne konas.”

20. La Majstro diris: “Tio, kion la nobluloj timas, estas ke ilia nomo ne estos menciata kun laŭdo post ilia morto.”

21. La Majstro diris: “La nobluloj metas postulojn al si mem; la malgrandaj homoj metas postulojn al aliaj.”

22. La Majstro diris: “La nobluloj estas dignaj, sed ne malpacas kun aliaj. Ili estas societemaj, sed apartenas al neniu klano.”

23. La Majstro diris: “La nobluloj ne promocias iun nur pro ties vortoj, nek ignoras bonajn vortojn pro la persono, kiu ilin diras.”

24. Zigong⁹ demandis: “Ĉu ekzistas unu vorto, kiu povus servi kiel kondutregulo por la tuta homa vivo?” La Majstro diris: “Probable ‘reciprokeco’ estas tia vorto. Ĝi signifas: Kion vi ne deziras fari al vi mem, tion vi ne faru al aliaj.”

25. La Majstro diris: “En miaj paroloj pri aliaj mi ĉiam min detenas kaj de laŭdado kaj de mallaŭdado. Sed se mi malgraŭe laŭdas iun, tion mi faras nepre post mia ekzameno de lia personeco. La popolo de Xia²⁶, Shang²⁵ kaj Zhou-dinastioj²⁷ tiel agis, jen kial ili sekvis la ĝustan vojon.”

26. La Majstro diris: “Mi ankoraŭ povis vidi blankojn en tekstoj de kronikoj. Tiu, kiu havis ĉevalon, volis pruntedoni ĝin al alia por rajdi²²¹. Nun, ho ve! Tia homo ne ekzistas.”

27. La Majstro diris: “Dolĉaj vortoj difektas la virton. Manko de toleremo en malgrandaj aferoj difektas grandajn celojn.”

28. La Majstro diris: “Kiam ĉiuj malŝatas iun, esploro estas necesa. Kiam ĉiuj ŝatas iun, esploro ankoraŭ estas necesa.”

29. La Majstro diris: “La homo povas grandigi la veron; la vero ne povas grandigi la homon.”

30. La Majstro diris: “Havi kulpojn sed ne korekti ilin — jen vera kulpo.”

31. La Majstro diris: “Mi iam pasigis tutan tagon sen manĝado kaj tutan nokton sen dormo, por meditadi, sed mi trovis nenian utilon en tio. Pli bone estus fari lernadon.”

32. La Majstro diris: “La penado de nobluloj celas la veron, ne nutraĵon. Eĉ tiuj, kiuj sin okupas pri terkulturado, iafoje suferas malsaton, sed lernado povas konduki al alta salajro. La noblulo estas maltrankvila pri tio, ke eble li ne akiros la veron; li ne estas maltrankvila pri tio, ke malriĉeco povos veni sur lin.”

33. La Majstro diris: “Kiam la saĝo de homo estas sufiĉa por atingi ian rangon, sed lia virto ne estas sufiĉa por ebligi al li teni ĝin, eĉ se li povas akiri ĝin, li ĝin certe perdos. Kiam lia sagĝo estas sufiĉa por atingi ian

rangon kaj li havas virton sufiĉan por firme teni ĝin, se li ne povas regi kun digno, la popolo ne respektos lin. Kiam lia saĝo estas sufiĉa por atingi ian rangon kaj li havas virton sufiĉan por firme teni ĝin kaj ankaŭ povas regi kun digno, sed se li ne penas movi la popolon laŭ la decreguloj — tiam ne plena boneco estos atingita.”

34. La Majstro diris: “La noblulo ne povas esti provita en malgrandaj aferoj, sed li povas esti komisiita je grandaj aferoj. La malgranda homo ne povas esti komisita je grandaj aferoj, sed li povas esti provita en malgrandaj aferoj.”

35. La Majstro diris: “Por la popolo la virto estas pli bezonata, ol akvo kaj fajro. Mi vidis tiujn, kiuj mortis pro vado en akvo aŭ pasado sur fajro, sed mi neniam vidis homon, kiu mortus pro irado de la vojo de virto.”

36. La Majstro diris: “Tian aferon, kia estas la plenumo de la virto, oni ne devas cedi eĉ al sia instruisto.”

37. La Majstro diris: “La nobluloj sin tenas je grandaj principoj kaj ne obstinas en plenumo de bagatelaj promesoj.”

38. La Majstro diris: “La ministro, en servado al sia princo, devas plenumi sian oficon kun zorga konscienco, rigardante sian salajron kiel flankan aferon.”

39. La Majstro diris: “Instruado konas neniajn kastojn.”

40. La Majstro diris: “Tiuj, kies principoj estas

malsamaj, ne konsiliĝas unu kun alia. ”

41. La Majstro diris: “Estas sufiĉe, se la vortoj povas klare esprimi la penson.”

42. Foje blinda muzik-majstro Mian²²² vizitis Konfuceon. Kiam li venis al la ŝtupoj, la Majstro diris: “Jen la ŝtupoj.” Kiam li venis al la sidmato, la Majstro diris: “Jen la sidmato.” Kiam ĉiuj jam sidigis, la Majstro informis lin: “Jen estas tiu kaj tiu; jen estas tiu ĉi kaj tiu ĉi.”

Post kiam majstro Mian eliris, Zigong⁹ demandis: “Ĉu tio estas la deca maniero paroli al la blinda muzik-majstro?” La Majstro diris: “Jes. Tio certe estas la deca maniero helpi la blindulon.”

ĈAPITRO XVI JI SHI

1 . La ĉefo de Ji-familio²⁸ intencis ataki Zhuanyu²²³. RanYou³⁵ kaj Jilu⁸² iris viziti Konfuceon kaj diris: “La ĉefo de Ji-familio baldaŭ komencos operacojn kontraŭ Zhuanyu.”

Konfuceo diris: “Ran You, ĉu ne estas vi, kiu meritas riproĉon? Koncerne Zhuanyu, ĝi antaŭ longe estis rajtigita de la antaŭaj reĝoj fari la oferadojn al la monto Dongmeng²²⁴. Cetere, ĝi kuŝas en la mezo de la teritorio de nia regno, kaj ĝia reganto estas vasalo rekte al la rego — kial do via ĉefo intencas ĝin ataki?”

Ran You diris: “Nia mastro volas tion fari; neniu el ni konsentas kun li.”

Konfuceo diris: “Ran You, Zhou Ren²²⁵ diris interalie la jenajn vortojn: ‘Kiam iu povas efike uzi sian kapablon, li enoficiĝas; se ne, li retiriĝas el la ofico.’ Se gvidanto ne subtenas blindulon ĉe lia ŝanceliĝo, nek levas lin ĉe lia falo, kiel do li povas esti bezonata? Kaj plie, via parolo estas erara. Se tigro aŭ rinocero forkuras el sia kaĝo, kaj se testudŝelo aŭ gemo difektiĝas en sia tenujo — kies kulpo do estas? ”

Ran You diris: “Sed nun la muregoj de Zhuanyu estas fortikaj kaj proksimaj al Bi²²⁶; se nia ĉefo nun ne prenas ĝin, estontece ĝi estos la kaŭzo de malĝojo de liaj posteuloj.”

Konfuceo diris: “Ran You, la noblulo malamas tiun, kiu rifuzas diri ‘Mi volas tion kaj tion’ kaj faras

klarigojn por sia miskonduto. Koncerne la reganton de iu regno aŭ la ĉefon de iu familio, mi aŭdis la jenon: ‘Li ne estas maltrankvila pri tio, ke lia popolo estas malriĉa, sed estas maltrankvila pri tio, ke la riĉaĵoj ne estas juste distribuitaj; li ne estas maltrankvila pri tio, ke lia popolo estas malgrandnombra, sed estas maltrankvila pri tio, ke ili estas dividitaj unuj kontraŭ aliaj.’ Kaj efektive, kiam ĉio estas juste distribuita, tiam malaperas malriĉeco; kiam ili ne estas dividitaj unuj kontraŭ aliaj, tiam malaperas nesufiĉeco de homoj; kaj kiam regas kontenteco, tiam okazas nenia ribelo. Se tia stato de aferoj ekzistas kaj tamen la popolo de foraj landoj ankoraŭ ne submetiĝas, tiam la reganto devas altiri ilin al si per plialtigo de sia kulturiteco kaj virto; kaj post kiam ili alvenas, li devas ilin kontentigi kaj trankviligi. Nun, kvankam vi ambaŭ, Jilu kaj Ran You, helpas vian mastron, tamen la popolo de foraj lokoj ne submetiĝas al li, kaj li ne povas altiri ilin al si. La regno mem estas dividita kaj ŝanceliĝanta, sed li povas fari nenion por konservi ĝin tuta kaj nun eĉ planas operacojn interne de nia regno. Mi timas, ke la kaŭzo de la malĝojo de Ji-familio ne estos Zhuanyu, sed troviĝos interne de la ekranego en la palaco de la princo de Lu²²⁷.”

2. Konfuceo diris: “Kiam la lando estas bone regat, ceremonioj, muziko kaj punaj militaj ekspedicioj devenas de la reĝo. Kiam la lando estas malbone regata, ceremonioj, muziko kaj punaj militaj ekspedicioj devenas de la princoj. Kiam ĉi tiuj aferoj devenas de la

princoj, ordinare malofte okazas, ke ili ne perdiĝas en dek generacioj. Kiam ĉi tiuj aferoj devenas de la grandaj oficistoj de la princoj, ordinare malofte okazas, ke ili ne perdiĝas en kvin generacioj. Kiam la vasaloj al la grandaj oficistoj tenas en siaj manoj la regpotencon de la regno, ordinare malofte okazas, ke ili ne perdiĝas en tri generacioj. Kiam justaj principoj regas en la lando, la administrado ne povas esti en la manoj de la grandaj oficistoj. Kiam justaj principoj regas en la lando, inter la ordinaraj popolanoj estas neniam diskutoj.”

3. Konfuceo diris: “La regpotenco de la regno nun estas for de la princo de Lu²²⁷ jam por kvin generacioj. La regado estas en la manoj de la grandaj oficistoj jam por kvar generacioj. Tial la posteuloj de la tri Huan-oj²²⁸ estas reduktitaj al multe malpli prospera stato.”

4. Konfuceo diris: “Troviĝas tri tipoj de amikeco, kiuj estas utilaj, kaj tri tipoj de amikeco, kiuj estas malutilaj. Amikeco kun la honesta homo, amikeco kun la sincera kaj amikeco kun la alte klera estas utilaj. Amikeco kun la flatema homo, amikeco kun la duvizaĝa kaj amikeco kun la falslanga estas malutilaj.”

5. Konfuceo diris: “Troviĝas tri tipoj de ĝojo, kiuj estas utilaj, kaj tri tipoj de ĝojo, kiuj estas malutilaj. Ĝojo en studo de ceremonioj kaj muziko, ĝojo en laŭdado pri bonaj kvalitoj de aliaj kaj ĝojo en amikeco kun honestaj kaj kapablaj amikoj estas utilaj. Ĝojo en hero, ĝojo en nenifarado kaj pasumado kaj ĝojo en luksega festenado estas malutilaj.”

6. Konfuceo diris: “Parolante kun noblulo, homo povas fari tri erarojn. Se li parolas tiam, kiam por li ne venas la vico paroli, tio estas nomata malpacienco. Se li ne parolas tiam, kiam por li venas la vico paroli, tio estas nomata kaŝo. Se li parolas sen rigardi la mienon de la noblulo, tio estas nomata blindeco.”

7. Konfuceo diris: “La noblulo devas sin gardi kontraŭ tri aferoj. En la juneco, kiam lia vivpulsado estas ankoraŭ nestabiliĝinta, li devas sin gardi kontraŭ volupto. En la maturiĝo, kiam lia vivpulsado estas forta, li devas sin gardi kontraŭ batalemo. En la maljuneco, kiam lia vivpulsado estas malforta, li devas sin gardi kontraŭ avideco.”

8. Konfuceo diris: “La nobluloj timas tri aferojn: ili timas la volon de Ĉielo, grandajn homojn kaj la vortojn de sanktaj saĝuloj. La malgrandaj homoj ne scias pri la volo de Ĉielo kaj tial ne timas ĝin. Ili malestimas la grandajn homojn kaj mokas la vortojn de sanktaj saĝuloj.”

9. Konfuceo diris: “Tiuj, kiuj naskiĝas kun la posedo de scioj, estas homoj de la plej alta klaso. Tiuj, kiuj lernas kaj tiel akiras sciojn, estas de malpli alta klaso. Tiuj, kiuj lernas post kiam ili renkontas malfacilaĵojn, estas de ankoraŭ malpli alta klaso. Koncerne tiujn, kiuj renkontas malfacilaĵojn kaj tamen ne lernas, ili apartenas al la plej malalta klaso de la popolo.”

10. Konfuceo diris: “Troviĝas naŭ aferoj, kiujn la

nobluloj devas konsideri. Ĉu ili vidas klare, kiam ili rigardas? Ĉu ili aŭdas klare, kiam ili aŭskultas? Ĉu ili estas mildaj en sia mieno? Ĉu ili estas respektemaj en sia konduto? Ĉu ili estas sinceraj en siaj paroloj? Ĉu ili estas konsciencaj en plenumo de aferoj? Ĉu ili devas demandi aŭ ne, kiam ili estas en dubo? Ĉu ili pensas pri la sekvoj, kiam ili estas en kolero? Ĉu ili pensas pri justeco, kiam ili vidas profiton?”

11. Konfuceo diris: “Vidi tion, kio estas bona, kaj sekvi ĝin kvazaŭ oni neniel povus ĝin atingi; vidi tion, kio estas nebona, kaj eviti ĝin kvazaŭ oni ne kuraĝus meti siajn fingrojn en bolantan akvon: — tiajn homojn mi vidis kaj tiajn vortojn mi aŭdis. Vivi ermite por konservi sian volon nefleksebla kaj praktiki justecon por efektiviĝi siajn principojn: — tiajn vortojn mi aŭdis, sed tiajn homojn mi ne vidis.”

12. La princo Jing de Qi¹⁶¹ havis kvar mil ĉevalojn, sed en la tago de lia morto la popolo ne laŭdis lin pro lia manko de virto. Boyi kaj Shuqi⁷⁸ mortis de malsato ĉe la piedo de la monto Shouyang²²⁹, kaj ĝis nun la popolo ankoraŭ laŭdas ilin. Ĉu tiu diro ne estas ilustrita per tio ĉi²³⁰?

13. Chen Kang²³¹ demandis Boyu²³²: “Ĉu de via patro vi aŭdis lecionojn diferencajn de tio, kion ni ĉiuj aŭdis?”

Boyu respondis: “Ne. Foje, kiam mi rapidpaŝe trapasis la korton, mi renkontis mian patron starantan tie sola, kaj li demandis al mi: ‘Ĉu vi jam lernis la

Poempjn¹⁰?’ Al mia respondo ‘Ankoraŭ ne’ li aldonis:

‘Se vi ne lernas la Poemojn, vi ne taŭgos por konversaciado.’ Mi do retiriĝis kaj lernis la Poemojn. Alian tagon, kiam mi rapidpaŝe trapasis la korton, mi ree renkontis lin starantan tie sola, kaj li demandis al mi: ‘Ĉu vi jam lernis la decregulojn?’ Al mia respondo ‘Ankoraŭ ne’ li aldonis: ‘Se vi ne lernas la decregulojn, vi ne scias kiel agi en viaj rilatoj kun aliaj homoj.’ Mi do retiriĝis kaj lernis la decregulojn. Mi aŭdis de li nur tiujn ĉi du aferojn.”

Chen Kang retiriĝis kaj diris kun ĝojo: “Mi demandis pri unu afero, kaj mi eksciis tri aferojn. Mi aŭdis pri la Poemoj. Mi aŭdis pri la decreguloj. Mi aŭdis ankaŭ pri la sintenado de la noblulo al sia filo.”

14. La princo de regno nomas sian edzinon sinjorino. Ŝi nomas sin infaneto. La popolo de la regno nomas sin princedzino, kaj, en ĉeesto de aliregnavoj, li nomas ŝin eta lordino. Ankaŭ la aliregnavoj nomas ŝin princedzino.

ĈAPITRO XII YANG HUO

1. Yang Huo²³³ deziris, ke Konfuceo vizitu lin, sed Konfuceo tion ne faris. Li do donis vaporkuiritan porkidon kiel donacon al Konfuceo, kiu, elektinte tempon, en kiu Yang Huo ne estis hejme, iris al li por esprimi sian dankon pro la donaco.

Ili renkontigis sur la vojo.

Yang Huo diris al Konfuceo: “Venu. Mi deziras paroli kun vi.” Konfuceo alpaŝis al li, kaj tiu diris: “Ĉu povas esti nomata virta tiu, kiu konservas sian grandan kapablecon kiel juvelon en sia sino kaj lasas sian landon en konfuzo? ” Konfuceo silentis. Anstataŭe Yang Huo mem respondis: “Ne.” Poste li ree demandis: “Ĉu povas esti nomata saĝa tiu, kiu deziras servi kiel regna oficisto kaj tamen foj-refoje perdas la ŝancon?” Konfuceo restis silenta. Yang Huo ree mem respondis: “Ne. — Pasis la tagoj kaj monatoj, la jaroj nin ne atendas.”

Konfuceo diris: “Prave. Mi do enoficiĝos.”

2. La Majstro diris: “En niaj naturoj ni estas similaj unu al alia, sed kutimoj faras nin diferencaj inter ni.”

3. La Majstro diris: “Nur la saĝaj de la plej alta klaso kaj la malsaĝaj de la plej malalta klaso estas neŝanĝeblaj.”

4. La Majstro, veninte al Wucheng⁹⁶, aŭdis tie sonojn de kordinstrumentoj kaj kantado. Ridetante li diris: “Kial do necesas uzi bovtranĉilon por mortigi kokon?”

Ziyou¹⁶ respondis: “Antaŭe, Majstro, mi aŭdis viajn vortojn: ‘Kiam la noblulo estas bone instruita, li amas homojn; kiam la malgranda homo estas bone instruita, li estas facile regata.’”

La Majstro diris: “Miaj disĉiploj, la vortoj de Yang²³⁴ estas pravaj. Tio, kion mi ĵus diris, estas nur ŝerco.”

5. Gongshan Furao²³⁵, ekribelinte en Bi²³⁶, invitis la Majstron al si, kaj la Majstro inklinis iri tien.

Tio malplaĉis al Zilu⁶², kaj li diris: “Se ni povas iri al neniu loko, ni iru nenien. Kial do vi intencas iri al Gongshan?”

La Majstro diris: “Ĉu povas esti senmotiva lia invito? Se iu uzos min, mi reprosperigos la landon de Zhou-dinastio²⁷ en la oriento.”

6. Zizhang²¹ demandis Konfuceon pri la perfekta virto. Konfuceo diris: “Tiu, kiu estas kapabla praktiki kvin aferojn ĉie sub la cielo, povas esti nomata homo perfekte virta.”

Zizhang ree demandis: “Kio do ili estas?” Konfuceo diris: “Seriozeco, grandanimeco, sincereco, diligenteco kaj afableco. Tiu, kiu estas serioza, ne suferas malrespekton. Tiu, kiu estas grandanima, gajnas ĉiujn. Tiu, kiu estas sincera, estas konfidato de la popolo. Tiu, kiu estas diligenta, sukcesas en ĉio, kion li entreprenas. Tiu, kiu estas afabla, povas ricevi la servojn de aliaj.”

7. Kiam Bi Xi²³⁶ invitis la Majstron al si, tiu

inklinis iri tien. Zilu⁶² diris: “Majstro, antaŭe mi aŭdis viajn vortojn: ‘La noblulo ne eniras en la domon de tiu, kiu mem faras malbonon.’ Bi Xi estas en ribelo en Zhongmu²³⁷, kial vi volas iri al li?”

La Majstro diris: “Vi estas prava. Mi diris tion. Sed ĉu mi ne diris ankaŭ: ‘Kio estas vere malmola, ne povas esti frotmaldikigita; kio estas vere blanka, ne povas fariĝi nigra per tinkturado?’ Ĉu mi estas maldolĉa kukurbo, kiu taŭgas nur por pendigo, sed ne por manĝado?”

8. La Majstro diris: “You²⁰, ĉu vi aŭdis pri la ses moralaj kvalitoj kaj ses malbonoj?” You respondis: “Ne.”

“Sidiĝu, kaj mi diru al vi. Amo al virto sen amo al lerno kondukas al stulteco. Amo al saĝo sen amo al lerno kondukas al diboĉo. Amo al sincereco sen amo al lerno kondukas al sinvundo. Amo al verdiro sen amo al lerno kondukas al parolkrupeco. Amo al kuraĝo sen amo al lerno kondukas al malobeemo. Amo al animfirmeco sen amo al lerno kondukas al obstina aroganteco.”

9. La Majstro diris: “Miaj knaboj, kial vi ne studas la Poemojn¹⁰? La Poemoj povas helpi al vi eksciti vian imagon, altigi vian observkapablon, vivi en akordo kun aliaj, lerni kiel fari satiradon. Ili povas helpi vin en la servado al viaj gepatroj unuflanke kaj en la servado al la princo aliflanke. Plie, ili povas ankaŭ plivastigi vian konon pri la nomoj de birdoj, bestoj kaj vegetaloj.”

10. La Majstro diris al Boyu¹⁴⁵: “Ĉu vi jam studis

《Zhou-nan》 kaj 《Shaonan》²³⁸? La homo, kiu ne studis 《Zhou-nan》 kaj 《Shaonan》, estas kvazaŭ staranto kun la vizaĝo kontraŭ muro²³⁹!”

11. La Majstro diris: “Decreguloj, decreguloj ! Ĉu ili signifas nur donacadon de jado kaj silkaĵo? Muziko, muziko! Ĉu ĝi signifas nur sonadon de sonoriloj kaj tamburoj?”

12. La Majstro diris: “Tiu, kiu prenas severan mienon kaj tamen interne estas malforta, similas al malnoblulo, aŭ pli ĝuste, ŝtelisto, kiu trarompas aŭ transgrimpas muron.”

13. La Majstro diris: “La ĉionjesuloj estas difektantoj de la virto.”

14. La Majstro diris: “Disvastigi kion vi aŭdis survoje estas forĵeti vian virton.”

15. La Majstro diris: “Ĉu ni povus servi la princon kune kun homo malnobla? Kiam tia homo ne ricevas postenon, li timas, ke li neniam povos ĝin akiri. Kiam li jam ricevis ĝin, li timas, ke li povos ĝin perdi. Se li timas, ke li povos perdi sian postenon, troviĝas nenio, kion li ne kuraĝus fari.”

16. La Majstro diris: “En la antikveco homoj havis tri malfortaĵojn, kiujn nun oni eble ne trovas. La aroganteco de antikvuloj montris sin en verdiremo; la aroganteco de nuntempuloj montras sin en senmodereco. La severa digno de antikvuloj montris sin en neofendebleco; la severa digno de nuntempuloj montras sin en malĝentileco. La stulteco de antikvuloj

montris sin en simpleco; la stulteco de nuntempuloj montras sin en trompemo.”

17. La Majstro diris: “Mielaj vortoj kaj hipokrita mieno estas ne ligitaj kun la vera virto.”

18. La Majstro diris: “Mi abomenas la manieron, en kiu la purpuro forrabas de la cinabra rugo ĝian brilon²⁴⁰. Mi abomenas la kantojn de Zheng²⁴¹, kiuj konfuzas la klasikan, konvencian muzikon²⁴². Mi abomenas tiujn, kiuj per siaj akraj langoj renversas regnojn.”

19. La Majstro diris: “Mi preferus ne paroli.” Zigong⁹ diris: “Se vi, Majstro, ne parolus, kion do ni, viaj disĉiploj, lernus kaj komunikus al aliaj?” La Majstro diris: “Ĉu Ĉielo parolas? La kvar sezonoj tamen ĉiam alternas kaj ĉio estas produktata. Ĉu Ĉielo diras ion?”

20. Ru Bei²⁴³ deziris viziti Konfuceon, sed tiu rifuzis akcepti lin, pretekstante malsaniĝon. Tuj kiam la portanto de tiu ĉi mesaĝo eliris tra la pordo, Konfuceo prenis sian se-on¹⁴⁶ kaj kantis kun ĝia akompano, por ke Ru Bei povu lin aŭdi.

21. Zai Wo⁴⁸ diris: “La trijara funebrado pro gepatroj estas tro longa. Se la nobluloj sin detenas tri jarojn de la plenumo de ritaj ceremonioj, la ritaj ceremonioj estos tute perditaj. Se tri jarojn li sin detenas de la muziko, la muziko estos ruinigita. La malnova greno jam estas elĉerpita, kaj la nova jam estas produktita, kaj, en frotestigado de fajro, la ŝanĝoj de ligno estas ree farinta sian ciklon²⁴⁴. Do, laŭ mi, unu kompleta jaro estus sufiĉa por la funebrado.”

La Majstro diris: “Ĉu vi sentus vin trankvila, se vi, kiam ankoraŭ ne pasus tri jaroj de post la morto de via patro aŭ patrino, jam manĝus bonan rizon kaj portus broditajn vestojn?”

“Jes, mi sentus min trankvila.” respondis Zai Wo.

“Se vi povus send vin trankvila, agu do laŭ via plaĉo. Sed la noblulo, dum la tuta periodo de funebrado, ne perceptus la bongustecon de frandaĵoj, se ilin li manĝos, nek trovus plezuron en la muziko, se ĝin li aŭdus. Li ankaŭ ne sentus sin trankvila, se li komforte loĝus. Tial li ne faras, kion vi proponas. Sed nun vi sentas vin trankvila, vi do agu lau via plaĉo.”

Zai Wo eliris, kaj la Majstro diris: “Tio montras, ke al Yo²⁴⁵ mankas virto. La infaneto, post sia naskiĝo, ne povas forlasi la sinon de siaj gepatroj, ĝis ĝi havas la aĝon de tri jaroj, kaj tial la trijara funebrado estas universale observata en la tutalando. Ĉu Yu ne ĝuis la trijaran gepatran amkaresadon?”

22. La Majstro diris: “Estas malfacile instrui tiun, kiu faras nenion alian krom ĝissate manĝi la tutan tagon. Ĉu ne troviĝas tiaj ludoj kiel ŝakoj? Ludi ilin certe estus pli bone ol fari absolute nenion.”

23. Zilu⁶² diris: “Ĉu la nobluloj estimas kuraĝon?” La Majstro diris: “La nobluloj rigardas justecon kiel ion plej gravan. Nobluloj, havante kuraĝon sen justeco, inklinas fari ribelon; malgrandaj homoj, havante kuraĝon sen justeco, povas fariĝi rabistoj.”

24. Zigong⁹ diris: “Ĉu ankaŭ la nobluloj havas

siajn malamojn?” La Majstro diris: “Jes, ili havas. Ili malamas tiujn, kiuj diskonigas alies malbonojn. Ili malamas tiujn, kiuj, okupante malaltan postenon, kalumnias siajn superulojn. Ili malamas tiujn, kiuj havas kuraĝon kaj ne observas la deregulojn. Ili malamas tiujn, kiuj estas riskemaj kaj samtempe obstinaj.”

Poste la Majstro demandis: “Ci¹¹, ĉu ankaŭ vi havas viajn malamojn?” Zigong respondis: “Mi malamas tiujn, kiuj atribuas al si atingojn de aliaj kaj rigardas sin kiel homojn saĝajn. Mi malamas tiujn, kiuj estas malmodestaj kaj pensas, ke ili estas bravaj. Mi malamas tiujn, kiuj emas malkaŝi sekretojn de aliaj kaj pensas, ke ili mem estas honestaj.”

25. La Majstro diris: “Estas malfacile trakti la virinojn kaj malgrandajn homojn. Se vi estas familiara kun ili, ili perdas sian humilecon. Se vi estas malintima al ili, ili estas malkontentaj.”

26. La Majstro diris: “Kiam la homo en la kvardeka jaro estas ankoraŭ malŝatata de homoj, li restos ĉiam tia, kia li estas.”

ĈAPITRO XVIII WEI ZI

1. La vicgrafo Wei²⁴⁶ retiriĝis el la korteganeco. La vicgrafo Ji²⁴⁷ fariĝis sklavo al Zhou²⁴⁸. Bi Gan²⁴⁹ faris admonon kaj estis mortigita. Konfuceo diris: “Yin-dinastio²⁵ ja havis ĉi tiujn tri virtulojn.”

2. Hui de Liuxia²²⁰, estante kriminala juĝisto, estis trifoje eksigita je la ofico. Oni diris al li: “Ĉu ankoraŭ ne estas tempo por vi, sinjoro, forlasi ĉi tiun landon?” Li respondis: “Servante homojn en honesta maniero, kien mi iros, kaj ne spertos tiajn trifojajn eksigojn? Se mi servus homojn en malhonesto maniero, kiel do necesus al mi forlasi la landon de miaj gepatroj?”

3. La princo Jing de Qi¹⁶¹, rilate la manieron en kiu li devos trakti Konfuceon, diris: “Mi ne povos trakti lin en la maniero, en kiu la suvereno de Lu-regno traktas la ĉefon de Ji-familio²⁸. Mi traktos lin en maniero inter tiu donita al la ĉefo de Ji-familio kaj tiu donita al la ĉefo de Meng-familio²⁵⁰.” Li diris ankaŭ: “Mi estas maljuna kaj ne povas praktiki liajn doktrinojn.” Konfuceo do foriris el Qi-regno.

4. Qi-regno donacis al Lu-regno muzikistinojn, kiujn Ji Huan²⁵¹ akceptis, kaj pro tio okazis nenia kortega aŭdienco dum tri tagoj. Konfuceo do foriris el Lu-regno.

5. La frenezulo de Chu-regno, Jieyu²⁵², preterpasis la kaleŝon de Konfuceo, kantante kaj dirante: “Ho Feng-birdo¹³⁴! Ho Feng-birdo! Kiel via virto degeneras !

Koncerne la pasintecon, admono estas senutila; sed la estonteco povas esti antaŭzorgata. Forlasu do kion vi sekvas. Forlasu do kion vi sekvas. Danĝero atendas tiujn, kiuj nun sin okupas pri aferoj de regado.” Konfuceo elkaleŝiĝis kaj deziris konversacii kun li, sed Jieyu tuj rapidis for, tiel ke Konfuceo ne povis paroli kun li.

6. Kiam Changju kaj Jienie²⁵³ kune laboris sur kampo, Konfuceo preterpasis ilin kaj sendis Zilu⁶² por demandis pri la pramejo.

Changju diris: “Kiu estas tiu, kiu tenas kaprimenojn en la kaleŝo tie?”

Zilu diris al li: “Tiu estas Kong Qiu²⁵⁴.”

“Ĉu tiu ne estas Kong Qiu el Lu-regno?” li demandis. ”Jes,” estis la respondo.

“Li scias, kie estas la pramejo,” diris Changju. Zilu do demandis Jieni, kiu diris al li:

“Kiu vi estas, sinjoro?”

Li respondis: “Mi estas Zhong You⁹¹.”

“Ĉu vi ne estas disĉiplo de Kong Qiu el Lu-regno?” demandis Jieni.

“Mi estas,” li respondis.

“Malordo, kvazaŭ inundo, regas en la tuta lando, kaj kiu estas tiu, kun kiu vi penas ŝanĝi ĝin? Ĉu ne pli bone estus sekvi tiujn, kiuj evitas la tutan mondon, ol sekvi tiun, kiu evitas nur tiun kaj ĉi tiun?” diris Jieni kaj senĉese kovradis per tero la semitajn semojn.

Zilu revenis kaj raportis iliajn dirojn.

Konfuceo diris kun suspiro: “Estas neeble por ni

ariĝi kun birdoj kaj bestoj. Se mi havus rilatojn ne kun homoj, kun kiuj do nu povus havi rilatojn? Se justaj principoj regus en la lando, estus ne necese, ke mi penu ŝanĝi ĝian staton kune kun vi.”

7. Foje Zilu, sekvante la Majstron, postiĝis kaj renkontis maljunulon, kiu portis sarkilon per bastono sur la ŝultro.

Zilu demandis: “Ĉu vi vidis mian Majstron, sinjoro?”

La maljunulo respondis: “Ŝajnas al mi, kiel li povas esti nomata majstro, se liaj kvar membroj ne taŭgas por peniga laboro kaj ne povas distingi la kvin specojn de greno?” Dirinte tion, li plantis sian bastonon en la teron kaj komencis sarkadon, dume Zilu staris respektplene kun kunigitaj manoj surbruste.

La maljunulo invitis Zilu pasigi la nokton en lia domo, buĉis kokon, manĝpretigis milion kaj regaligis lin. Li ankaŭ prezentis al li siajn du filojn. La sekvantan tagon Zilu daŭrigis sian vojon kaj raportis ĉion tion al Konfuceo.

La Majstro diris: “Li estas ermito,” kaj sendis Zilu returne, por ree vidi lin, sed, kiam li atingis la lokon, la maljunulo jam foriris.

Zilu do diris: “Ne enoficiĝi ne estas laŭ la justeco. Se la rilato inter la maljuna kaj la juna ne devas esti neglektata, kiel do oni povas malatenti la rilaton inter la suvereno kaj la ministroj? Dezirante konservi sian personan purecon, li lasas, ke tiu granda rilato estu

konfuzita. Por la nobluloj enoficiĝo celas nur plenumi la justajn devojn apartenantajn al ĝi. Koncerne la neefektiveblecon de niaj principoj, ĝi jam de longe estas sciata.”

8. La homoj, kiuj ermitiĝis por eviti la mondon, estis Boyi, Shuqi⁷⁸, Yuzhong, Yiyi, Zhuzhang, Hui de Liuxia²²⁰ kaj Shaolian²⁵⁵. La Majstro diris: “Rifuzi lasi sian volon malfirmigita kaj rifuzi lasi sian personecon malhonorita — tiaj, mi pensas, estas Boyi kaj Shuqi.” Parolante pri Hui de Liuxia kaj Shaolian, li diris: “Ili lasis sian volon malfirmigita kaj lasis sian personecon malhonorita, sed iliaj vortoj estis konformaj al iliaj principoj kaj iliaj agoj estis faritaj post konsideroj. Tio estas ĉio, kion oni povas rimarki en ili.” Parolante pri Yuzhong kaj Yiyi, li diris: “Dum ili kaŝis sin en sia izoliteco, ili donis liberecon al siaj vortoj, sed ili sukcesis en konservado de la pureco de sia personeco, kaj ilia ermitiĝo estis nur ilia artifiko. Koncerne min, mi estas diferenca de ĉiuj ĉi homoj. Por mi ekzistas nemo, kion mi povus fari aŭ ne povus fari.”

9 . La granda muzik-majstro, Zhi, forlasis Lu-regnon kaj iris al Qi-regno. Gan, la majstro de la muziko ludata ĉe la dua manĝo²⁵⁶, iris al Chu-regno. Liao, la majstro de la muziko ludata ĉe la tria manĝo, iris al Cai-regno. Que, la majstro de la muziko ludata ĉe la kvara manĝo, iris al Qin-regno. Fangshu, la tambur-majstro retiriĝis al la nordo de la Flava Rivero. Wu, la majstro de tambureto,

retiriĝis al la Han-rivera regiono. Yang, la asistanta muzikmajstro, kaj Xiang, majstro de la ŝtona frapinstrumento, retiriĝis al apudmara regiono.

10. La duko de Zhou¹⁰⁶ alparolis la princon de Lu²⁵⁷, dirante: “La nobluloj ne neglektas siajn parencojn, nek igas la grandajn ministrojn plendi pri tio, ke ili ne estas konfidataj. Sen ia granda kaŭzo ili ne deoficigas siajn malnovajn amikojn, nek eksigas la maljunajn oficistojn. Ili ne serĉas en unu homo talentojn por ĉia laboro.”

11. En Zhou-dinastio²⁷ estis ok eminentaj kleruloj: Boda, Bokuo, Zhongtu, Zhonghu, Shuye, Shuxia, Jisui kaj Jigua²⁵⁸.

ĈAPITRO XIX ZI ZHANG

1. Zizhan²¹ diris: “Klerulo, kiu vidas danĝeron, estas preta oferi sian vivon. Kiam la okazo de gajno sin prezentas al li, li pensas pri justeco. Dum oferado liaj pensoj direktiĝas al respekto; dum funebrado liaj pensoj estas okupitaj de malĝojo. Tia homo meritas nian aprobon.”

2. Zizhang diris: “Kiam iu tenas sin je la virto sen firmeco kaj kredas justajn principojn sen fideleco, kian signifon povas havi lia ekzisto aŭ neekzisto?”

3. La disĉiploj de Zixia⁶ demandis Zizhang pri la principoj de la interhomaj rilatoj. Zizhang diris: “Kion Zixia diris pri la temo?” Ili respondis: “Zixia diris ‘Havu rilatojn kun tiuj, kiuj povas esti utilaj al vi. Rifuzo rilatojn kun tiuj, kiuj ne povas esti tiaj.’”

Zizhang diris: “Tio ĉi estas diferenca de tio, kion mi lernis. La nobluloj devas honori la talentajn kaj virtajn kaj toleri ĉiujn. Ili laŭdas la bonajn kaj kompatas la senkapablajn. Ĉu mi posedas grandajn talentojn kaj virton? Se jes, kiajn homojn do mi ne povos toleri? Ĉu mi estas sentalenta kaj senvirta? Se jes, tiam homoj rifuzos rilatojn kun mi. Kial do necesos, ke mi rifuzu rilatojn kun ili?”

4. Zixia diris: “Eĉ en malsuperaj studoj kaj artoj troviĝas io inda je konsidero. Sed timante, ke ili povus malhelpi la efektivigon de tio, kio estas malproksima kaj alta, la nobluloj ne sin okupas pri ili.”

5. Zixia diris: “Tiu, kiu de tago al tago sciiĝas, kion li ne sciis, kaj de monato al monato ripetas, kion li jam ellernis, povas esti nomata lernema.”

6. Zixia diris: “Vaste lernu kaj havu firman celon; demandu kun modesteco kaj pensu pri aktualaĵoj; ankaŭ en tio kuŝas la virto.”

7. Zixia diris: “Metiistoj loĝas en siaj metiejoj por plenumi siajn laborojn. Nobluloj faras lernadon por atingi la plejaltecon de la principoj.”

8. Zixia diris: “La malgrandaj homoj havas la inklinton kaŝi siajn kulpojn.”

9. Zixia diris: “Noblulo havas tri facetojn. Kiam oni rigardas lin de malproksime, li aperas severa; kiam oni alproksimiĝas, li estas milda; kiam oni aŭdas lin paroli, li estas serioza.”

10. Zixia diris: “La nobluloj ne trudas laborojn al sia popolo, ĝis ili akiras ties fidon, alie oni pensus, ke ili subpremas. Ili ne admonas sian princon, ĝis ili akiras ties fidon, alie tiu pensus, ke ili kalumnias.”

11. Zixia diris: “Oni ne povas transpasi la limlinion en la grandaj virtoj, sed koncerne la malgrandajn virtojn, oni povas ĝin iom transpasi.”

12. Ziyou¹⁶ diris: “La disĉiploj de Zixia sufiĉe taŭgas por fari balaadon kaj gast-akceptadon. Sed ĉi tiuj aferoj estas nur bagatelaĵoj facile lerneblaj, kaj ili restas senciaj pri kio estas esenca. — Kiel do tiamaniere ili povus fariĝi sufiĉe instruitaj?”

Zixia aŭdis pri tio kaj diris: “Ho ve! Yan You²⁵⁹

estas erara. El la objektoj de instruado de la noblulo, kiuj estas de la unua graveco kaj devas esti unue instruataj? Kaj kiuj estas de la dua graveco kaj devas esti poste instruataj? Ili estas kiel plantoj, kiuj estas ordigitaj laŭ siaj klasoj. Kiel do la maniero de instruado de noblulo povus esti distordita? Kredeble estas nur la sankta saĝulo, kiu povas, de la komenco ĝis la fino, procedi precize laŭ la natura ordo en sia instruado!”

13. Zixia diris: “La regna oficisto, havante superfluan energion, devas dediĉi sian liberan tempon al lernado. La lernanto, fininte sian lernadon, devas klopodi fariĝi regna oficisto.”

14. Ziyou¹⁶ diris: “Funebro sufiĉas en tia grado, en kia oni povas plene esprimi sian malĝojon.”

15. Ziyou diris: “Mia amiko Zizhang²¹ estas laŭdinda pro tio, ke li povas plenumi, kion aliaj trovas malfacile plenumbla, sed li tamen ne estas perfekte virta.”

16. Majstro Zeng diris: “Kiel imponan teniĝon Zizhang havas! Estas malfacile kune kun li praktiki la virton.”

17. Majstro Zeng diris: “Mi aŭdis de nia Majstro la jenon: ‘La homo ne povas plene esprimi tion, kio estas en li, krom en la okazo, kiam li funebras pro la morto de sia patro aupaŭtrino.’”

18. Majstro Zeng diris: “Mi aŭdis de nia Majstro la jenon: ‘La fila fideleco de Meng Zhuang²⁶⁰, ĝenerale dirite, estas atingebla por aliaj; sed rilate tion, ke li ne

ŝanĝis la ministrojn de sia patro, nek lian regmanieron, ĝi estas malfacile atingebla por aliaj.”

19. La ĉefo de Meng-familio²⁵⁰ nomumis Yang Fu²⁶¹ kriminala juĝisto, kaj tiu konsultis Majstron Zeng. Zeng diris: “Nuntempe la regantoj malbone plenumas siajn devojn, kaj tial inter la popolo jam longe regas senordeco. Se vi eltrovos la veron de iu ajn akuzo, kompatu la krimulon kaj ne sentu ĝojon pro via propra kapablo.”

20. Zigong⁹ diris: “La malvirteco de Zhou²⁴⁸ eble ne estis tiel granda, kiel oni diskonigadis. Tial la nobluloj malvolas troviĝi en malalta situacio, kie ĉiaj malbonoj de la mondo povus flui sur ilin.”

21. Zigong diris: “La kulpoj de la noblulo estas kvazaŭ eklipsoj de la suno kaj luno. Kiam li havas kulpojn, ĉiuj vidas ilin; kiam li sin korektas, ĉiuj rigardas supren al li kun respekto.”

22. Gongsun Chao de Wei²⁶² demandis Zigong: “De kiu do Zhongni²⁶³ ricevis sian erudicion?” Zigong respondis: “La doktrinoj de Wen kaj Wu²⁶⁴ ankoraŭ ne perdiĝis. Ili troviĝas inter homoj. Homoj talentaj kaj virtaj memoras la pli grandajn principojn de ili, kaj aliaj, kiuj ne estas tiel talentaj kaj virtaj, memoras la malpli grandajn. Tial ĉie troviĝas la doktrinoj de Wen kaj Wu. Kie do nia Majstro ne povus havi okazon de lernado? Kaj kial do necesus al li havi regulan instruiston?”

23. Shusun Wushu²⁶⁵ diris al la grandaj oficistoj en

la princa palaco: “Zigong estas pli talenta kaj pli virta, ol Zhongni.” Zifu Jingbo²⁰⁵ raportis la diron al Zigong.

Zigong diris: “Permesu al mi uzi la komparon de domo kaj ĝia ĉirkaŭmuro. Mia ĉirkaŭmuro atingas nur ĝis la ŝultroj. Oni povas rigardi trans ĝin kaj vidi ĉion valoran en la ĉambroj. La ĉirkaŭmuro de mia Majstro estas plurajn ren-ojn²⁶⁶ alta. Se oni ne trovas la pordon kaj eniri tra ĝi, oni ne povas vidi la prapatran templon kun ĝiaj belaĵoj, nek la domojn kun iliaj ornamaĵoj. Sed mi supozas, ke estas tre malmultaj tiuj, kiuj povas trovi la pordon. Do, ĉu ne estas natura la diro de s-ro Wushu?”

24. Shusun Wushu kalumnie parolis pri Zhongni, kaj Zigong diris: “Ne tiel parolu. Zhongni ne estas kalumniebla. La talentoj kaj virto de aliaj estas montetoj, kiujn oni povas transpasi. Zhongni estas la suno kaj la luno, kiujn oni neniel povas transpasi. Eĉ se oni dezirus rifuzi la brilon, kian malutilon li povus fari al la suno kaj la luno? Tio montrus nur, ke li ne konus sian propran kapablon.”

25. Chen Ziqin²⁶⁷ diris al Zigong: “Vi estas tro modesta. Kiel Zhongni povus esti pli talenta kaj pli virta eĉ ol vi?”

Zigong diris: “Pro unu vorto homo povas esti kalkulata kiel saĝa, sed pro unu vorto li povas esti kalkulata kiel malsaĝaj. Ni do devas esti singardaj pri niaj vortoj. Nia Majstro ne estas atingebla tiel same, kiel la ĉielo ne estas ascendebla per ŝtuparo. Se nia Majstro estus en la pozicio de princo de in regno aŭ

feŭdposedanto, ni trovas konfirmita tion, kion oni diras: kiam li volus, ke la popolo staru per la deco, ili tuj starus per la deco; kiam li gvidus ilin antaŭen, ili tuj lin sekvus; kiam li feliĉigus ilin, homoj de malproksime tuj amase venus sub lian regadon; kiam li stimulus ilin, ili tuj fariĝus unuanimaj. Dum li vivas, li estas glora. Se li mortus, li estus amare prilamentata. Kiel do li povus esti atingita de mi?"

ĈAPITRO XX YAO YUE

1. Yao¹²⁶ diris: “Ho vi, Shun¹²⁴! Laŭ la volo de Ĉielo nun vi devas heredi mian tronon. Firme tenu la Ĝustan Mezon¹⁰³ kun sincereco. Se mizero regos interne de la kvar maroj, la suvereneco, donita de Ĉielo al vi, venos al fino por eterne.” La samajn vortojn uzis ankaŭ Shun, kiam li cedis la tronon al Yu¹²⁵.

Tang¹⁶³ diris: “Mi, la infano Lu²⁶⁸, arogas al mi uzi nigran bovon kiel viktimon kaj arogas al mi kategorie diri al Vi, ho la plej majesta suvereno Ĉielo, ke la pekulojn mi ne kuraĝas pardoni, kaj la bonecon kaj malbonecon de Viaj ministroj, ho Ĉielo, mi ne kaŝas, ĉar ilin Vi ekzamenas per Via menso, ho Ĉielo. Se mi mem faras krimojn, mi ne atribuas ilin al la popolo en la miriadoj da regionoj. Se en la miriadoj da regionoj oni faras krimojn, ĉi tiuj krimoj devas esti atribuitaj al mi.”²⁶⁹

La suvereno de Zhou-dinastio²⁷ faris grandajn donacojn, tiel ke la bonuloj estis riĉigitaj. “Kvankam mi havas proksimajn parencojn, tamen ili ne estas egalaj al la virtuloj. Se la popolo faras pekojn, ili devas esti atribuitaj al mi.”²⁷⁰

Li unuecigis la pezojn kaj mezurojn, restarigis la oficojn forjetitajn, tiel ke liaj dekretoj estis bone plenumataj en la tuta lando. Li revivigis regnojn, kiuj jam estingiĝis, restarigis familiojn, kies heredlinio jam rompiĝis, kaj enoficigis kompetentulojn, kiuj antaŭe estis

neglektataj, tiel ke en la tuta landola koroj de la popolo turniĝis al li.

Por li la plej gravaj estis la popolo, la nutraĵo, la funebraĵoj kaj la oferaĵoj.

Per sia grandanimeco li gajnis la popolon. Per sia sincereco li igis la popolon meti sian fidon sur lin. Per sia favora agado li atingis grandajn sukcesojn. Per sia justeco li ĝojigis ĉiujn homojn.

2. Zizhang²¹, demandis Konfuceon: “Kiel do homo en aŭtoritato devas agi, por ke li povu dece konduki la regadon?”

La Majstro respondis: “Li honoru la kvin bonajn aferojn kaj forigu la kvar malbonajn, tiam li povos dece konduki la regadon.”

Zizhang diris: “Kio do estas la kvin bonaj aferoj?”

La Majstro diris: “Ili estas, ke la homo en aŭtoritato bonfaras al la popolo sen siaj grandaj elspezoj; ke li metas taskojn sur la popolon sen ilia plendo; ke li sekvas la virton sen avido je profito; ke li estas digne trankvila sen fiereco; ke li estas majesta sen feroceco.”

Zizhang diris: “Kion do signifas bonfari al la popolo sen siaj grandaj elspezoj?”

La Majstro respondis: “Kiam la homo en aŭtoritato igas la popolon fari aferojn, el kiuj ili povas ricevi profitojn, ĉu tiam li ne bonfaras al la popolo sen siaj grandaj elspezoj? Kiam li elektas laborojn, kiuj estas konvenaj al la popolo, kaj igas ilin labori super ili, kiu

do plendos? Kiam li sekvas la virton kaj ĝin atingas, kian profiton do li avidos? Kiam li havas rilatojn kun homoj, li ne kuraĝas montri malrespekton al ili, tute egale, ĉu ili estas multaj aŭ malmultaj, ĉu potencaj aŭ senpotencaj; ĉu tio ne signifas, ke li estas digne trankvila sen fiereco? Li bonordigas siajn vestojn kaj ĉapon kaj montras dignecon en sia mieno, tiel ke, rigardate lin, oni sentas timon; ĉu tio ne signifas, ke li estas majesta sen feroceco?”

Zizhang demandis: “Kio do estas la kvar malbonaj aferoj?”

La Majstro diris: “Puni la popolon per morto sen antaŭa eduko al ili — tio estas nomata krueleco. Postuli de ili tujan plenan sukceson en laboro sen averto al ili — tio estas nomata abrupta trudemo. Doni ordonojn kvazaŭ sen urĝeco kaj, kiam la tempo venas, insisti pri rapida plenumo — tio estas nomata fuŝado de aferoj. Kaj doni pagojn aŭ rekompencojn al homoj, sed tion fari en domaĝa maniero — tio estas nomata avareco.”

3. La Majstro diris: “Tiu, kiu ne konas la volon de Ĉielo, ne povas esti noblulo. Tiu, kiu ne konas la decregulojn, ne povas firme stari inter homoj. Tiu, kiu ne konas vortojn, ne povas koni homojn.”

NOTOJ

Ĉar tiu ĉi verko abundas je nomoj de ĉinaj antikvuloj, tial estas necese ĉi tie fari mallongan klarigon pri ili ĝenerale. La plena nomo de ĉinoj ordinare konsistas el du partoj. La unua parto estas familia nomo kaj la dua estas persona. La antikvuloj havis, krom siaj familia nomo kaj persona nomo, ankaŭ adoltiĝan nomon, kiun ili ricevis ĉe sia adoltiĝo (viro je 20 jaroj kaj virino je 15 jaroj) . Ekzemple, la plena nomo de Zilu, disĉiplo de Konfuceo, estis Zhong You (Zhong estis lia familia nomo kaj You estis lia persona nomo) . Zilu estis lia adoltiĝa nomo, kaj lia alia adoltiĝa nomo estis Jilu. En tiu ĉi libro li estas menciata jen per la nomo Zhong You aŭ simple You, jen per Zilu aŭ Jilu.

1. Xue Er: La titolo de la unua ĉapitro de «Analektoj de Konfuceo». En tiu ĉi libro ĉiu ĉapitro estas titolita aŭ per la unuaj du ĉinaj ideografiaĵoj el la eldiro de Konfuceo aŭ per la unua persona nomo menciita en la parolo aŭ anekdoto en la unua sekcio de la ĉapitro.

2. La Majstro: En tiu ĉi libro “la Majstro” estas uzata ekskluzive por anstataŭi la nomon Konfuceo.

3. Noblulo: En tiu ĉi libro “noblulo” estas uzata de Konfuceo por aludi iafoje virtan homon, alifoje homon en alta situacio.

4. Majstro You: t. e. You Ruo, disĉiplo de Konfuceo. En tiu ĉi libro la disĉiploj de Konfuceo kutime estas menciitaj per iliaj adoltiĝaj nomoj, krom You Ruo kaj

Zeng Shen (vd. noton 5) , kiuj estas titolataj respective Majstro You kaj Majstro Zeng, tial oni supozas, ke 《Analektoj de Konfuceo》 eble estis kompilita de disĉiploj de You Ruo kaj Zeng Shen.

5. Majstro Zeng: t. e. Zeng Shen, disĉiplo de Konfuceo (vd. noton 4) .

6. Zixia: t. e. Bu Shang, disĉiplo de Konfuceo. Zixia estis lia adoltiĝa nomo.

7. La princo: t. e. la regnestro. Ĉar en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770—476 a. K.) plejparto de la estroj de diversaj regnoj estis posteuloj de membroj de la reĝa familio de Zhou-dinastio, tial ili ricevis la titolon “princo”.

8. Ziqin: t. e. Chen Kang. Ziqin estis lia adoltiĝa nomo. Iuj supozas, ke li estis disĉiplo de Konfuceo, sed la supozo ne estas konfirmita.

9. Zigong: t. e. Duanmu Ci, disĉiplo de Konfuceo. Zigong estis lia adoltiĝa nomo.

10. 《Libro de Poezio》 : Ĝi estas la plej frua kolekto de ĉinaj poemoj, kiu enhavas en si 305 poemojn de Zhou-dinastio. Ĝi estas nomata ankaŭ “Tricent Poemoj” aŭ simple “la Poemoj”. La poemoj en 《Libro de Poezio》 ankaŭ povis esti kantataj.

11. Ci: t. e. Duanmu Ci (Zigong — vd. noton 9) . Ĉi tie oni povas legi “ci” kiel “vi”. Lia plena nomo estis Duamnu Ci.

12. Meng Yi: t. e. Mengsun Heji, granda oficisto de Lu-regno. Yi estis lia postmorta titolo.

13. Fan Chi: t. e. Fan Xu, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Zichi, tial li estis nomata ankaŭ Fan Chi.
14. Mengsun: t. e. Meng Yi (vd. noton 12) .
15. Meng Wu: Filo de Meng Yi (vd. noton 12) .
16. Ziyou: t. e. Yan Yan, disĉiplo de Konfuceo. Ziyou estis lia adoltiĝa nomo. Li estis nomata ankaŭ Yan You.
17. Hui: t. e. Yan Hui (Yan Yuan), la plej ŝatata disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Ziyuan, tial li estis nomata ankaŭ Yan Yuan. Ĉar li estis malriĉa, tial laŭ Konfuceo oni ne devis doni al li pompan enterigon.
18. Laŭ Konfuceo la klera noblulo ne devas esti kiel vazo, kiu havas nur limigitan uzeblecon. Li devas esti homo havanta multflankajn kapablojn.
19. Malgranda homo: En «Analektoj de Konfuceo» “malgranda homo” estas uzata de Konfuceo por aludi iafoje senvutitan homon aŭ malnoblan homon, alifoje homon en malalta situacio aŭ ordinaran popolanon.
20. You: t. e. Zhong You, disĉiplo de Konfuceo. Liaj du adoltiĝaj nomoj estis Zilu kaj Jilu. Juĝante proceson, oni devas aŭskulti ambaŭ partiojn. La kaŭzo, kial Konfuceo diris, ke Zhong You povus decidi procesojn aŭskultinte unu partion, kuŝas en tio, ke laŭ Konfuceo Zhong You estis homo tiel honesta, ke nek akuzanto, nek akuzito volus mensogi al li.
21. Zizhang: t.e. Zhuansun Shi, disĉiplo de Konfuceo. Zizhang estis lia adoltiĝa nomo.
22. La princo Ai: La suvereno de Lu-regno. Lia regado

daŭris 27 jarojn (494—466 a.K.) .

23. Ji Kang: t. e. Jisun Fei, la plej potenca ministro al la princo Ai de Lu-regno. Kang estis lia postmorta titolo.

24. 《Libro de Historio》 : Unu el la Konfuceanaj klasikaĵoj. Laŭdire ĝi estis editorita de Konfuceo.

25. Yin-dinastio: Nomo de la posta periodo (ĉ. 1401 — 1066 a. K.) de Shang-dinastio. Shang-dinastio daŭris de ĉ.1711 ĝis ĉ.1066 a.K.

26. Xia-dinastio daŭris de ĉ. 2140 ĝis 1710 a.K.

27. Zhou-dinastio daŭris de ĉ. 1066 ĝis 256 a.K.

28. La ĉefo de Ji-familio: t. e. Ji Ping, granda oficisto de Lu-regno, unu el la efektivaj regantoj de tiu regno.

29. Ok vicoj: Laŭ la preskribo de Zhou-ritaro nur la reĝo rajtis ordoni ok vicojn da personoj (64 personoj) muziki kaj danci dum la oferceremonio. Ji Ping estis granda oficisto, kiu rajtis uzi nur kvar vicojn da personoj (32 personoj).

30. La tri familioj: t.e. la familioj de la tri grandaj oficistoj en Lu-regno Mengsun, Shusun kaj Jisun, kiuj estis la efektivaj regantoj de tiu regno.

31. La odo Yong: Kantebla poemo el 《Libro de Poezio》 , kiun nur la reĝo de Zhou-dinastio rajtis uzi ĉe la fino de sia oferado.

32. La du versoj estas el la odo Yong. Ĉi tie la filo de la ĉielo signifas reĝon de Zhou-dinastio.

33. Lin Fang: Lu-regnana. Li iam demandis Konfuceon pri ceremoniaj aferoj (vd. § 3.4)

34. La monto Tai: Fama monto en Lu-regno (en la nuna Shandong-provinco) . En tin tempo nur la reĝo kaj feŭdaj princoj rajtis fari oferadon al tiu monto. La estro de Ji-familio, kiu estis nur granda oficisto, eĉ volis fari la oferadon, kio laŭ Konfuceo estis ia arogo.
35. Ran You: t. e. Ran Qiu, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Ziyou, tial li estis nomata ankaŭ Ran You.
36. La unuaj du el la tri versoj estas el «Libro de Poezio» ; la tria verso estas eble el iu antikva poemo ne plu ekzistanta.
37. Shang: t.e. Bu Shang (Zixia), disĉiplo de Konfuceo.
38. La Poemoj: t. e. «Libro de Poezio» (vd. noton 10) .
39. Laŭ la preskribo de Zhou-ritaro nur la reĝo rajtis fari la Grandan Oferadon. La Granda Oferado, kiun faris la princo de Lu-regno, laŭ Konfuceo estis ia arogo, tial Konfuceo ne volis plu spekti la ceremonion.
40. La vortoj de Konfuceo montras, ke li ne aprobis la fakton, ke la princo de Lu-regno faras la Grandan Oferadon (vd. § 3.10).
41. Wangsun Jia: Granda oficisto de Wei-regno.
42. Laŭ antikvuloj la dio de la sudokcidenta angulo de la domo estis pli altranga ol la dio de la kuirfomo. Sed la lasta havis la rajton raporti rekte al Ĉielo la aferojn okazintajn en la domo. La frazo signifas, ke flatado al homo malpli altranga kun efektiva povo estas preferinda al flatado al la homo pli altranga sen efektiva povo.

43. La du antaŭaj dinastioj: t. e. Xia-dinastio (vd. noton 26) kaj Yin-dinastio (vd. noton 25).
44. Granda Templo: Templo al la fondinto de la regno aŭ dinastio.
45. La filo de la Zou-ano: t.e. Konfuceo. Ĉar la patro de Konfuceo siatempe funkciis kiel granda oficisto de la urbeto Zou, tial oni nomis lin Zou-ano.
46. La princo Ding: La suvereno de Lu-regno. Lia regado daŭris 15 jarojn (509—495 a.K) .
47. Guan Ju: “Kvakantaj Pandionoj”, la unua poemo en 《Libro de Poezio》 .
48. Zai Wo: t.e. Zai Yu, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Ziwo, tial li estis nomata ankaŭ Zai Wo.
49. Guan Zhong: Ĉefministro al la princo Huan de Qi-regno. Li helpis al tiu fariĝi la ĉefo super la princoj de diversaj regnoj.
50. Yi: Nomo de iu loko en Wei-regno.
51. Sonorilo kun ligna lango: En la antikveco oni kunvokis homojn per tintigo de sonorilo kun ligna lango, por publike sciigi al ili ion gravan. Ĉi tie “sonorilo kun ligna lango” signifas “saĝan gvidanton de la popolo”.
52. Shao: Nomo de muzikaĵo en la regperiodo de la reĝo Shun. Ĉar li surtroniĝis dank’ al la abdiko de Yao, tial Konfuceo opiniis, ke Shao estas perfekte bela kaj ankaŭ perfekte bona.
53. Wu: Nomo de muzikaĵo en la reĝperiodo de la reĝo

Wu de Zhou-dinastio. Ĉar li akiris la tronon per militaj rimedoj, tial, malgraŭ ke la de li kondukita milito estis justa, Konfuceo opiniis, ke Wu ne estas perfekte bona, kvankam perfekte bela.

54. Shen: t.e. Zeng Shen, disĉiplo de Konfuceo.

55. Zeng: t.e. Zeng Shen.

56. Gongye Chang: Disĉiplo de Konfuceo.

57. Nan Rong: t. e. Nangong Kuo, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Zirong, tial li estis nomata ankaŭ Nan Rong.

58. Zijian: t. e. Fu Buqi, disĉiplo de Konfuceo. Zijian estis lia adoltiĝa nomo.

59. Per tiu ĉi metaforo Konfuceo aludis, ke kvankam Zigong havas ian valoran kapablon, tamen li ne estas perfekta.

60. Yong: t. e. Ran Yong, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Zhonggong.

61. Qidiao Kai: Disĉiplo de Konfuceo.

62. Zilu: t. e. Zhong You (vd. noton 20).

63. Ran Qiu: disĉiplo de Konfuceo (vd. noton 35) .

64. Chi: t. e. Gongxi Chi, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Zihua, tial li estis nomata ankaŭ Gongxi Hua.

65. Zai Yu: Disĉiplo de Konfuceo.

66. Shen Cheng: Disĉiplo de Konfuceo.

67. Kong Wen: t. e. Kong Yu, granda oficisto de Wei-regno. “Wen” (la Klera) estis lia postmorta titolo.

68. Zichan: t. e. Gongsun Qiao, eminenta ĉefministro

- de Zheng-regno. Zichan estis lia adoltiĝa nomo.
69. Yan Pingzhong: Eminentia ĉefministro de Qi-regno.
70. Zang Wenzhong : Granda oficisto de Lu-regno.
71. En la antikveco testudo estis rigardata kiel animalo tre valora kaj respektinda, sed malgraŭ tio Konfuceo opiniis, ke teni ĝin en tiel luksega domo estas ago ne saĝa.
72. Ziwen: Eminentia ĉefministro de Chu-regno.
73. Granda oficisto: Titolo de altranga oficisto, malsupera al la ministro.
74. Cui: t. e. Cui Shu, altranga oficisto de Qi-regno.
75. Chen Wen: Altranga oficisto de Qi-regno.
76. Ji Wen: Altranga oficisto de Lu-regno.
77. Ning Wu: Altranga oficisto de Wei-regno.
78. Boyi kaj Shuqi: Du filoj de Guzhu Jun, princo de Guzhu-regno en Yin-dinastio. Antaŭ sia morto Guzhu Jun testamentis, ke Shuqi, la pli juna filo, heredu la tronon. Post kiam la patro mortis, Shuqi insistis, ke lia pli aĝa frato heredu la tronon. Por ne malobei la testamenton de sia patro, Boyi forkuris el sia regno. Poste ankaŭ Shuqi sekvis lin. La du fratoj ermite vivis ĉe la piedo de la monto Shouyang kaj, post la falo de Yin-dinastio, rifuzante manĝi grenon produktitan en Zhou-dinastio, malsatmortis tie.
79. Weisheng Gao : Lu-regnanto, fama pro sia malkaŝemo. Sed el la fakto, ke li elpetis iom da vinagro de sia najbaro kaj donis ĝin al la petanto sen diri la veron. Konfuceo konkludis, ke li estas ne sufiĉe verdirema.

80. Zuoqiu Ming: Kortega historiisto de Lu-regno.
81. Yan Yuan: t. e. Yan Hui, disĉiplo de Konfuceo (vd. noton 17) .
82. Jilu, Zilu : t. e. Zhong You (vd. noton 20) .
83. Zhonggong : t. e. Ran Yong , disĉiplo de Konfuceo. Kvankam lia patro estis plebano, tamen Konfuceo opiniis, ke li, virta kaj talents, povus okupi gravan postenon (vd. § 6. 1), kaj ke li certe estos alte ŝatata de saĝaj regantoj.
84. Zisang Bozi: Nomo de iu persono. Pri li oni nun scias nenion.
85. Yan Hui: Disĉiplo de Konfuceo (vd. noton 17) .
86. Zihua: t.e. Gongxi Chi, disĉiplo de Konfuceo.
87. Fu-o: Antikva mezurunuo por greno, egala al ĉ. 64 litroj.
88. Ju-o: Antikva mezurunuo por greno, egala al ĉ. 24 litroj.
89. Bing-o: Andkva mezurunuo por greno, egala al ĉ. 1600 litroj.
90. Yuan Si: t. e. Yuan Xian, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Zisi, tial li estis nomata ankaŭ Yuan Si.
91. Zhong You: t. e. Zilu, disĉiplo de Konfuceo (vd. noton 20).
92. Min Ziqian: t. e. Min Sun , disĉiplo de Konfuceo. Ziqian estis lia adoltiĝa nomo.
93. Bi: Nomo de feŭda urbo de la ĉefo de Ji-familio.
94. Wen-rivero: Lim-rivero inter Lu-regno kaj

Qi-regno. Per “forkuri norden de Wen-rivero” Min Ziqi aludis, ke li fuĝos en Qi-regnon. Li ne volis fariĝi la prefekto de Bi tial, ĉar li sciis, ke la ĉefo de Ji-familio ne estas lojala al la princo de Lu-regno.

95. Boniu: t. e. Ran Boniu, disĉiplo de Konfuceo.

96. Wucheng : Malgranda urbo de Lu-regno. Tiam Ziyu estis ĝia urbestro.

97. Dantai Mieming: Wucheng-ano. Poste li fariĝis disĉiplo de Konfuceo.

98. Meng Zhifan: Granda oficisto de Lu-regno.

99. Zhu Tuo: Granda oficisto de Wei-regno, fama elokventa diplomato.

100. Song Chao: Princido de Song-regno, fama pro sia beleco.

101. Gu-o: Angulhava vazo , destinita por enteni vinon. Pri la kaŭzo, kial Konfuceo diris ĉi tiujn vortojn, oni faris la jenan eblan konjekton: La Gu-o propre devis esti angulhava, sed oni faris ankaŭ rondformajn senangulojn, ĉar la farado de la rondformaj estis pli facila. Vidante gu-on sen angulojn, Konfuceo plendis, ke en lia epoko multaj aferoj jam ne meritas siajn nomojn.

102 . Nanzi: La edzino de la princo Ling de Wei-regno . Ŝi tenis en siaj manoj la regadon de Wei-regno kaj estis fifama pro sia malĉasteco.

103. La Ĝusta Mezo: La plej alta morala normo, laŭ kiu la homaj paroloj kaj agoj ne devas esti troaj, nek maltroaj (vd. § 11.16) .

104. Yao kaj Shun: Du saĝaj kaj virtaj legendaj reĝoj en la pratempo.

105. La maljuna Peng: Oni konjektas, ke Peng estis granda oficisto de Yin-dinastio, kiu estis virta kaj talenta kaj, amante la antikvecon, sin okupis ekskluzive pri la interpretado de tekstoj en antikvaj libroj.

106. La duko de Zhou: La praulo de la princo de Lu-regno. Konfuceo rigardis lin kiel sanktan saĝulon kaj pleje lin admires.

107. En la antikveco la pordogardisto de bazaro kutime tenis vivon en la mano por gardi la bazaran ordon.

108. La princo de Wei: t. e. la princo Kuai Zhe de Wei-regno. Kuai Zhe estis nepo de la princo Ling de Wei kaj filo de Kuai Kui. Ĉar Kuai Kui, ofendinte Nanzi, la edzinon de la princo Ling (vd. noton 102), forkuris en Jin-regnon, tial, post la morto de la princo Ling, Kuai Zhe estis surtronigita. Por trovi pretekston por sia invado al Wei-regno, Jin-regno intence lasis Kuai Kui reveni al sia regno, kie li batalis kontraŭ sia filo, Kuai Zhe, por akiri al si la tronon. La batalo inter Kuai Zhe kaj patro pro la trono prezentis grandan kontraston kun la reciproka cedo de la trono fare de Boyi kaj Shuqi (vd. noton 78), tial Zigong povis ekscii la laŭdo de Konfuceo al Boyi kaj Shuqi lian malaprobajn sintenon kontraŭ Kuai Zhe.

109. 《Libro de Ŝanĝiĝoj》: Libro pri aŭgurado en la antikveco. Laŭdire, ĝi estis editorita de Konfuceo.

110. La duko de She: Prefekto de She. “She” estis la

nomo de distrikto de Chu-regno.

111. Huan Tui: Ministro pri la militaj aferoj de Song-regno. Dum Konfuceo kaj liaj disĉiploj vojaĝis de Wei-regno al Cao-regno, ĉe sia trapaso de Song-regno Konfuceo instrnis siajn disĉiplojn pri ritaro apud alta arbo. Intencante mortigi Konfuceon, Huan Tui hakfaligis la arbon. Konfuceo do forkuris de tie kaj, kiam liaj disĉiploj urĝis lin al pli rapida kuro, diris ĉi tiujn vortojn.

112. Huxiang: Nomo de loko, pri kiu oni nun ne scias, kie ĝi situis. Laŭdire la tieaj loĝantoj estis malvirtemaj.

113. Chen Sibai: Nomo de persono, pri kiu oni nun scias nenion.

114. La princo Zhao: La suvereno de Lu-regno.

115. Wuma Qi: Disĉiplo de Konfuceo.

116. La princo de Lu-regno kaj la princo de Wu-regno havis la saman familian nomon Ji. Ĉar tiam la interedziĝo inter personoj havantaj la saman familian nomon estis kontraŭ deco, tial, por maski la veron, la princo Zhao donis al sia edzino la nomon Wu Mengzi (laŭkutime li devus nomi sin Wu Ji). Se li nomus sin Wu Ji, tio klare montrus, ke ili havas la saman familian nomon.

117. Gongxi Hua: t. e. Gongxi Chi, disĉiplo de Konfuceo.

118. Taibo: La unuenaskita filo de Gugong Danfu, la praulo de Zhou-dinastio. Gugong Danfu havis tri filojn, nome Taibo. Zhongyong kaj kaj Jili. Laŭdire Gugong Danfu antaŭvidis, ke Ji Chang, filo de Jili, estos virta kaj

talenta, tial li volis heredigi la tronon al Jili anstataŭ al Taibo, por ke estontece Jili povu heredigi la tronon al sia filo Ji Chang. Obeante la volon de sia patro, Taibo kaj Zhongyong memvole foriris al Gouwu, kie ili fiksløgiĝis. Post sia surtroniĝo Ji Chang potencigis sian landon, kaj lia filo, Ji Fa, faligis Yin-dinastion kaj tiel konkeris la tutan Ĉinion.

119. Jili: Frato de Taibo (vd. noton 118).

120. Meng Jing : Granda oficisto de Lu-regno.

121. Oni supozas, ke la amiko probable estis Yan Hui (vd. noton 17) .

122. Li-o: Ĉina mezurunuo de longo, 0.5 kilometro.

123. Zhi: Muzika majstro de Lu-regno.

124. Shun: Saĝa kaj virta legenda reĝo en la pratempo . Laŭdire li povis edifi la popolon per sia virto kaj havis eminentajn ministrojn, kiuj helpis lin en la regado, tial li povis efike regi sen penoj.

125. Yu: La fondinto de Xia-dinactio. Laŭdire li ricevis la tronon dank' al la abdiko de Shun. Li donis atenton al agrokulturo.

126. Yao: Saĝa kaj virta legenda reĝo en la pratempo. En sia maljuneco li memvole abdikis sian tronon kaj cedis ĝin al Shun. En tin ĉi teksto inter la alineoj mankas kohereco. Oni supozas, ke eble iuj vortoj aŭ frazoj defalis el la teksto.

127. Reĝo Wu: t. e. Ji Fa, la unua suvereno de Zhou-dinastio (vd. noton 118) .

128. Tang- kaj Yu-epokoj: La epoko, en kiu regis Yao

(vd. noton 126) , estis nomata Tang-epoko, kaj la epoko, en kiu regis Shun (vd. noton124) , estis nomata Yu-epoko.

129. Reĝo Wen: t. e. Ji Chang, la patro de Ji Fa (Reĝo Wu) (vd. noton 118) .

130. En «Analektoj de Konfuceo» efektive estas malmultaj vortoj pri profito kaj la volo de belo, sed la vortoj koncernantaj la perfektan virton ja estas abundaj. Kial do oni ĉi tie diris, ke li malofte parolis ankaŭ pri la perfekta virto? Pri tiu demando oni donis jenan klarigon: Konfuceo opiniis, ke la perfekta virto estas la plej alta morala normo, kiun oni apenaŭ povas atingi. Li ne kuraĝis pretendi, ke li mem estas perfektevirta, kaj parolante pri aliaj, li preskaŭ ĉiam diris, ke li ne scias, ĉu ili estas perfekte virtaj. Ĝuste ĉar li malofte parolis pri la perfekta virto, liaj vortoj pri ĝi altiris la atenton de liaj disĉiploj, kiuj registris preskaŭ ĉiujn tiujn vortojn en la libron «Analektoj de Konfuceo» . Tial oni ne povas konkludi el la abundaj registritaj vortoj, ke Konfuceo ne malofte parolis pri la perfekta virto.

131. Daxiang: Nomo de iu loko.

132. Kuang : Nomo de iu loko en Song-regno. Kiam Konfuceo kaj liaj disĉiploj vojaĝis de Wei-regno al Chen-regno, ĉe sia trapaso de Kuang ili estis retenitaj tie kvin tagojn de tieuloj pro tio, ke ĉi tiuj prenis Konfuceon por Yang Hu, kiu iam prirabis ilin, ĉar liaj vizaĝtrajtoj estis similaj al tiuj de Yang Hu.

133. Lao: Disĉiplo de Konfuceo.
134. Feng-birdo: Mita birdo, kiu laŭdire aperas en la epoko, en kiu regas la virto.
135. Ok Diagramoj: Diagramoj por aŭgurado. Laŭdire la apero de Ok Diagramoj sur la Flava Rivero anoncus la aperon de nova saĝa kaj virta suvereno.
136. En la antikveco oni montris estimon aŭ respekton al iu per stariĝo aŭ, se oni piediris, per rapidaj paŝoj.
137. La kvar versoj cititaj ĉi tie estas el antikva poemo, kiu nun ne plu ekzistas. La ideo, kiun esprimis Konfuceo en siaj vortoj, estas la sama, kiel tiu esprimita en §7. 30.
138. Gui-o: Longforma jada tabuleto kun ronda aŭ pinta supro, kiun antikvaj regantoj kaj iliaj ministroj tenis en la manoj en ceremoniaj okazoj.
139. Antaŭ ol fari oferadon la antikvulo devis sin bani kaj sin deteni de vintrinkado, viandmangado kaj kunkuŝado kun sia edzino. Tio estis nomata fastado.
140. Laŭkutime post oferado la princo donace disdonis la ofervandon al la ministroj kaj grandaj oficistoj, kiuj partoprenis la oferadon.
141. Antaŭ la manĝado la antikvulo nepre oferis al la inventinto de la nutraĵo iom el la manĝaĵoj, kiujn li estis manĝonta.
142. La dek personoj menciitaj ĉi tie estis la plej proksimaj disĉiploj de Konfuceo.
143. Gui-o: Vd. noton 138 . La versoj pri blankjada gui-o estas cititaj el «Libro de Poezio» . Jen estas la versoj:

La makulo sur la gui' blankjada

*Povas esti tute forigita,
La eraro en parolo nia
Ja ne povas esti nuligita.*

144. Yan Lu: La patro, de Yan Hui. Ankaŭ li estis disĉiplo de Konfuceo.

145. Li: t. e. Kong Li, filo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Boyu. Kong Li mortis en sia kvindeka jaro. Tiam Konfuceo estis en la ago de sepdek jaroj.

146. Se-o: Antikva 25-korda plukinstrumento, iom simila al citro.

147. Per tiu ĉi metaforo Konfuceo aludis, ke Zilu jam estas sufiĉe instruita, sed li ancoraw ne atingas erudicion.

148. Shi: t. e. Zhuansun Shi, disĉiplo de Konfuceo.

149. Chai: t. e. Gao Chai, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Zigao.

150. A Ziran: Ano de Ji-familio (vd. noton 28) .

151. Zigao: t. e. Gao Chai (vd. noton 149).

152. Bi: Nomo de urbo en Lu-regno.

153. Zeng Xi: t. e. Zeng Dian, la patro de Zeng Shen (vd. noton 5). Lia adoltiĝa nomo estis Zixi, tial li estis nomata ankaŭ Zeng Xi. Li, same kiel lia filo, estis disĉiplo de Konfuceo.

154. Dian: t. e. Zeng Dian (Zeng Xi. vd. noton 153) .

155. Ĉapitaj junuloj: t. e. junuloj jam atinginte la aĝon de dudek jaroj. Laŭ antikva moro junuloj havantaj la aĝon de malpli ol dudek jaroj ne rajtis porti ĉapon.

156. Yi: Nomo de rivero fluanta sude de la nuna Qufu, Shandong-provinco.

157. Pluv-altaro: Altaro, ĉe kiu oni faris al Ĉielo preĝon por peti pluvon dum sekeco.
158. Sima Niu: t. e. Sima Geng, disĉiplo de Konfuceo. Lia adoltiĝa nomo estis Ziniu, tial li estis nomata ankaŭ Sima Niu. Laŭdire li estis vortabunda kaj malpacieca. La respondo de Konfuceo al li pri la perfecta virto certe estis direktita kontraŭ tiu lia manko.
159. Ji Zicheng: Granda oficisto de Wei-regno.
160. You Ruo: Disĉiplo de Konfuceo (vd. noton 4).
161. La princo Jing de Qi: La suvereno de Qi-regno.
162. Gaoyao: Ministro al Shun.
163. Tang: La fondinto kaj la unua suvereno de Shang-dinastio.
164. Yiyin: Ĉefministro al Tang.
165. Fan Xu: t. e. Fan Chi. Lia adoltiĝa nomo estis Zichi, tial li estis nomata ankaŭ Fan Chi.
166. Jing: Filo de la princo Xian de Wei-regno.
167. La vortoj estas cititaj el verko, kies aŭtoro estas nekonata.
168. Jufu: Nomo de urbo en Lu-regno.
169. Xian: t. e. Yuan Xian, disĉiplo de Konfuceo.
170. Nangong Kuo: Disĉiplo de Konfuceo.
171. Yi: Lerta legenda arkpafisto.
172. Ao: Legenda fortegulo, kiu kapablis eĉ veturigi ŝipon sur la tero.
173. Ji: Praulo de la suverenoj de Zhou-dinastio. Li instruis al la popolo grenplantadon kaj tial estis kultata postmorte kiel dio de greno.

174. Bi Chen : Granda oficisto de Zheng-regno.
175. Shi Shu: Granda oficisto de Zheng-regno.
176. Ziyu: Granda oficisto de Zheng-regno.
177. Dongli: Nomo de loko, kie Zichan loĝis.
178. Zixi: Ĉefministro de Chu-regno. En sia oficista kariero li ne faris laŭdindajn atingojn.
179. La ĉefo de Bo-familio: t. e. Bo Yan, granda oficisto de Qi-regno.
180. Pianyi : Nomo de urbo en Qi-regno.
181. Meng Gongchuo: Granda oficisto de Lu-regno. Li estis fama pro sia malavideco.
182. La familioj de Zhao kaj Wei: Du plej potencaj familioj en Jin-regno. Iliaj ĉefoj, Zhao kaj Wei, estis grandaj oficistoj de tiu regno.
183. Teng kaj Xue: Du malgrandaj regnoj, kiuj kuŝis proksime de Lu-regno.
184. Zang Wuzhong: Granda oficisto de Lu-regno. Kiam li estis en Qi-regno, la princo Zhuang de Qi volis doni al li feŭdon. Antaŭvidante, ke la princo Zhuang estos mortigita, li rifuzis akcepti la feŭdon. Poste la princo Zhuang vere estis mortigita, kaj li sukcese evitis kompromitiĝon. Tial Konfuceo opiniis, ke li estas homo tre saĝa.
185. Zhuangzi de Bian: Granda oficisto de Lu-regno. Li estis fama pro sia braveco. Bian estis la nomo de la urbo, kiun li posedis kiel sian feŭdon.
186. Gongming Jia: Wei-regnano, sendito de Gongshu Wen.

187. Gongshu Wen: t. e. Gongshu Ba, ministro de Wei-regno. “Wen” estis lia postmorta titolo.
188. Fang: Nomo de la urbo, kiun Zang Wuzhong posedis kiel sian feŭdon.
189. La princo Wen de Jin: La suvereno de Jin-regno.
190. La princo Huan: t. e. la princo Huan de Qi, la suvereno de Qi-regno.
191. Jiu : Frato de la princo Huan. Jiu kaj Huan ambaŭ estis pli junaj fratoj de la princo Xiang, la suvereno de Qi-regno. Ĉar la princo Rang estis tirano, tial, por eviti eventualan malfeliĉon, Huan forkuris en Ju-regnon, akompanate de Bao Shuya , kaj Jiu forkuris en Lu-regnon , akompanate de Guan Zhong kaj Shao Hu. Post kiam la princo Xiang estis mortigita, Huan revenis en sian regnon kaj surtroniĝis. Li atakis Lu-regnon per armitaj fortoj, por devigi la reganton de Lu-regno mortigi Jiu. Post la morto de Jiu, sin mortigis Shao Hu, sed Guan Zhong fariĝis la ĉefministro al la princo Huan.
192. Shao Hu: Akompananto de Jiu, kiam tiu forkuris en Lu-regnon (vd. noton 191) .
193. La tiamaj barbaroj portis jakon butonumitan de la maldekstra flanko.
194. Xun: Origine li estis vasalo al Gongshu Wen. Pro la rekomendo de Gongshu Wen li kune kun tiu promociiĝis al ministreco de Wei-regno.
195. La princo Ling de Wei: La suvereno de Wei-regno.
196. Zhongshu Yu: t. e. Kong Wen (vd . noton 67) .

197. Chen Cheng: Alinome Chen Heng, granda oficisto de Qi-regno.
198. La princo Jian: La suvereno de Qi-regno.
199. La ĉefoj de la tri familioj: t. e. la tri grandaj oficistoj Zhongsun, Shusun kaj Jisun, kiuj estis la efektivaj regantoj de Lu-regno.
200. Qu Boyu: Granda oficisto de Wei-regno. Kiam Konfuceo estis en Wei-regno, li loĝis ĉe li. Post kiam Konfuceo revenis en Lu-regnon, Qu Boyu sendis viziti lin.
201. Weisheng Mu: Probable ermito.
202. Qiu: t. e. Kong Qiu, la nomo de Konfuceo.
203. Gongbo Liao: Disĉiplo de Konfuceo.
204. Jisun: Granda oficisto de Lu-regno.
205. Zifu Jingbo: Granda oficisto de Lu-regno.
206. La sep ermitoj estis Boyi, Shuqi, Yuzhong, Yiyi, Zhuzhang, Hui de Liuxia kaj Shaolian.
207. Shimen: La ekstera pordo de la murego de la ĉefurbo de Lu-regno.
208. S-ro Kong: t. e. Konfuceo. Kong estis lia familia nomo.
209. La du versoj estas el «Libro de Poezio» . Per “profunda akvo” tiu homo aludis pri mallumeco de la socio, en kiu oni devus rezignaci (travadi kun la vestoj surportataj) ; per “malprofunda akvo” li aludis pri ne plena mallumeco de la socio, en kiu oni povus iel eviti malbonon (travadi kun la vestoj suprenlevitaj) .
210. Gaozong: reĝo de Yin-dinastio.
211. Yuan Rang: Lu-regnano, amiko de Konfuceo.

Laŭdire, kiam lia patrino mortis kaj Konfuceo iris al lia hejmo, por helpi al li ĉe la funebraĵoj, li kantadis starante sur la ĉerko.

212. Sidi kun disigitaj kruroj estis aroganta kaj malĝentila teniĝo.

213. Quedang: Nomo de loko proksima al la hejmloko de Konfuceo.

214. Kiam Konfuceo kaj liaj disĉiploj vojaĝis de Chen-regno al Cai-regno, ili estis sieĝataj sep tagojn de Chen-regnanoj.

215. Shi Yu: Granda oficisto de Wei-regno.

216. Xia: t. e. Xia-dinastio (vd. noton 26).

217. Yin: t. e. Yin-dinastio (vd. noton 25) .

218. Zheng : Nomo de regno.

219. “Ŝteli sian postenon” signifas, ke oni ne konsciencie plenumas sian oficon, kvazaŭ la posteno, kiun oni okupas, estus akirita per ŝtelo.

220. Hui de Liuxia: t. e. Zhan Huo, homo virta kaj talenta de Lu-regno. Hui estis lia postmorta titolo; Liuxia estis la nomo de la loko, kie li loĝis.

221. Oni ne povas trovi ian logikan rilaton inter la du aferoj. Probable en tiu ĉi peco de la teksto troviĝas eraro farita de la kompilintoj.

222. En la antikveco la muzikludistoj plejofte estis blinduloj.

223. Zhuanyu: Malgranda regno submetita al Lu-regno.

224. La monto Dongmeng: Monto kuŝanta sude de la nuna Mengyin-gubernio, Shandong-provinco.

225. Zhou Ren: Historiisto en la antikveco.
226. Bi: Feŭda urbo de la ĉefo de Ji-familio.
227. La princo de Lu: La suvereno de Lu-regno.
228. La tri Huan-oj: t. e. la tri grandaj oficistoj de Lu-regno, nome Mengsun, Shusun kaj Jisun (vd. noton 30) , ĉar ili estis posteuloj de la princo Huan de Lu-regno.
229. La monto Shouyang : La monto, ĉe kies piedo Boyi kaj Shuqi malsatmortis (vd . noton 78).
230. Ĉi tiu lasta frazo logike ne estas alligebla al la antaŭa parto de la teksto. Oni konjektas, ke inter la antaŭlasta frazo kaj la lasta mankas frazo (j), kiu(j) estus preterlasita (j) dum kopiado.
231. Chen Kang: Disĉiplo de Konfuceo (vd. noton 8).
232. Boyu: t. e. Kong Li, filo de Konfuceo (vd . noton 145) .
233. Yang Huo: Alinome Yang Hu, vasalo al la ĉefo de Ji-familio.
234. Yan: t. e. Yan Yan (Ziyou).
235. Gongshan Furao: Vasalo al la ĉefo de Ji-familio.
236. Bi Xi: Vasalo al Fan Zhongxing, kiu estis granda oficisto de Jin-regno. Bi Xi estis la prefekto de Zhongmu kaj ribelis tie.
237. Zhongmu: Nomo de loko en Jin-regno.
238. 《Zhounan》 kaj 《Shaonan》: La titoloj de la unuaj du partoj de 《Libro de Poezio》 (vd . noton 10).
239. Staranto kun la vizaĝo kontraŭ muro: Se oni staras kun la vizaĝo kontraŭ muro, oni povas vidi nenion, nek

fari paŝojn antaŭen.

240. En la antikveco la regnaj suverenoj devis porti robon de cinabra ruĝo, sed en la tempo de Konfuceo iuj suverenoj jam amis porti purpuran robon. Tia tendenco estis abomenata de Konfuceo.

241. Zheng: t. e. Zheng-regno. La Kantoj de Meng estis malĉastaj (vd. §15.11) .

242. La klasika, konvencia muziko: La ortodoksa muziko de Zhou-dinastio.

243. Ru Bei : Lu-regnano. Li estis sendita de la princo Ai de Lu-regno, por lerni sub Konfuceo. Pri la demando, kial Konfuceo ne volis lin akceptikaj intence sciigis lin pri tio, oni supozas, ke eble Konfuceo malŝatis lin pro ia malbona kvalito de li aŭ antaŭe li iel ofendis Konfuceon.

244. En la antikveco la ligno uzata por frot-estigado de fajro variis laŭ la sezonoj. En printempo oni uzis ulman lignon, en somero morusarban, en aŭtuno kverkan kaj en vintro soforan.

245. Yu: t. e. Zai Yu. Zai Wo estis lia adoltiĝa nomo.

246. La vicgrafo Wei: Pli aĝa frato de la reĝo Zhou de Yin-dinastio. Pro la tiraneco de Zhou li forlasis tiun.

247. La vicgrafo Ji: onklo de la reĝo Zhou de Yin-dinastio . Pro tio, ke Ji faris admonon al Zhou, Zhou faris lin sklavo.

248. Zhou: La lasta reĝo de Yin-dinastio, fifama pro sia tiraneco.

249. Bi Gan: Onklo de la reĝo Zhou de Yin-dinastio. Pro

tio, ke Bi Gan faris admonon al Zhou, Zhou diris: “Mi aŭdis, ke la koro de virtulo havas sep truojn”, kaj li, tranĉe eligis lian koron.

250. La ĉefo de Meng-familio : t. e. Mengsun, granda oficisto de Lu-regno.

251. Ji Huan: Ĉefministro de Lu-regno.

252. Jieyu: Chu-regnano. La tiamuloj nomis lin frenezulo, sed efektive li estis ermito, kiu evitis la mondon.

253. Changju kaj Jieni: Du ermitoj.

254. Kong Qiu: La nomo de Konfuceo.

255. Boyi, Shuqi: Vd . noton 78. Hui de Liuxia: Vd . noton 220. Pri Yuzhong, Yiyi, Zhuzhang kaj Shaolian oni scias nenion alian ol tion, kion Konfuceo diris ĉi tie.

256. En la antikveco la reĝoj kaj feŭdaj princoj manĝis ĉiam kun akompano de muziko, kiun ludis muzik-majstroj.

257. La princo de Lu: t. e. Boqin, filo de la duko de Zhou.

258. Pri ĉi tiuj ok personoj oni nun scias nenion.

259. Yan You: t. e. Yan Yan (Ziyou).

260. Meng Zhuang: Filo de Meng Xian, kiu estis granda oficisto de Lu-regno. Ankaŭ li mem estis granda oficisto.

261. Yang Fu: Disĉiplo de Majstro Zeng (Zeng Shen).

262. Gongsun Chao de Wei: Granda oficisto de Wei-regno.

263. Zhongni: La adoltiĝa nomo de Konfuceo.
264. Wen kaj Wu: t. e. Reĝo Wen (vd . noton 129) kaj Reĝo Wu (vd . noton 127) , kiujn Konfuceo respektis kiel sanktajn saĝulojn.
265. Shusun Wushu: Granda oficisto de Lu-regno.
266. Ren-o : Antikva mezurunuo de longo, valoranta sep aŭ ok ĉi-ojn (unu ĉi-o=1/3 metro) .
267. Chen Ziqin: t. e. Chen Kang, Ziqin estis lia adoltiĝa nomo . El tiu ĉi teksto oni povas vidi, ke li ne estis disĉiplo de Konfuceo.
268. Lü: La persona nomo de Tang.
269. Ĉi tiuj vortoj de Tang estis petpreĝo por pluvo al ĉielo, farita dum sekegeco.
270. Oni supozas, ke ĉi tiuj vortoj estis eldiritaj de la suvereno de Zhou-dinastio tiam, kiam li donis al merituloj honorajn titolojn kaj donacojn.